

EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 3

MAJO-JUNIO 1966





Oficisto de la Hinmin-stacio fervore servas la pasaĝerojn.

Foto de Ĝang Gjun

15/11/1954.



Nova Vivo de Malnova Arto

La argilskulpta verko "Farpaga Kolektejo" lasttempe kreita en Ĉinio rikoltis varmajn aplaŭdojn de la vastaj laborulaj amasoj en Ĉinio, kaj multe mirigis la ĉinajn artistojn. En ĉi tiu numero, ni aperigis sur la bildpaĝo fotojn pri kelke da ĝiaj partoj.

Argilskulpta arto en Ĉinio havas longan tradicion, altan atingon kaj riĉan heredaĵon. Dum la longa daŭro de la feŭdisma socio, tamen, ĝi estis aplikata nur al figurigo de dioj kaj diabloj en temploj, por ke la laboranta popolo kultu al ili, petu de ili feliĉon postmortan kaj toleru dumvive la subpremon kaj ekspluaton.

Kiam la socisistemo por subpremi kaj ekspluati la laborantan popolon estis renversita, ĉinaj skulptistoj komencis skulpti heroajn figurojn de la laboranta popolo, sed iliaj verkoj limiĝis nur en etaj statuoj el gipso, marmoro, granito aŭ bronzo, kiuj taŭgas por dekoracii diversajn publikajn konstruaĵojn en la urboj. Do la problemo kiel apliki la arton de argila skulpto, kiu estas familiara por la laboranta popolo, bezonanta nur simplan materialon kaj facile vastigebla, restis problemo solvenda en skulptarto.

La argilskulpta verko "Farpaga Kolektejo" solvis tiun ĉi problemon. Ĝi sukcese figurigis la malcedemajn kamparanojn kun malamo kontraŭ la bienula klaso kaj la kruelajn kaj insidemajn bienulojn kaj iliajn lakeojn. Ĝi malkaŝis vivbilde la kruelan ekspluaton fare de la bienula klaso al la kamparanoj, kaj montras kiel la kamparanoj trairis la vojon de sufero al vekigo. Por la verko oni heredis la tradician aranĝon de serio da grandaj argilaj figuroj kaj la arton de homfigura formado. Sed ĝi tute ŝanĝis la influon de la argila skulptarto al la laboranta popolo. Sennombraj popolanoj vizitas la ekspozicion. La pliaĝaj por rememorigi al si la mizeran vivon en la pasinteco kaj la junaj por koni la ekspluaton kaj subpremon fare de la bienuloj kaj ĉerpi pli grandan forton por la konstruado de socialismo.

Tio ĉi estas parto de la renovigado de la socialismaj literaturo kaj arto en Ĉinio, kaj parto reprezentiva. "El kaj por la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj" estas la ĉefa aspekto de la literaturo kaj arto en la nova Ĉinio.

En la pasinteco, iuj opiniis, ke la Pekina Opero povas nur prezenti la vivon de la malnova tempo, sed nun ĝi rikoltis ankaŭ sukcesojn en prezentado de la vivo kaj batalo de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ja ankaŭ baledo deveninta de Eŭropo fariĝis artformo uzebla por prezenti la revolucionan batalon de la ĉina popolo. Diversaj grupoj de literaturaj kaj artaj laboroj, verkistoj, reĝisoroj, aktoroj kaj muzikistoj de diversaj specoj de teatraĵoj, sin organizinte en la grupetojn de kulturaj husaroj de po kelke da homoj penetris en kamparojn, fabrikojn, minejojn kaj trupojn. Cento da miloj da laborantoj pri literaturo kaj arto nun iris sur montojn kaj en kamparojn por profunde sperti la vivon de la popolamaso. Tial, aperis unu post alia bonaj verkoj kiuj prikantas la revolucionan batalon de la popolo kaj spegulas la socialisman realan vivon plenan de energio, la figuroj de herooj de la nova epoko okupis la scenejojn, kaj granda nombro da junaj verkistoj kaj artistoj venis sinsekve el la vicoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La laboranta popolo estas la mastro de la nova socio, ĝi bezonas havigi al si kaj disvolvi la bonajn heredaĵojn de literaturo kaj arto de siaj antaŭuloj, kaj utiligi la diversajn formojn de literaturo kaj arto por ardigi sian entuziasmon en la konstruado de socialismo. Same kiel aliaj formoj de literaturo kaj arto, la argilskulpta arto, kiu dum longa tempo okupiĝis pri temoj pri la mondo de dioj kaj diabloj, jam sin turnis al la reala vivo de socialismo kaj revenis al sia vera mastro. Same kiel la aliaj literaturaj kaj artaj formoj, certe ankaŭ ĝi enradikiĝos en la vasta amaso de la laboranta popolo por ricevi pli riĉan nutron kaj ĉarmi per pli belaj floroj.

La Red.



La Nova Ĉinio, Lando Tute

JONG LONGGUJ, fama ekonomo kaj vicprezidanto de la Ĉina Komitato por Akcelado de Internacia Komercio

LA nova Ĉinio jam decidis plenumi, ekde la jaro 1966, la grandiozan Trian Kvinjaran Planon (1966-1970) por disvolvi sian nacian ekonomion. Ĝuste en ĉi tiu tempo, niaj ŝtataj gvidantoj oficiale deklaris ke nia lando jam estas tute kvita al la sovetunia registaro, pri la prunto de kapitalo kun interezo, sume de 1,406 milionoj da novaj rubloj. Tiel do la nova Ĉinio jam fariĝis lando sen ia ajn eksterlanda ŝuldo. Nun la tuta popolo pluapase disvolvas la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj, penluktado, strebado al prospero kaj diligenta kaj ŝperema konstruado de la patrio, por plenumi kaj superplenumi la Trian Kvinjaran Planon kaj heroe marŝi antaŭen al nova celo de konstruado!

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia ŝtato jam asignis al ĉiuj siaj branĉoj de la nacia ekonomio sufiĉe grandan sumon de investoj por la fundamenta konstruado. Ekde la jaro 1950 ĝis 1957, t. e. la periodo de restarigo de nia nacia ekonomio kaj la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957), la totala investo por la fundamenta konstruado en la tuta socio sumis 62,840 milion janojn (=pli ol 700 milion uncoj da oro), el kiuj la sumo de la investo asignita el la ŝtata plano, t. e. el la ŝtata kaso, atingis 55,900 milion janojn. Estas imageble, ke laŭ la tiutempa produkta nivelo de la industrio kaj agrokulturo en nia lando, la supre dirita investosumo estas proporcie ne malgranda. En la jaroj inter 1958 kaj 1964, nia lando trapasis la periodon de la Dua Kvinjara Plano (1958-1962) kaj la periodon de alĝustigo kaj nova supreniro de la nacia ekonomio, kaj la totala sumo de la efektivitaj investoj en la fundamenta konstruado de nia lando eĉ superis tiun de la supre dirita periodo.

Ĉu estas ebleco por ajna lando post sendependiĝo efektivigi akumuladon de kapitalo,

t. e. havigi al si fonton de investoj, ne sin apogante ĉefe sur la tiel nomata "helpo" de fremdlandoj, sed ĉefe sur la nacia ekonomio de sia propra lando? Oni devas diri ke tio estas tute ebla.

En la pasintaj dekelkaj jaroj, niaj investoj por la fundamenta konstruado ja ĉiuj venis de la interna akumulado en la nacia ekonomio de nia lando.

Sub la socia sistemo de nia lando, nia nacia enspezo estas distribuita laŭ la ŝtata plano. Ĝenerale dirite, la nacia enspezo post distribuo kaj redistribuo fariĝas fine du partoj, t. e. la akumula fonduso uzata por kontentigi la bezonojn de la tuta socio pri investoj por la fundamenta konstruado, pliigo de la cirkulanta kapitalo de entreprenoj kaj la materia rezervo de la ŝtato; kaj la konsumata fonduso uzata por kontentigi la bezonon de elspezoj por individuoj kaj kolektivoj en la tuta socio, kaj paŝo post paŝo altiĝi la vivnivelon de la tuta popolo surbaze de la disvolvado de produktado.

Kiel difinite de nia lando, la nacia enspezo dum kalkulado ne inkluzivas ĉiajn servojn, tiel do la artefarita trograndigo, t. e. la falsa parto estas forigita. Laŭ nia opinio, la nacia enspezo signifas nur la materian riĉaĵon nete pliigitan en la tuta socio dum certa periodo, nome la totala valoro estigita en certa periodo de ĉiuj produktaj branĉoj inkluzive de la industrio, agrokulturo, konstruo kaj varo-transporto kaj pogranda komercio, minus la valoro de la uzitaj materialoj kaj la dekalkulenda valoro de la fiksaĵoj (ĉefe maŝinoj) pro konsumo dum la produktado estas la neta pliigo de materia produkto t. e. la nacia enspezo de nia lando.

Ordinare, laŭ la sperto akirita de nia lando en la pasintaj dekelkaj jaroj, estas atingeble kaj konvene ke la akumula fonduso konsis-



Kvita de Eksterlandaj Ŝuldoj

tigu ĉirkaŭ 20% de la tuta nacia enspezo de nia lando, kaj la konsumo fonduso ĉ. 80%.

La kaŭzo ke nia lando post la Liberigo povis iel sukcese apliki la diritan principon por solvi sian problemon pri la fonto de kapitalo kuŝas ĉefe en tio:

1. La totala sumo de la nacia enspezo estis tre malgranda, antaŭ la Liberigo, pro malriĉeco kaj postginteco de la malnova Ĉinio en ekonomio. Kaj tamen ĉirkaŭ 2,000 fremdaj komercaj entreprenoj ankoraŭ okupis sufiĉe grandan parton de la jara nacia enspezo, kaj ĉi tiu parto elfluis kutime en la landojn de la koloniistoj kiel “profito de entrepreno”. En la sama tempo ankaŭ la feŭdaj bienuloj kaj burokrataj kompradoraj kapitalistoj en nia lando proprigis al si alian parton de la nacia enspezo per ĉiuj rimedoj de ekspluatado, kaj fakte ĉi tiu parto estis aŭ “malŝparita” de ili (t. e. uzita ne por pliampleksigo de reproduktado) aŭ eĉ “fuĝinta” eksterlanden.

Tial do post la dirita distribuado, la resta sumo de la nacia enspezo estis tre malgranda kaj certe ne povis solvi la problemon de fonto de kapitalo, nek povis samtempe iom altigi la vivnivelon de la tuta popolo.

Pro tio ke en la nova Ĉinio post la Liberigo ni jam plene plenumis ĉiujn taskojn postlasitajn de la tempo de la nacia kaj demokratia revolucio, t. e. ke ni plene abolis ĉiujn privilegiojn, kiujn imperiismo ĝuis en la malnova Ĉinio, la ĉina popolo tenas enmane la vivliniojn de sia nacia ekonomio, kaj samtempe, ĝi efektivigis ankaŭ la reformon de la terposeda sistemo, konfiskis ĉiujn burokratajn kapitalojn, kaj tiel tute ŝanĝis la suprediritan malracian distribuadon de la nacia enspezo. Nuntempe, preskaŭ la tuta enspezo (ne inkluzive tiun parton de la fiksita interezo donata al la naciaj kapitalistoj komence de la jaro 1956, sed ĝia

proporcio estas tute sensignifa) jam povas esti unuece distribuata laŭ la ŝtata plano.

2. Ĉar depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, senĉese supreniras la produktado de ĉiuj produktaj branĉoj (ĉefe tiuj de industrio kaj agrokulturo) kaj senĉese altiĝis la produktivo de laboro, sekve ankaŭ la totala sumo de la nacia enspezo de nia lando responde pligrandiĝas. Ekzemple, en la periodo de la Unua Kvinjara Plano, la totala sumo de la nacia enspezo en la jaro 1957 plimultiĝis ĉ. 50% kompare kun tiu en 1952, kaj post la jaro 1958, efektiviĝis kompreneble pluapaŝa plimultiĝo.

Estas videble ke pro efektiviĝo de la racia distribuo de la nacia enspezo unuflanke, kaj pro la senĉesa pligrandiĝo de ĝia totala sumo aliflanke, ni akiris la eblecon solvi kaj la problemon de kapital-akumulado kaj tiun de kontinua altigo de la vivnivelo de la vasta populamaso, sen apogi nin sur la tiel nomata “fremdlanda helpo”.

En la konkreta plenumado, la akumulado de kapitalo de nia lando efektiviĝis plejparte tra la kanaloj de la ŝtata financo.

Prenu kiel ekzemplon la staton de 1950: 75.1% de la tuta enspezo de nia ŝtata kaso konsistis el la impostoj, 13.4% el la enkasigitaj profitoj de la ŝtataj entreprenoj kaj administracioj, 5.0% el la enspezoj de la kredita kaj asekura aferoj kaj 6.5% el la ceteraj enspezoj.

En 1959, la enkasigita profito de la ŝtataj entreprenoj kaj administracioj okupis je 61.6% de la totala sumo de la tuta enspezo, dum la impostaj enspezoj 37.9%, kaj la kredita, asekura kaj aliaj enspezoj sume nur 0.5%.

Evidente en la enspezo de nia ŝtata financo, preskaŭ la tuta sumo nuntempe venas el du fontoj: la enkasigita profito de la ŝtataj entreprenoj kaj administracioj (t. e. la nepra rezulto el la senĉesa disvolviĝo de nia ŝtata ekonomio)

kaj la diversaj impostoj. Tio ĉi estas la ĉefa fonto de la ŝtata financa enspezo en nia lando.

Antaŭ la jaro 1958, nia lando emisiis ĉiujare limigitan nombron da enlandaj ŝtataj obligacioj. Sed komence de 1959, ne nur ĉesis la emisiado de ŝtataj obligacioj, sed la kapitalo kaj interezo de la emisiitaj obligacioj tute likvidiĝos post nelonge.

Estas tre interese ke post sia fondiĝo la nova Ĉinio neniam enlistigis en sia buĝeto de la financa enspezo eron de la tiel nomata "enspezo de fremdlanda helpo".

Pli signifa estas la fakto, ke ni neniam aplikis la "teorion de deficitita financado", t. e. solvi la problemon de kapital-kolektado per emisio de pli multa mono, plivastigo de la kredito de banko, deviga depono de mono k. a. kiuj fakte estas rimedoj de inflacio. La dirita metodo, laŭ nia sperto, estas ne nur teorie nepravigebla, sed ankaŭ praktike malfavora al la sana disvolviĝo de la nacia ekonomio.

Sub la premiso teni la financajn en- kaj elspezojn en longdaŭra ekvilibro, la ŝtataj financaj enspezoj de nia lando jam kontentigis la tutan bezonon de la ŝtataj elspezoj.

Ni prenu denove la ekzemplon de 1950: 25.5% de la tuta elspezo de nia lando uziĝis por ekonomia konstruo, 11.1% por socia kulturo kaj eduko; kaj la investoj por la fundamenta konstruo asignitaj al la ekonomia kaj kultura kaj eduka branĉoj jam okupis ĉ. 15%.

En 1959, la proporcio de la elspezoj por ekonomia konstruo en la totala elspezo jam pliiĝis ĝis 61.0%, tiu de la elspezoj por socia kulturo kaj eduko okupis 11.1%; kaj la investoj por la fundamenta konstruo en la ekonomia kaj kultura kaj eduka branĉoj jam atingis ĉ. 50.6%.

La supre diritaj faktoj montras kiel ni efektivigis la enlandan akumuladon de kapitalo tra la kanaloj de la ŝtata financo kaj kontentigis la bezonon de mono por la fundamenta konstruado. Niaj praktikaj spertoj jam pruvis, ke tio estas ne nur rimedo praktikebla, sed ankaŭ bonega.

Krom tio, estas ankoraŭ malgranda parto el la akumulado de la tuta socio, kiu efektiviĝas interne de la kolektiva ekonomio. Ekzemple, antaŭ 1957, estis en la tuta lando ĉ. 750,000 agrokulturaj produktaj kooperativoj, sed nun ili disvolviĝis kaj kombiniĝis en ĉ. 80,000 kam-

parajn popolajn komunumojn, en kies ĉiujara distribuado, estas ĝenerale deprenitaj kelkaj elcentoj kiel komuna fonduso por la pliampleksigo de reprodukto. Tio ĉi estas la alia fonto por efektivigi la enlandan akumulon de la nacia ekonomio.

Kompreneble, en la sama tempo kiam oni solvas la problemon de la enlanda kapitalakumulo, estas necese strebi al ekvilibro de la internaciaj en- kaj elspezoj. Kaj tio estas ja efektivigebla post strebado. Dum la pasintaj dekelkaj jaroj, sekve de la senĉesa kreskado de la nacia ekonomio, ankaŭ nia eksterlanda komerco responde disvolviĝis. Cetere, nia lando ĉiam konservis, en la lastaj jaroj, sian favoran pozicion de supereksperto. Tiamaniere, nia lando ne nur per granda kvanto da eksportaj komercaĵoj kompensis la elspezojn por ekipaĵoj en kompletoj, teknikaj materialoj kaj alsendo de specialistoj, kiujn Sovetunio enskribis en nia konto antaŭ la jaro 1960; kaj samtempe nia registaro konstante plenumis la devon pri regula pagado de niaj ŝuldoj laŭ la koncernaj interkonsentoj de ambaŭ landoj kaj en la komenco de 1965, nia lando fariĝis tute kvita de la pasintaj ŝuldoj al Sovetunio.

Nun, la nova Ĉinio fariĝis lando sen ajna ŝuldo al fremda lando. Post 16-jara konstruado, nia lando ne nur transformis la dependan ekonomion antaŭ la Liberiĝo en la nunan sendependan, tute finis la epokon de humiliĝoj kiam la malnova Ĉinio estis subjugita de aliaj, sed ankaŭ rimarkinde ŝanĝis la malriĉan kaj postiĝintan fizionomion de la pasinteco kaj metis firman bazon por konstrui naciekonomian sistemon sendependan, integran kaj modernan. La praktiko de la nova Ĉinio elokvente demonstris, ke se nur oni persistas efektivigi la orientilon de sinapogo sur la propraj fortoj, diligenta kaj ŝparema konstruo de sia lando, sed ne solflanke sin apogas sur la tiel nomataj "helpoj" de imperiismo kaj ĝiaj sekvantoj, oni povas vidi sian landon ĉiam pli prosperiĝanta en konstruado. Tio ĉi estas la ĝusta vojo larĝa kaj ebena. La ĉina popolo decidis penadi por akiri novajn kaj pli grandajn venkojn sur la vojo de la socialisma konstruado dum la periodo de la Tria Kvinjara Plano, pli alte tenante sian brilan standardon de "sinapogo sur la propraj fortoj, kaj energia strebo al prosperiĝo".

GIE DAJ:

La Fera Homo de Daking

EN nia lando, ĉiuj scias, ke en Daking-petrolkampo troviĝas heroa laboristo nomata Fera Homo Vang. Fera Homo ne estas lia propra nomo, sed glora titolo kiun li ricevis post kiam li venis tien. Tiu titolo naskiĝis jene: En la ekkonstrua periodo de Daking-petrolkampo, tiu heroo laboris kiel estro de iu putobora grupo. Gvidante la tutan grupon, li penlaboradis ĉe la putejo, kaj ne forlasis la laborejon dum kelkaj sinsekvaj tagnoktoj eĉ dum manĝado kaj dormo. La maljunulino, ĉe kiu li loĝis, diris emocie: "Fera homo li ja estas!" Pli poste li ankoraŭ faris multe da heroaĵoj en laborado, kaj la nomo "Fera Homo" ĉiam pli famiĝis, eĉ pli ol lia propra nomo "Ginhi".

POR GLORIGI LA ĈINAN POPOLON

En sia sesa jaro, Fera Homo Vang jam komencis almozpeti kondukante sian blindan patron per bastono. En 1938, kiam fondiĝis la Jumen-a Petrolminejo, li estis tuj forkaptita kiel devigita laboristo kaj laboradis tie pli ol



La Fera Homo Vang Ginhi



La Fera Homo manipulanta la bormaŝinon

dek jarojn. Post la Liberiĝo, li fariĝis vicdirektanto de borilo. Dank' al la edukado de la Partio, rapide altiĝis lia klasa konscio. Post nelonge li fariĝis estro de putobora grupo kaj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. La putobora grupo de li gvidata laboris tre emnente kaj famiĝis tra la tuta lando, kaj li ĉeestis, kiel reprezentanto, la Kunvenon de Tutlandaj Elituloj en Pekino, 1959.

En Pekino, vidinte busojn funkciigatajn per gaso pro manko de benzino, li ĉagreniĝis kaj por la ŝtato kaj por si mem — petrollaboristo. Kaj ĝuste en tiu kunveno, li informiĝis pri bona novaĵo, ke nova granda petrolkampo — Daking-petrolkampo — estas trovita en la lando. Kiel ĝoja li estis! Kaj li tuj petis la gvidantaron de la Ministrejo de Petrolindustrio permesi lin labori en la nova petrolkampo. Li diris: “Imperiistoj malice babilaĉas, ke al nia lando mankas riĉfonto de petrolo, ni nepre ilin refutos per sukcesa ekspluato de tiu ĉi petrolkampo!”

En 1960, la gvidantaro konsentis lin transpostenigi al Daking-petrolkampo, kaj li ekveturis kun siaj kunlaborantoj. Survoje, li organizis la kamaradojn studi du artikolojn de Prezidanto Maŭ: “Servu al la Popolo” kaj “Montotranslokigo de Malsaĝa Avo”, kaj ili

diskutis, por kio ili ekspluatos Daking-petrolkamon. Iuj diris: “Por akiri petrolon!” Fera Homo Vang sekvis: “La diro estas prava, sed ne tute. Ni tion faros por revolucio! Imperiistoj k. s. intencas nin strangoli per nelivero de petrolo, ni nepre devas konkleri la grandan petrolkamon por ŝanĝi la postigintecan de nia petrolindustrio kaj glorigi la ĉinan popolon.”

MARŜI RENKONTE AL LA MALFACILOJ

Atinginte la cellokon, Fera Homo Vang kun siaj kolegoj ekvidis nur senliman dezertecan stepon. Tiam iu demandis: “Ĉu oni povas bori putojn en tia loko plene kovrita de glacio kaj neĝo?” La Fera Homo respondis: “Jes! Malfavoraj estas la naturaj kondiĉoj, tamen petrolo estas urĝe bezonata. Ni neniel povas retropaŝi antaŭ malfaciloj.”

Baldaŭ poste bormaŝino estis alportita per vagono. Sed ne estis sufiĉaj arganoj. Kiel oni povas elvagonigi la pli ol 60-tunan maŝinon kaj ĝin transporti al la putejo por instali? Iu kolego diris: “Ni ja povas ĝin movi al putejo eĉ per la manoj kaj ŝultroj!” Tion aŭdinte, la Fera Homo diris: “Prave! Ni devas tuj agi, sed ne atendi. Ne nur sub favoraj kondiĉoj ni devas marŝi; se tiaj kondiĉoj mankas, ni devas tion krei por marŝi antaŭen.” Kaj la vortojn tuj sekvis ago. Ili, ĉirkaŭ 30 homoj, laboris energie kaj entuziasme tutan tagon per ŝnuroj kaj leviloj, kaj elvagonigis la bormaŝinon. Poste ili sukcesis instali ĝin kaj starigi la putarganon altan je pli ol 40 metroj sur la dezerta stepego dum tri tagnoktoj.

Post streĉa laborado, matene de la 14-a de aprilo la bormaŝino jam estis preta por eklabori, sed ekfunkcii ĝi ne povis pro manko de akvo, ĉar la akvokonduka linio ankoraŭ ne estis en ordo. Kion fari? Ĉu atendi pretiĝon de la akvokonduka linio aŭ klopodi iel funkciigi la bormaŝinon pli frue? La tuta grupo de Fera Homo Vang unuanime opiniis: Ni nepre ne atendu. Se mankas akvo, tion ni alportu per la manoj.

Do ili tuj komencis portadi akvon per bareloj, siteloj kaj eĉ lavopelvoĵoj, kaj fine la bormaŝino ekfunkciis.

Sed ĝuste en tiu tempo, la borilo trafis sen-cirkuligan zonon, kaj la enverŝita akvo estis

forsorbita de ĝi tuj post sia enfluo. Pli multe da akvo estis bezonata. La grupanoj diris firmdecide: "Ni portos kiom ajn forfluos!" Kiam la akvo en la apuda puto estis elĉerpita, ili ekportis akvon el laĝeto pli ol unu li-on fora, disrompinte ĝian glacian surfacon. Tiamaniere, ili portis multajn tunojn da akvo per bareloj, siteloj kaj lavopelvoĵoj. Fine ili venkis la sen-cirkuligan zonon kaj sukcese daŭrigis la boradon.

EN KRIZA MOMENTO

En tre mallonga tempo, ili jam sukcese plenumis la boradon de la unua petrolputo. Ili ne nur kreis la plej altan rekordon de putobora rapideco en sia tempo, sed ankaŭ atingis bonegan kvaliton. La komandejo de la petrolkampo decidis okazigi kunvenon je la Unua de Majo por alvoki ĉiujn lerni la Feran Homon kaj lian grupon. Sed ĝuste en tiu tempo okazis akcidento.

Je la ektagiĝo de la 1-a de majo, kiam Fera Homo Vang direktis siajn grupanojn demeti la putarganon, abrupte iu borstango vundis lin je la kruro, kaj li tuj svenis. Kiam li rekonsciiĝis, freŝa sango jam ruĝigis liajn pantalonon, ŝuon

kaj ŝtrumpon. Sed spite al la doloro li daŭrigis la direktadon.

Pro la vundo, Fera Homo Vang estis sendita en hospitalon. Sed li ne povis tie restadi, kaj dufoje ŝteliris al la putejo. Dum borado de la dua puto, lia kruro ŝvelis serioze. Por eligi petrolon je la 1-a de junio, li ĝoje direktis la laboron kun lambastono, tuttage ĉe la putejo.

Iutage neatendite aperis antaŭsigno de putoŝpruco. Putoŝpruco estas abomeninda akcidento. Se oni ne tuj prenis preventan rimedon, do la petrolputo detruigis. En tiu kriza momento, Fera Homo Vang kun lambastono konsiliĝis kun la kamaradoj, kaj decidis malobligi putoŝprucon per miksaĵo de cemento kun tero pro manko de peza kristalo en tiu tempo. Kvankam ne mankis tie cemento kaj tero, tamen ne estis kirlilo. Tiam li tuj forĵetis la lambastonon, komandis la kamaradojn verŝi sakon post sako da cemento en la basenon de argila kaĉo kaj li mem sin ĵetis en la profundan basenon. Sekvante lin, ankaŭ la apudaj 7-8 laboristoj ensaltis en ĝin. Ili kirladis per fosiloj 3 tutajn horojn, kaj preventis la akcidenton per sia penlaboro. Kiam oni prenis la Feran Homon el la baseno, liaj kruroj jam ne povis stari, kaj liaj manoj havis multe da vezikoj pro mordo de la cemento.

La Fera Homo rakontas al laboristoj la historion de sia brigado.



ZORGI LA AMASON PLI OL SIN MEM

En 1961, Fera Homo Vang fariĝis estro de putobora brigado. En la jaro 1965 li eklaboris kiel vickomandanto de la putobora komandejo. Sed li ĉiam tenas en si la laboristan naturon, tuttage iradas de unu puto al alia, solvadas ĉeloke problemojn, kaj laboradas kune kun laboristoj, se li ne trovas problemon solvendan.

Fera Homo Vang vivas ŝpareme kaj modeste, sed li prizorgas la kamaradojn ĝis ĉiu eta afero. Li diris: "Ni ne povas forgesi du aferojn: unue lerni la verkojn de Prezidanto Maŭ, due prizorgi la klasajn fratojn."

Fariĝinte vickomandanto, Fera Homo Vang prenas ĉion sub sian zorgon. Ĉu laboristfamiliaj loĝejoj estas sufiĉe varmaj, kiam la vetero malvarmiĝis? Ĉu la familianoj de laboristoj povas aŭdi radioelsendon aŭ ne, kiam ili studas aktualan situacion? Ĉu la veturiloj por laboristoj startas akurate aŭ ne? Kiel iras la postlabora amuza aktivado de laboristoj? Ĉu jam organiziĝis postlabora dramluda trupo?... Nekalkuleblajn problemojn li prenas sub sian zorgon, kaj li klopodas ilin solvi. Kaj la laboristoj ĉiuj volas konsiliĝi kun li pri diversaj aferoj. Li fariĝis vera korsciulo de amasoj.

Fera Homo Vang ne nur zorgas pri la vivo de la kamaradoj, sed ankoraŭ pli multe pri ilia progreso. La laboristo, kiu, ĵus atinginte la petrolkampon, demandis, ĉu oni povos tie bori putojn, fariĝis jam elitulo de la putogrupo dank' al lia ofta helpado.

AGI LAŬ LA INSTRUO DE PREZIDANTO MAŬ

Oni diras, ke ĉe Fera Homo Vang estas miraklofarilo t. e. la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*.

Jes, ĝuste tiu ĉi trezoro ĉiam plenigas lin per revolucia spirito kaj kuraĝigas lin marŝi antaŭen spite al malfacilaĵoj.

Malalta estas lia kultura nivelo, multe da vortoj por li estas ne konataj. Sed, spite al streĉa laborado kaj malfrua enlitiĝo, li ĉiam fruege ellitiĝas ĉiutage por iom legi el verkoj de Prezidanto Maŭ. Penege li sin klerigas por studi liajn verkojn.

La celo, kun kiu Fera Homo Vang legas librojn de Prezidanto Maŭ, estas solvi proble-

mojn: helpi kamaradojn en progresado, konstante sin reformi en ideologio kaj venki la naturon!

Antaŭe la komandejo starigis normon, ke la oblikveco de puto ne devas superi 5 gradojn. En 1963 ĝi altigis la normon de oblikveco je 2 gradoj. Tiu ja estas alta normo en konstruado de petrolputo. Multaj rutinaj reguloj montras ke estas malfacile atingi tiun normon. Sed Fera Homo Vang kaj liaj kolegoj marŝis sur sia vojo, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "praktiki kaj repraktiki". Ili faris provojn kaj akumuladis spertojn. Kaj fine ili sukcesis krei la unuan rektan puton en la tuta tiama petrolkampo kun oblikveco de iom pli ol 2 gradoj. Poste, ili boris alian rektan puton kun oblikveco de nur duona grado. Kaj tuj sekve la tuta petrolkampo adoptis ilian metodon ĝenerale.

Dum la pasintaj ses jaroj, Fera Homo Vang pene studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, klopodis uzi lian penson en praktikado, kaj dank' al ĝia nutraĵo progresis senĉese kaj faris rimarkindan kontribuon en la konstruado de la petrolkampo.

PROVERBOJ DE AZIAJ KAJ AFRIKAJ LANDOJ

Koreaj:

- ☆Hundaĉo nepre ĉie bastonon renkontas.
- ☆Plej laŭte krias helpon la bruliginto mem.

Japanaj:

- ☆La lanternportanto nepre iru en la antaŭo.

Afrikaj:

- ☆La vero similas la sunon. Kiel manplato povus ĝin kovri?
- ☆Frenezulo sendube estas ankaŭ tiu kiu por frenezulo tamburas kaj dancas akompanante.
- ☆Kiu ŝutas polvon kontraŭ vento, la polvo falos en ties okulojn.
- ☆Leopardo kaj kapro neniel povas vivi en unu grupo.

Venko Apartenos al la Vjetnama Popolo

— Al Kamaradoj de VPEA

EN tiu ĉi kvietaj nokto de Ŝanhajo, kie ĵus flirtis printempaj neĝflokaj, mi aŭskultis la radio-informojn pri la venkoj en la Nordo kaj Sudo de Vjetnamio kaj ekscitiĝis mia koro. Mi rememoras la ekscitajn kaj signifoplenajn tagojn, kiujn mi pasigis en Vjetnamio, mi rememoras la multnombrajn karajn amikojn, kiujn mi renkontis tie kaj ne povas forgesi. Mi rememoras vin, estimatajn kamaradojn de VPEA, kaj elprenis la leterojn kaj fotojn kiujn vi alsendis, kaj legante la vortojn plenajn de amikeco, kaj rigardante al la intima vizaĝo de ĉiu kamarado, mia koro ree flugas al Hanojo, inter vin. Mi ankoraŭ memoras, ke kiam mi adiaŭis al miaj vjetnamaj amikoj antaŭ mia reveno al la patrolando, mi diris: “Nur kiam mi estas baldaŭ forlasonta vian landon, mi eksentas, kiom profundan senton mi havas por ĉi tiu frata lando, por ĝiaj belaj riveroj kaj montoj, heroa popolo kaj miaj karaj amikoj!” Tio estas elkoraj vortoj ne nur de mi sola, ja ĉiuj ĉinoj, senescepte, havas tian senton, ankaŭ la ĉinaj geesperantistoj firme subtenas la grandan batalon de la vjetnama popolo kaj staras por ĉiam kune kun vi.

Estimataj kamaradoj, plurfoje mi diris: Vjetnamio jam fariĝis heroa lando neforgesebla eĉ en

Samideano Bakin, ĉina verkisto, akompanata de komitatanoj de VPEA, vizitas la Hanojan Esperanto-klubojn, en la 23a-10-65.



sonĝoj por la popolo de la tuta mondo; kaj “vjetnamo” jam fariĝis glora kaj intima titolo. Via popolo gajnis amon kaj estimon de la monda popolo per la sentima heroeco, brava kaj malcedema batalvolo kaj senŝanceliĝa revolucia spirito, kaj per viaj brilaj venkoj en la rezista batalo kontraŭ la agresado de la usona imperiismo. Via popolo skribas nun senkompare heroan kaj noblan epopeon per sia sango, kaj starigis brilan ekzemplon por la pacamanta kaj por libero batalanta popolo de la tuta mondo. Tio, kion faris via popolo, ne nur celas efektiviĝi la unuiĝon de la patrio kaj defendi la sanktan suverenecon kaj la socialisman konstruadon de la Nordo, sed ankaŭ defendi la pacon en Hindaĉinio kaj en la tuta mondo.

En norda Vjetnamio, mi vizitis 9 provincojn, municipojn kaj specialajn distriktojn, kaj havis kontaktojn kun vjetnamaj kamaradoj de diversaj rondoj. Mia unua impresio estis ke la vjetnamoj amas pacon. Ĉiu ajn el ili estas, ĉu blankhara maljunulo aŭ saltema infano, ĉu mezaĝa kadro aŭ juna milicianino, ĉu terkulturisto aŭ ŝoforo, ĉu membro de junula brigado kun pakajo surdorse iranta por konstrui la montregionon aŭ juna laboristo kun pafilo en unu mano kaj martelo en la alia, ĉiu same egale amas la vivon, laboron kaj sian patrolandon kun ĝia socialisma konstruado. Ili ne timas malfacilojn, estas optimismaj kaj gajaj, ĉiam kun ridetoj sur la vizaĝo kaj plena memfido por la estonto. Via popolo neniam sin trudis en la vivon de aliaj, neniam iris alilanden por mortigi homojn, bruligi domojn kaj fari ekspluatadon kaj prirabadon. Sed la usona prezidanto Johnson, sub masko de “paco” forsendis trupojn el 200,000 armeanoj al 8000 mejlojn fora lando por disŝuti venenajn kemiaĵojn, disŝpruci venengason, ne nur buĉi homojn kaj bruligi domojn, sed eĉ distranĉi la ventron kaj elŝiri la koron de homoj. Ĉar via popolo amas pacon, tial vi sendomaĝe oferas ĉion por bati la agresantojn kaj defendi la pacon.

Mia alia impresio estis, ke la vjetnama popolo estas heroa kolektivo solida kiel rokego. Mi renkontis multajn gejunulojn en via lando, plej ofte, milicianinojn de 18 aŭ 19 jaroj, kiuj havas sveltajn korpojn,

belajn trajtojn kaj arĝentsonajn voĉojn, tamen ili ĉiuj povas, en grava momento, venki ĉiajn malfacilojn kaj plenumi ĉiujn taskojn, ili povas ŝultre porti municion de pli ol 90 kilogramoj, faligi usonajn jetojn per siaj fusiloj aŭ maŝinpafiloj, fari riparojn al pontoj kaj vojoj, kulturaj kampojn, transporti leterojn, aresti spionojn kaj kapti malamikajn soldatojn. Same kiel la novaj junaj kanonistoj, kiujn mi vidis sur batalpozicioj de kontraŭaviadilaj kanonoj, ĉiuj ili ankoraŭ portas rimarkeblajn trajtojn de infanoj en siaj mienoj, voĉoj kaj agoj. Sed en la intensa batalado kaj penigaj laboroj, ĉiu el ili havas la firman volon oferi sian vivon por la patrolando, por la popolo kaj por venko. En la junula sturma brigado konstruanta la montregionon, kiun mi vizitis, mil kelkcent gejunuloj kiuj neniam antaŭe konis unu alian, kunvivis harmonie kaj laboris diligente en primitiva arbaro por konstrui levpontojn kaj vojojn. En la komenco ili ne scipovis kiel fari, sed iom post iom ili fariĝis lertaj en sia laboro, kaj en la mallonga tempo de nur unu monato, ili jam atingis nemalgrandan sukceson. Mi estis iam en Vinh Linh, ankaŭ en Djen Bjen Fu kaj Hon Gai. Tiam usonaj aeroplanoj senĉese bombadis la trafikliniojn en la Nordo de Vjetnamio, kaj aŭtunnokte nebulo vualis la montregionon abundan je akvo, kaj kiam nia ĵipo travadis malprofundan riveron, kies ponto estis detruita, oni devis markigi la vojon per la lumoj de flamantaj torĉoj en la rivero kaj sur la kontraŭa bordo, kaj la homoj alte tenantaj la torĉojn estis junaj milicianoj. Kiam mi reiris de la 17-a latitudo al Hanojo, la ŝoseo estis ĵus bombodetruita, sed post nur kelkaj horoj, niaj aŭtoj jam denove trakuris ĝin tute glate, dank' al la laboro de multaj homoj kiuj kune plenigis la bombokavegojn en granda rapideco. Iun lunan nokton, mi suriris monton por gastigi ĉe kontraŭaviadila pozicio, kie mi konatiĝis kun multe da junaj milicianoj. Tiam ne estis alarmo, kaj ni ĝoje interbabilis por pli ol unu horo, rompante la silenton sur la monto per senĉesaj ridoj. Parolante pri sia heroaĵo, iu juna kanonisto de merito diris kun ekscitiĝo: "Ni vivas en la sino de la popolo kaj volonte mi min oferos eĉ je frakasiĝo de la ostoj por ĝiaj interesoj." Li eldiris la veran senton de ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la tuta armeo. En la Nordo de Vjetnamio, oni jam faligis pli ol 800 usonajn aviadilojn, plejparte de kiuj estis faligitaj de la kontraŭaviadilaj kanonistoj. Tamen tiom grandajn sukcesojn ili ne povus akiri sen la helpo de la milicianoj en transportado, frotpurigado kaj transdonado de kartoĉegoj, medicina helpo al vunditoj, kaj eĉ batalado kiel kanonistoj, sen la helpo de maljunuloj kaj infanoj en kamuflado al la pozicioj, alportado de trinkakvo kaj manĝo, konstruado de fortikaĵoj. Kaj oni ofte vidis diversajn truojn sur la flugiloj de

faligitaj aviadiloj, kio ĝuste montris ke la venko estis gajnita dank' al la kuna batalado de la armeanoj kaj popolanoj. Ofte kun fiera sento la vjetnamaj amikoj rakontis pri la senprecedence firma unuiĝo de sia tuta popolo, tio ja estas afero vere priferinda. Ĉiu ajn kiu vizitis Vjetnamion komprenas, ke la batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usonaj agresantoj por savi la patrolandon estas popola milito partoprenata de la tuta popolo, kaj ĉiu vjetnamo fariĝis heroo elprovita dum la milito.

Estimataj kamaradoj, mi vere deziras verki centojn da artikoloj pri la frateco de la vjetnama popolo al siaj ĉinaj kamaradoj. Tia amikeco de kunbatalantoj interdependantaj kiel la lipoj kun la dentoj, kaj kundividantaj la saman sorton de vivo aŭ morto ofte nin emociis tiel, ke kun larmoj ni forte premis la manojn unu al alia kaj babilis pri travivaĵoj kaj sentoj dum la ŝultro-ĉe-ŝultro batalado kaj reciproka subtenado. Kiam mi vojaĝis en diversaj lokoj en Vjetnamio, ofte okazis ke mi haltis survoje kaj en profunda nokto frapis sur la pordo de kamparana familio por tranokti ĉe ĝi, aŭ en pluva nokto mi supreniris en la domon sur altaj piedoj de taj-naciano en la montregiono por ripozo, kaj la mastroj ĉiam akceptis min kun intimeco kaj fervoro kvazaŭ sian fraton, kiu revenis el vojaĝo de malproksime; ili faris seninterrompe demandojn pri tio kaj tio, kaj en iliaj vortoj kaj ridetoj montriĝis granda zorgo. Prenu kiel ekzemplon la akcepton kiun vi faris al mi, kvankam ni la unuan fojon intervidiĝis, tamen viaj manpremoj kaj salutoj igis min senti, ke mi estas inter miaj plej intimaj amikoj. Kvankam nia renkontiĝo daŭris nur unu horon, dum kiu ni ne povis elverŝi multon el niaj koroj, tamen ni jam komprenis unu la alian. Ne nur pro tio, ke ni havas la komunajn idealon kaj aferon, kaj ke mi bone scias viajn laborojn kaj havas por vi grandan estimon, sed ankaŭ pro tio, ke mi kontaktis viajn varmajn korojn. Same kiel aliaj vjetnamaj kamaradoj, ĉiu el vi havas la sindonemon oferi ĉion por la socialisma konstruado de Vjetnamio kaj la firmvolon konduki ĝisfine la grandan batalon kontraŭ Usono por savi la patrion. Mi aŭskultis vian konigadon, legis la librojn kiujn vi tradukis kaj eldonis, kaj vizitis la Esperanto-Klubon kiun vi establis, mi estis kortuŝita, ekscitita kaj ĝojigita pro tio, ke vi nur kelkaj personoj faris tamen tiom multe da laboroj, kaj rikoltis tiom grandajn sukcesojn, kio por mi estas ankaŭ tre granda instigo. Ni sentas nin fieraj, ke ni ĉinaj esperantistoj povas batali ŝultro-ĉe-ŝultre kaj antaŭenmarŝi brak-en-brake kun vi.

Karaj kamaradoj, tiun saman tagon en kiu mi iris al vi por la neforgesebla renkontiĝo, en mia hotelo mi unue akceptis k-dinon Tran Thi Ly,

Nia Neforgesebla Renkontiĝo kun la Ĉina Verkisto Ba Kim

LA varma akceptado de la Centra Komitato de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio al samideano Ba Kim, en la posttagmezo de la 23a-10-65, estis neforgesebla evento en la vivo de VPEA. Ja delonge ni sciis, ke la famkonata ĉina verkisto kune kun Lusin vigle subtenadis la progreseman Esp-movadon sub la reakcia reĝimo de Ĉiang Kajŝek. Hodiaŭ li venis al ni kiel amiko kaj samideano simbolanta la amon kaj subtenon de la ĉinaj geesperantistoj al la vjetnamaj gefratoj.

En tre intima atmosfero okazis la interparolado. Per korvarmaj vortoj la reprezentantoj de VPEA bonvenigis la grandan gaston, kaj speciale gratulis lin pro liaj ĉirkaŭ 40 jaroj de fideleco al esperantismo. Ĉi-okaze ni esprimis nian profundan dankon al la ĉinaj geesperantistoj kaj al ilia glora organizaĵo — Ĉina Esperanto-Ligo — pro ilia vigla subtenado al la agadoj de VPEA, samtempe al la justa batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo.

Samideano Ba Kim, kies blanka hararo kaj intima simpleco plenigis nin de amo kaj estimo,

sciigis nin pri la entuziasmigaj novaj atingoj de la ĉina Esperanto-movado. Ja, la enkonduko de Esperanto en la ĉinaj universitatoj kaj la Pekina Radio estas gravaj antaŭenpaŝoj de nia komuna movado. Samideano Ba Kim esprimis sian plenan fidon je la estonto de Esperanto en la socialismaj landoj kaj en la tuta mondo, kaj je ĝia ĉiam kreskanta rolo sur la kultura kaj socia kampoj.

Sekve, samideano Ba Kim vizitis la Esperanto-Klubejon de Hanojo, kie li vidis eksponitajn i. a. la grandvalorajn Esp-eldonaĵojn de la frata lando Ĉina Popola Respubliko, kaj kie li permesis komunan fotadon memore al lia persona vizito. Laŭ nia peto, li ankaŭ postlasis sian aŭtografian dediĉon en la Ora Libro de VPEA.

Nia amikeca renkontiĝo kun samideano Ba Kim kontribuis plifirmigi la amikecon kaj solidarecon inter ambaŭlandaj esperantistaroj, krome ĝi stimulis nin pli bone apliki Esperanton por servi la liberigon de la popoloj, la socialismon kaj la mondpacon.

DAO ANH KHA, Vjetnamio


18-jaran milicaninon el Quang Binh provinco. Revenante de Son La provinco, ŝi haltis en Hanojo. Antaŭ kelkaj tagoj ŝi rapidis al Hanojo kiel membro de la delegacio el Quang Binh spite al bombado de malamikaj aviadiloj. Ni sidigis en iu restoracio en hela lampolumo antaŭ vaporantaj manĝaĵoj, kaj ŝi diris: "Tiu ĉi estas nia unua manĝo en la ĉefurbo, tamen kun rizbovlo en la manoj, ĉiuj povas nenion engluti pro ekscitiĝo. Vidante ke nia ĉefurbo estas brila de lampolumoj, des pli bone ni komprenas la signifon de nia batalo en la hejmloko. Ni batalas ĝuste por defendi nian socialisman ĉefurbon, kaj pro tio ni sentas nin fieraj, kiom ajn ni devas pagi por tio, ni ja volonte tiom pagos!" Kiel bone parolis la knabino kun tiom da infana tono! Precipe en la lasta frazo ŝi eldiris la senton de ĉiuj vjetnamaj kamaradoj, inter kiuj kompreneble ankaŭ estas vi. La vjetnama popolo havanta tian senton certe venkos ĉiajn malfacilojn, ĉiujn malamikojn kaj plenumi ĉiujn siajn taskojn, kaj la bela lando de Vjetnamio restos por ĉiam bela kaj brila! Karaj kaj estimataj kamaradoj, ĉe la fino de mia dankletero, mi diru ankoraŭfoje: Venko apartenos al vi, al la heroa popolo de Vjetnamio!

la 28-an de jan., 1966

Vivu la amikeco inter
Ĉinaj kaj Vjetnamaj esperantistoj!

1965年10月23日下午四时访问
越南世界语协会(VPEA),受到
同志们热情的接待借用上面一句
话表示我感谢之情。

巴金 (Ba. Kim)



Ĉefkomitatano Ĝu De (la kvina de maldekstre, fronte) kaj aliaj gvidantoj starantaj sur la podio kun eksterlandaj geamikoj el kvin kontinentoj

Subteno al la Batalo kontraŭ la Agresa Milito de

EN la du tagoj de la 25-a kaj 26-a de marto, ĉijare, la usona popolo refoje faris justan batalon kontraŭ la agresa milito de la usona imperiismo en Vjetnamio, postulante la Johnson-registaron tuj retiri el Vjetnamio la agresan armeon de Usono. La granda manifestacio, kiun partoprenis 100,000 popolanoj en la unua granda urbo Novjorko, la 26an de marto, estis la kulmino de la protestado kontraŭ la agresado en Vjetnamio, kiu involvis tiutempe la tutan Usonon. Miloj kaj dekmiloj da usonaj popolanoj en la ĉefurbo Vaŝingtono, Ĉikago, Berkeley, San-Francisko, Los-Anĝelo k. a., sume pli ol cent urboj, kriis indigne: “Tuj ĉesigu la agresan militon kontraŭ Vjetnamio!”, “Ĉesigu la hombuĉadon!”, “Johnson, Johnson, kiom da infanoj vi mortigis hodiaŭ!”

La kontraŭ-agresa protestado ĉifoje leviĝanta en diversaj lokoj en Usono trovis subtenon kaj eĥon ĉe la popoloj tra la tuta mondo. En Francio, Anglio, Italio, Okcidenta Germanio kaj aliaj eŭropaj landoj kaj en Aŭstralio, Nov-zelando kaj aliaj, la popolamasoj okazigis unu post alia mitingojn kaj manifestaciojn por subteni la usonan popolon en ties justa luktado kaj riproĉi la inferajn krimagojn


de la agreso kontraŭ Vjetnamio fare de Johnson.

En Pekino, Ĉinio, popolanoj el diversaj rondo kaj geamikoj el pli ol 40 fremdlandoj, sume 16,000 personoj, kunvenis posttagmeze de la 27a de marto en la Pekina Laborista Sporthalo por subteni la popolon de Usono oponantan kontraŭ la agresado en Vjetnamio fare de la Johnson-registaro. En la kunveno regis etoso de unuiĝo kaj batalo.

Liaŭ Ĉengĝi, vicprezidanto de la Ĉina Packomitato, paroladis en la kunveno. Li diris ke la justa batalo de la usona popolo kontraŭ la agreso fare de la usona imperiismo en Vjetnamio jam atingis lastatempe novan alttadjon. Tio montris refoje ke en la problemo de Vjetnamio, la usona popolo staras ĉe la flanko de la vjetnama popolo, sed ne de la usona registaro.

Liaŭ Ĉengĝi diris, ke tio estas afero senprecedenca en la usona historio kaj estas tute nova fenomeno aperinta sur la horizonto de Usono, ke la vastaj usonaj popolamasoj leviĝas kontraŭ imperiismo de sia propra lando.

En sia parolado, Liaŭ Ĉengĝi kategorie deklaris ke, tute egale kian ajn friponan rimedon la usona imperiismo alprenos, la 650-miliona popolo de



La kunveno

de la Usona Popolo

Usona Imperiismo en Vjetnamio

Nia raportisto

Ĉinio absolute ne retiriĝos eĉ je unu paŝo de sia justa starpunkto de firma subteno al la batalo de la monda popolo kontraŭ la usona imperiismo! La ĉina popolo havas fieran volon subteni ĝisfine la vjetnaman popolon en ĝia batalo kontraŭ Usono por savi la patruon.

Liaŭ Ĉengĝi diris, ke la usona popolo certe pli konsciiĝos kaj ĝia batalo kontraŭ imperiismo de sia propra lando certe iros al nova, pli alta etapo. La granda popolo de Usono fine fariĝos la mastro de sia propra lando. Tio estas la neevitebla tendenco de la historia disvolviĝo, haltigebla de neniu ajn forto.

Post li parolis naŭ alilandaj amikoj. Ili estis reprezentantoj de la popoloj de Usono kaj Vjetnamio kaj geamikoj el la kvin kontinentoj. Ili samvoĉe akklamis la disvolviĝon de la revolucia luktado de la popoloj de Usono kaj la mondo, montrante ke mondskala, nova revolucia ŝtormo kontraŭ la usona imperiismo estas nun leviĝanta. La popolo de Vjetnamio certe triumfos kaj la usona imperiismo certe malvenkos. La granda popolo de Usono certe fariĝos fine la mastro de sia propra lando.

100,000 personoj el la Novjorka publiko manifestaciis la 26-an de marto kontraŭ la agresado en Vjetnamio.





ANNA LOUISE STRONG:

Kial Mi Ŝatas Loĝi en Pekino je la Aĝo de 80?

*(Letero Sendita al Kolegia Klasa Reunuiĝo,
Oberlin Kolegio, Junio 1965)*

Karaj kolegoj de 1905,

Se ekfroto sur la lampo de Aladdin aŭ magia tapiŝo povus starigi min inter vin kaj poste revenigi min al Pekino, vi vidus min tuj materie. Sed la stultaj reguloj de la Ŝtata Departemento de Usono eble malhelpus mian revenon. Pro tio ke mi ne povas ĝui ambaŭ lokojn laŭvice, mi elektas Pekinon. Ĉu vi volas scii la kialon?

Estas kaŭzoj laŭ ĉiuj aĝoj. Mi povus skribi libron pri ili, sed eble vi ne volus ĝin legi. Mi ne

komencos skribi pri ĉinaj infanoj, kvankam ili estas la plej sanaj, feliĉaj kaj bonkonduktaj en la mondo. Mi nur skribos pri la kaŭzoj konvenaj por la aĝuloj de 80 kaj pli multaj jaroj, kiaj tiuj de nia klaso. Kion specialan Ĉinio oferas al la aĝuloj?

- 1) Ĉinio donas al ni specialan respekton kaj privilegiojn.
- 2) Ĉinio donas al ni ŝancon de nova kariero.
- 3) Ĉinio donas pli bonan tipon de "emeriteco".

4) Ĉinio pliigas mian esperon de vivo. Ĉu tio ĉi interesas vin je la aĝo de 80? Daŭrigu la legadon!

1) Aĝuloj en Usono ricevas tre malmulte da privilegioj.

Mi ne povas esperi eĉ pri ricevo de sidloko en homplena subtera veturilo; ĉar la moderna kavaliro ofertas ĝin al junulinoj. Sed en Pekino se mi nur eniras en trole-buson, oni tuj vokas: "Cedu sidlokon al la maljuna sinjorino." Se mi protestas ke mi nur volas promeni tra la buso kaj eliros je la sekvanta haltejo, la ĝentileco de jarcentoj min venkas. Kun dankoj mi okupas la plej bonan sidlokon kaj kiam la buso haltas, la motoristo zorge ĝin tenas senmova, kaj samtempe la pasaĝeroj helpas min elbusiĝi.

Eble mi vizitas operan teatron per aŭtomobilo, kaj la teatro estas en homplena loko, kien la aŭto ne estas permesataj veturi. Ili devas halti en alia loko, kaj oni devas piediri. Sed ne mi! Mia ŝoforo krias: "Maljuna Sinjorino". La trafika policano svingas la manon, kaj ni veturas antaŭen ĝis la pordo, kie pedelo prenas mian brakon por eskorti min. La aŭto foriras por atendi kaj revenas kiam mi ĝin bezonas.

Tio ĉi ne estas privilegioj por eksterlandanoj sed por aĝuloj. Iu ĉina maljunulino, kiu vizitis mian amikino, veturis en triciklo kaj alvenis al du stratoj homplenaj pro granda parad-marŝo, trans kiujn nek aŭtoj nek piedirantoj estis permesataj iri. Ŝi klarigis al la trafika policano. Li helpis ŝin transiri, kiel maljunan sinjorino volantan viziti sian amikino. Tia respekto al aĝuloj estas parto de la ĉina vivmaniero.

2) En Usono la laboristoj en multaj fabrikoj estas eljetitaj je la aĝo de 45; mensaj laborantoj "emeritiĝas" je 65. Kiu povas esperi komencon de nova kariero post 50? En Los Angeles mia kreado praktike ĉesis je 70, parte ĉar neniu eldonisto akceptis mian verkon — tio afliktas ĉiujn progresemajn verkistojn, parte ŝajnis al mi ke estas ne multe por priskribi en Los Angeles. Sed ankaŭ tial ke energio malvigligiĝis, ĉar grandparto de ĝi konsumiĝis por la bagatelaĵoj de la vivo. Mia vivo ne estis nekomforta, male, mi jam ŝparis sufiĉe por esti certa ke mi havas adekvate modestan enspezon por min vivteni. En la urbo mi havis domon, en la montaro someran kabanon, en la dezerto vintran kabanon, kaj aŭton por veturi ĉien. Sed mi certe ne povis elporti la elspezon por tuttaga laboranto por kuirado, purigo kaj stenografala laboro. Dum la tempo mi veturis per mia aŭto al la vendejo, aĉetis manĝaĵojn kaj portis ilin hejmen, kuiris ilin kaj lavis la pladojn kaj unu fojon ĉiusemajne mi envokis purigistinojn kaj post ŝia

foriro mi devis ordigi la ĉambron, mi jam tute elĉerpis mian energion.

Kaj la verkado kaj la societa vivo suferis. Miaj amikoj dise loĝis kaj mi devis ilin atingi per aŭto. Se mi skribis tutmatene, mi jam estis tro laca por riske veturi sur la homplena stratego malfrue en la posttagmezo, aŭ por prepari vespermanĝon por miaj gastoj. Mi enlitiĝis sufiĉe solece. Mi sciis ke tiu ĉi stato pli malboniĝos. Mi sciis ke en la venonta fojo kiam mi ricevos ekzamenon por licenco de ŝoforo, eble oni rifuzos min pro mia malforta vidpovo kaj malrapidaj refleksoj. Mi devos iel vivi sen aŭto. Mi sciis la vivmanieron, kiun mi preferis, la manieron en kiu mi vivis en Hull House, Chicago, sur Henry strato, Nov-jorko, aŭ kun Amika Servo en Pollando, la manieron en kiu la bagatelaĵoj de vivo, manĝaĵoj kaj loĝejo estis aranĝitaj de simpatia grupo sen mia persona atento, kaj kie mi estis libera por mia propra laboro, sed en la medio kie mi povas facile renkonti simpatiulojn. Vane mi serĉis tian socian centron en Los Angeles; mi eĉ provis krei tian centron. Mi trovis ĝin en Pekino.

En Pekino mi havas apartamenton de tri ĉambroj en la domaro de la Ĉina Pac-komitato, kun granda korto plena de arboj kun multaj konstruaĵoj, kie loĝas ĉirkaŭ kvindek ĉinoj kaj kvin eksterlandanoj, unu el ĉiu kontinento. Ĉiuj havas komunan intereson en la problemoj de monda paco, sed ĉiu havas sian propran laboron kaj sian propran loĝejon. Kuirado, purigo kaj ĝarden-zorgo estas faritaj de la organizo, sekve ne nur miaj manĝaĵoj kaj bonordo de mia apartamento estas prizorgataj, sed la ĝardenisto ankaŭ havigas florojn al miaj ĉambroj tutjare, kaj mi eĉ havas aŭton por veturi doninte antaŭan sciigon. La bagatelaĵoj de vivo estas aranĝitaj. Sur tiu ĉi bazo mia verkado kaj socia vivo floras.

Pekino estas brilega ĉefurbo en la mondo, kaj antikva kaj moderna. Diplomatoj kaj delegacioj el sepdek ĝis okdek landoj venas kaj foriras. Bankedoj de ĉiuj specoj ofte okazas, kaj intimaj bankedoj en hejmo kaj grandaj bankedoj de 5,000 personoj en la granda Popola Halo. Mi ricevas tiel multajn invitojn kiel mi volas. Unu aŭ du fojoj de tiaj publikaj aferoj en unu monato por mi estas jam sufiĉaj; mi malemus, se mi devus partopreni la bankedojn ĉiuvespere, kiel Ĝoŭ Enlaj. Mi elektas la landojn, kiuj min interesas; kaj nun Vjetnamion. Mi ankaŭ aranĝas tagordon por diversaj usonaj amikoj en Pekino aŭ tagmanĝi aŭ vespermanĝi kun mi je malsamaj tagoj. Mi faras kvar vojaĝojn tra Ĉinio ĉiujare, en somero kaj vintro mi vizitas marbordon en la nordo aŭ en la sudo, kaj printempe kaj aŭtune iun novan regionon.

Havante tian oftan instigon de nova materialo sur la bazo de solida kaj riĉa socia vivo, mi povas skribi unu libron ĉiujare. En la unua jaro mi skribis pri la Popolaj Komunumoj; en la sekvanta jaro mi vizitis Tibeton — kiel la sola usonanino kiu iam en la historio vidis Lhasa-n. Neniu usona eldonisto volis mian produkton, sed ĝin eldonis Pekino kaj tradukoj aperis en Tokio, Berlino kaj Indonezio. Mi vizitis Indoĉinion kaj skribis unu libron pri Laoso. Post tio mi komencis skribi “Leteron el Ĉinio”, novaĵo-letero ĉirkaŭ dek fojoj en ĉiu jaro. Pli ol dekmil ekzempleroj en la angla lingvo sendiĝas al Britio, Aŭstralio, Novzelando kaj aliaj anglalingve parolantaj landoj, sed tre malmultaj al Usono pro malfaciloj en poŝta transsendo. Nun tiu ĉi eldonaĵo aperas ankaŭ en ses aliaj lingvoj sur kvin kontinentoj. La leteroj kolektitaj, aperis en libra formo, la unua deko da leteroj en 1963, la dua deko en 1964 kaj eble la tria deko aperos ĉi-aŭtune. La totalo estos sep libroj, in-

kluzive du pri Tibeto. Mi pensas ke tio ĉi estas bona kariero komencita post la aĝo de 72!

3) En Los Angeles mi sciis ke mi devas baldaŭ serĉi lokon por vivi emerite. Certe tuj kiam mi ne plu povis veturigi aŭton, aŭ prizorgi miajn pliiĝantajn bezonojn. Mi scias ke en Usono la plej bona loko por emerita vivo estas en unu el tiaj loĝejoj por maljunuloj sub la administrado de iu preĝejo aŭ eduka grupo, kie homoj de similaj pensoj aĉetas domon aŭ apartamenton por vivo, kaj havas komunan konstruaĵon, kie oni manĝas, okazigas lecion kaj ludas karton. Se vi povas trovi bonan lokon kaj grupon de simpatiuoj, tio ja ne estas malbona. Mi mem pensis pri la Sunsubira Halo, subtenata de Steve Fritchman’s Unitarian Church. Estas nur unu malbonaĵo; la loĝantoj ĉiuj estas maljunaj. Eble tio estas ankaŭ avantaĝo, tio signifas ke ili havas similajn bezonojn. Sed ili ĉiuj estas alproksimiĝantaj al morto. Ili jam eliĝis el la plena fluo de la vivo kaj estas metitaj sur breto.

Anna Louise Strong kune kun siaj geamikoj vizitas Jan-an.



Sendube, oni ankoraŭ povas havi interesojn, sed alia estas la tendenco.

La ĉina vivmaniero kunmiksas la generaciojn, konsiderante la bezonojn de ĉiuj. En nia korto de la Pac-komitato estas 50 plenaĝuloj kaj almenaŭ 50 infanoj, precipe je la semajnfino, kiam la infanoj en la infan-ĝardeno revenas hejmen. Ĉiuj tiuj infanoj nomas min "Avnjo". Kvar el ili ofte min vizitas. Du, precipe, la junaj filoj de mia sekretariino-interpretistino, 6- kaj 7-jaraj ofte estas en mia apartamento, faras transkapiĝon sur la tapiŝeto en mia salono kaj manĝas miajn dolĉajn kukojn. Ili neniam venas sen invito, kaj se mi laciĝas, ilia patrino ilin forsendas. Ĝi estas agrabla kontakto sen respondeco sed plena de espero, tenanta min en tuŝo kun la kreskanta vivo de Ĉinio. Mi komprenas kial la kamparaj komunumoj metas la Hejmojn por Maljunuloj proksime al la infan-ĝardenoj kaj vartejoj, tiel ke la gemaljunuloj, kiuj ne havas infanojn por ilin prizorgi, povas amuzi la infanojn de la vilaĝo per rakontoj kaj ili mem estu refreŝigitaj de la juna vivo, dum la efektiva fizika zorgo pri la infanoj estas farata de la pli junaj kaj edukitaj instruistoj. Mi opinias, ke tiu ĉi komunumo de generacioj estas pli vivplena ol la hejmoj por emerituloj en California.

4) Laste, mi pensas ke mia espero de vivo pliigiĝis pro loĝado en Ĉinio. Mi ne plene kredas la flatojn de amikoj, kiuj diras al mi, ke mi plijuniĝas jaron post jaro, kvankam mi scias ke alia virino, kiu venis el Usono antaŭ unu jaro ŝajnas nun pli juna. Mi memoris ke kiam mi alvenis al Pekino, mi min apogis per lambastono kaj poste mi ĝin forĵetis; ke mi estis ĉagrenita de elstaraj varikaj vejnoj, kiujn nun mi jam ne povas trovi; ke la akra artrito, kiun mi havis en miaj sesdekaj jaroj, malaperiĝis escepte de iometa malagrablo en muskolo dum malbona vetero. Pli grava por miaj amikoj, mi scias ke mia malbona humoro pliboniĝis. La ĉinoj renkontas ĝin, ne kun simila eksplodo, sed per tre miriga akcepto, kvazaŭ la malbonhumoro estas malforteco de aĝuloj; tiu ĉi trakto estas pli deteniva ol kiom vi povas imagi al vi.

Kiom de la pliboniĝo en sano kaj en karaktero estas atribuenda al Ĉinio mi neniel povas scii. Sed kuracisto diras al mi, ke mia vivespero ŝajnas plibona ol tiu antaŭ kelkaj jaroj. Parte, almenaŭ, ĝi devas deveni de la ekvilibra vivmaniero en Ĉinio, de kontakto kun socia vivo de granda vicleco kaj progreso, sur la bazo de memfido kaj aplombo.

5) Mi ankoraŭ esperas ke la Ŝtata Departemento kaj registaro de Usono ĝenerale eble ŝanĝos siajn rilatojn kun Ĉinio, antaŭ ol mi fariĝos tro maljuna por vojaĝo, tiel ke mi povu reveni al Usono por kelkaj Oberlin-aj rekuniĝoj kaj eĉ por lekcio en California ĉe la Unitarian Church de

Los Angeles. Nun la tendenco ŝajnas en alia direkto. La azena bombado de Johnson al norda Vjetnamio daŭre intensiĝas kaj moviĝas norden kaj eble ankoraŭ moviĝos en Ĉinion. Ĉirkaŭ kvar cent "gravaj avertoj" estis elsenditaj de Pekino dum la lastaj jaroj pri usonaj entrudoj en ĉiniajn teritoriajn aeron kaj akvojn; la senhomaj aeroplanoj, nomitaj "virabeloj", kiuj prenas spionajn fotojn, aperas tiel ofte super Ĉinio, ke kvin el ili estas faligitaj de post la lasta novembro, kaj tri estis ekspoziciataj en Pekino, kie mi vidis polanojn preterpasantajn por vidi ilin po 40,000 homoj ĉiutage. La unua armita enpenetro estis farita de ok usonaj aviadiloj super Hajnan-insulo, kiel pruvite de atestantoj en kvar gubernioj kaj ankaŭ de fotoj de pecoj de usona pafaĵo kaj usona brulaĵo, forĵetitaj sur kampoj de ĉina komunumo.

Ne nur tiuj okazintaĵoj estas maltrankviligaj, sed ankaŭ la publikigita komentario de Johnson, ke li persone direktas la bombadon al norda Vjetnamio ĝis la lasta dometo, ŝajne tro simile al la paranojulo kiu pretendas esti Dio. Sed Johnson ne estas ĉiopova; neniu registaro, ĉu freneza ĉu diktatora, agas en vakuo. La premado de la monda opinio devas esti konsiderata, precipe la usona opinio. Mi gratulas Oberlin ke la prezidanto de la Studentoj por Demokratia Socio, kiu sukcese efektiviĝis la grandiozan marŝon de la 17-a de aprilo, estis Paul Potter, antaŭnelonga diplomito de Oberlin. Se iuj kolegoj volas skribi al mi, mi tre volas scii kian parton Oberlin prenis en tiu marŝo kaj en similaj okazintaĵoj nun irantaj. Ĉar tiuj ĉi estas la natura sekvo de la granda historio de Oberlin, kun kiu Oberlin ne ĉiam tenis fidelecon, historio kiu batalis por la granda valoro de la homaro eĉ kontraŭ la reguloj de registaro.

Nur per tiaj movadoj nun en Usono, Usono evitos kontinuajn eksterlandajn militojn. Sed, se la malbona afero fariĝos la plej malbona, per nuklea bombado al Ĉinio, tiam, kiel mi skribis en Letero No. 29, mi preferus resti en Pekino ol en Usono, kiam bombado okazos. Mi pensas ke la popolo ĉitiea estas malpli nervoza. Ĝi helpas kompreni la justecon de via afero. La gvidantoj de Ĉinio estas pli aplombaj, ĉar antaŭ la homaro kaj antaŭ la historio, la kulpo estos sur Vaŝingtono. Esperante ke tio ĉi eble ne okazos,

Anna Louise Strong

(Iom mallongige tradukita de ĈEN ĜAŬJING)

Dek Jaroj De Fiŝista Vilaĝo



CAJ GUJCUN

LA Dongŝeng-a Fiŝkapta Brigado de Guantoŭ-a Popola Komunumo, Liangiang-gubernio, dum dek jaroj efektivigis fiŝkaptadon per motorvelŝipoj sinapogante sur la propraj fortoj kaj mastrumante sian aferon kun laboremo kaj ŝparemo, ŝanĝis la mizeran vivon de la fiŝistoj, kreis grandan riĉaĵon por la kolektivo kaj fariĝis ruĝa flago flirtanta ĉe la bordo de la Orienta Maro en Fugian-provinco.

DE RIVERO AL MARO

La Dongŝeng-a Brigado formas surakvan vilaĝon de fiŝkaptistoj. Ĝi troviĝas ĉe la norda bordo de interna haveno ĉe la enfluejo de Min-rivero. La pli ol 300 familioj de fiŝkaptistoj sin vivtenas dum generacioj per kaptado de malgrandaj fiŝoj kaj salikokoj remante la “hejmŝipojn” sur la rivero kaj interna maro. En 1956, sub la gvido de la Kompartio kaj Popola Registaro, ili suriris la kolektivajn vojon kaj nur tiam ili ekhavis la eblon brave iri de la rivero sur la vastan maron!

Por kapti fiŝojn en la maro ne taŭgas la “hejm-ŝipoj”, kiuj ne povas elteni ondfrapojn. Kaj la fiŝistoj decidis fari la entreprenon sin apogante sur la propraj fortoj, kun laboremo kaj ŝparemo. Per la komuna akumulaĵo kaj mono pruntedonita de la ŝtato ili konstruis novajn ŝipojn kaj riparis la malnovajn. Tiamaniere la Dongŝeng-a Brigado havis dek du disponeblajn grandajn velŝipojn. Mankis al ili grandaj fiŝretoj, kaj ili refaris, el dek du malnovaj retoj, ok grandajn retojn.

Aŭtune, kiam alies fiŝŝipoj veturis al la maro, ankaŭ la fiŝŝipoj de la Dongŝeng-a Brigado ekveturis malproksimen ilin sekvante al la Orient-Ĝegiang-a Fiŝejo. Vere multe diferencas la granda maro de la riveroj. Surmare ili ne konis la fluojn kaj ventojn, kaj ne spertis en direktado de la ŝipoj. Tial nelonge post la ekveturo ili postrestiĝis. Ili ne sciis, kie estas la fiŝejo sur la senlima maro. Iuj deprimiĝis kaj diris: “La apudmontaj bovoj povas sin nutri nur per herboj surmontaj. Prefere ni direktu la ŝipojn hejmen.” La gvidanta kadro

Lin Ĝenĝiang diris: "Ĉu nia Dongŝeng-a Brigado povas ĝisfunde liberiĝi, tio dependas de tio, ĉu ni kuraĝas veturi al la maro aŭ ne. Por la intereso de la popolanoj de nia tuta brigado, ni nepre ne direktu nin returnen eĉ se monto de glavoj kaj maro de fajro barus al ni la vojon!" Lia parolo firmigis la fidon de la kolegoj. La fiŝsipoj brave veturis antaŭen tra la ondegoj. Kaj ili fine atingis la celokon traveturinte la ok-tagan vojon en dek du tagoj. Dank' al diligenta lernado kaj ekzerco la fiŝistoj de la Dongŝeng-a Brigado akiris la kapablon koni akvokolorojn kaj trovi fiŝarojn. Kaj ili kreis la altproduktan rekordon de 18-foja rektuptado dum unu tagnokto kun rikolto de pli ol 5 tunoj da fiŝoj.

ĈIAM ANTAŬEN

La trezorejo de la maro malfermiĝis por la fiŝistoj de la Dongŝeng-a Brigado kaj ĉiam pli multiĝis ĝia enspezo jaron post jaro. En 1960, kiam la komunumanoj ricevis stakojn da bankbiletoj dum enspezdivido, ili ĉiuj ridis de ĝojo kaj interbabilis pri siaj intencoj. Iuj intencis aĉeti brakhorloĝon, iuj konstrui novan domon kaj aliaj aĉeti necesajojn por geedziĝo. Tiam, kompartiano Ĝiang Fuguan, gvidanta kadro de la brigado pensis: Nun ni havas kaj ŝipojn kaj fiŝretojn, krome al ĉiu laborforto de la brigado estas disdonitaj meznombro pli ol 900 juanoj. Estante gvidanto de la brigado, kompreneble mi tre ĝojas. Sed, kiel oni devas uzi la monon? Ĉu ĝin foruzi nur por plibonigi la vivon aŭ investi parton de ĝi por grandigo de la produktado kaj tiel krei kondiĉojn de estonta pli riĉa vivo? Ĝiang Fuguan pensis kaj pensadis, ke la kadroj devas gvidi la amason rigardi kaj marŝi antaŭen. Tial unue li konvinkis ĉiujn kompartianojn kaj poste ili kune mobilizis la komunumanojn serioze diskuti pri la rilatoj inter disvolvo de produkto kaj plibonigo de vivo, pri la interrilato de la nunaj kaj estontaj interesoj.

Post diskuto, la ideo rigardi kaj marŝi antaŭen estis tuj akceptita de la amaso.

En la kunveno ĉiuj aprobis investon al la kolektivo por konstrui motorajn velŝipojn kaj disvolvi la produktadon. Tiuj, kiuj intencis aĉeti brakhorloĝon, konstrui novan domon aŭ aranĝi geedziĝan feston solene, nun ĉiuj volas ŝpari monon por aĉeti maŝinojn kaj ekipi motorajn velŝipojn, kaj tiel fortigi la kolektivon entprenon. En tiu jaro, la Dongŝeng-a Brigado ekhavis motorajn velŝipojn. La maŝinoj bezonas direktistojn kaj ili intense kulturis teknikistojn. La fiŝistoj kiuj antaŭe scipovis nur remadon kaj retumadon, nun fariĝis unuj post aliaj lertaj maŝinistoj. Nun la brigado havas entute 105 teknikistojn pri enmara fiŝkaptado kaj 75 motoristojn.

ĈIAM AL PROSPERO KUN LABOREMO KAJ ŜPAREMO

Kun la daŭra disvolviĝo de produktado, pli multiĝis la komuna akumulaĵo de la Dongŝeng-a Brigado jaron post jaro, sed ĝiaj membroj ĉiam mastrumas sian aferon kun ŝparemo.

Ili ĉiam strebas al plifortiĝo kaj prosperiĝo de sia kolektiva entrepreno kun laboremo kaj ŝparemo. Se fendiĝis mastoj, ili do kunligas ilin duope aŭ eĉ triope, por plua uzado. Se rompiĝis ŝnuro, ili ĝin reunuigas per internodo, se ŝnuroj jam estas ne uzablaj pro malfortiĝo, ili kuntordas ilin duope por plua uzo. En ĉiu ŝipo estas riparaj instrumentoj. Se iu ŝipo difektiĝis, ili mem ĝin riparas. Se iu maŝino paneis, ili mem ĝin refunkciigas. Ili neniam petas aliajn fari kion ili mem povas; kaj ili lernas kion ili ne scipovas fari. Nun naŭ el la dek du kadroj de la brigado jam fariĝis teknikistoj scipovantaj kaj fiŝkaptadon kaj riparadon de la ŝipo kaj fiŝreto.

La kadroj de la Dongŝeng-a Brigado estas grupo da diligentaj kaj ŝparemaj mastrumantoj. La vicsekretario de la kompartia filio Ĝiang Ĥiangĝing faris detalan kalkulon: Ĉiujare la brigado devas aĉeti 34 grandajn retojn, pro kio ili devas elspezi 81, 600 juanojn; tamen, se ili mem trikus la bezonatajn retojn, do ili povus ŝpari ĉiujare 55,850 juanojn. Post la kalkulo li mem veturis al Ningbo, Ĝeĝiang-provinco, por lerni la teknikon de trikado de granda fiŝreto, kaj reveninte ĝin instruis al pli ol 300 komunumaninoj de la tuta brigado. Ekde 1960, la virinoj de tiu fiŝista vilaĝo okupiĝis per trikado de fiŝretoj en ĉiuj sezonoj. Kiam la virinaj komunumanoj ne sufiĉas por plenumi la taskon, trikas ankaŭ la viroj ĉu en hejmo aŭ sur maro kiam ili estas liberaj. Ankaŭ sur la tablo de la oficĉambro de la brigado estas ektrikataj retoj kaj fadenoj, kaj ankaŭ la kasisto kaj aliaj kadroj de la brigado trikas dum siaj liberaj horoj. En la fiŝista vilaĝo ĉie troviĝas retrikantoj kaj ĉiuj estas spertaj en retrikado.

POR BELA MORGAŬO

Dum dek jaroj, la popolanoj de Dongŝeng-vilaĝo ĉiam persistas en diligento kaj ŝparado. Nun ili jam havas dekojn da motoraj velŝipoj, kaj ekde 1964, ili instalas al ili unu post alia retlevilojn kaj aparatojn por detekti fiŝarojn. La fiŝisto Oŭting Toŭdi ĝoje diris: "Nun kun motoro, retlevilo, fiŝardetektilo kaj radioricevilo en la ŝipo, ni ja povas veturi kien ajn tra la maro por fiŝkapti."

Ekde 1957, en ok sinsekvaj jaroj la Dongŝeng-a Brigado sume vendis al la ŝtato 22,500 tunojn da fiŝoj, t. e. meznombro ĉiu laborforto vendis al la ŝtato pli ol 4.5 tunojn da fiŝoj. Nun la kolektiva riĉaĵo de la brigado jam atingis sume 2,230,000 juanojn, kaj estas dekunu-oble pli multa ol tiu en 1956.

La Dongŝeng-a Brigado ankaŭ estas helpema al frataj komunumoj kaj brigadoj. Ekde 1958, ili sume disponigis 460 mil juanojn da seninteresa pruntmono al 33 najbaraj frataj komunumoj kaj brigadoj, kaj sendis pli ol 40 produktajn teknikistojn al frataj komunumoj kaj brigadoj por disvolvo de produkto.

Kadroj de la brigado ofte instruas al la komunumanoj, ke ili ne forgesu la mizerajn tagojn de fiŝistoj antaŭ la Liberiĝo, ĉiam persistu en la spirito establi entreprenon kun penemo, sinapogante sur la propraj fortoj, kaj luktu por pli bela morgaŭo!



Trafiko en la Regionoj de Nacimalplimultoj

MA JUN

Sur la Kinghaj-Tibeta Ŝoseo 5000 metrojn alta super la marnivelo

ANTAŬ la Liberigo, tre malfacila estis la trafiko en la regionoj de nacimalplimultoj kaj iuj lokoj en ili estis preskaŭ tute izolitaj for de la cetera mondo. Post la Liberigo, novaj trafikaj retoj de ŝoseoj, fervojoj kaj navigaj linioj jam unuapaŝe formiĝis en la supre diritaj regionoj.

Antaŭ la Liberigo, en la Tibeta Aŭtonoma Regiono de sud-okcidenta Ĉinio ne estis ŝoseo kaj en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de nord-okcidenta Ĉinio neniam estis fervojo. Antaŭe, la transportado de varoj en tiuj du plej grandaj regionoj loĝataj de nacimalplimultoj, estis farata ĉefe per homforto kaj tirbestoj. Sed nun en Tibeto tri ŝoseoj jam ligas Tibeton kun la aliaj partoj de Ĉinio, nome la ŝoseoj Siĉuan-Tibeta, Kinghaj-Tibeta kaj Hingiang-Tibeta. Kaj krome multe da ŝoseoj ligas Lhasa-n, la ĉefurbon de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kun ĝiaj ĉefaj urboj. En Hingiang, nova trafika reto ĉefe de modernaj trafikiloj jam bone interligas la ĉefajn lokojn de la regiono.

Antaŭe, tre malmulte da ŝoseoj troviĝis en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono kaj la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono. Kaj multaj guberniaj urboj estis ne atingeblaj per aŭtomobilo. Sed nun, de la ĉefurboj de la tri nomitaj aŭtonomaj regionoj oni jam povas atingi ĉiun ajn el iliaj gubernioj per aŭtomobilo. Ekzemple: Gingjuan-gubernio de la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono estas ĉirkaŭata de la kruta kaj nuboskrapanta Liupan-montaro, kaj antaŭe la tiea trafiko estis ege malfacila, sed nun aŭtomobiloj ĉiutage kuradas al kaj for de la gubernia urbo kaj plantidoj de pomarbo de Ŝandong-, Liaŭning- kaj aliaj provincoj jam estas grandnombre kulturataj en tiu ĉi gubernio.


Same kiel en la aŭtonomaj regionoj, ankaŭ en lokoj koncentre loĝataj de nacimalplimultoj en multaj provincoj vikle disvolviĝas la trafika afero. En la distriktoj,

kie koncentre loĝas la kazaha kaj jugura nacimalplimultoj en Gansu-provinco, la totala longo de la ŝoseoj konstruitaj post la Liberigo estas dekduoble pli granda ol tiu antaŭ la Liberigo, kaj la funkcia linio estas pli longa je 16% ol tiu en la tuta provinco antaŭ la Liberigo. La Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Subregiono de Hajnan-insulo, kiu situas en Vuĝi-montaro, estis izolita antaŭ la Liberigo. Nun ne nur inter la gubernioj de la subregiono, sed ankaŭ inter 80% de ĝiaj popolaj komunumoj galopas aŭtomobiloj.

En la regionoj de nacimalplimultoj oni penas malfermi ŝipveturan linion por disvolvi transportadon sur akvo ĉie, kie estas profiteblaj kondiĉoj. En la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono sin trovas reto el pli ol 300 riveroj, kies totala longeco estas pli ol 16,000 kilometroj. Nun 53 el la riveroj jam estas navigebligitaj kaj ekspluatataj. La navigaj linioj de ili longas je pli ol 5,000 kilometroj. La parto de la Flava Rivero, la lagoj Vuliangsu kaj Dalaj situantaj en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estis jam dragitaj kaj tranavigeblaj por vaporŝipo.

Kune kun la rapida disvolviĝo de la trafika afero, elbakiĝis grandaj nombroj da teknikistoj de nacimalplimultoj. En 1958, antaŭ la demokratia reformado en la Tibeta Aŭtonoma Regiono estis nur pli ol 600 teknikistoj kaj teknikaj laboristoj por ŝosekonstruado, sed en 1964 la nombro de ili jam kreskis ĝis pli ol 8,600. Antaŭ la Liberigo, en la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono estis ege malfacile por la huj-naciaj laborantaj popolanoj akiri postenon en ŝosea trafiko, pro serioza klasa subpremado interne de la nacio kaj ankaŭ pro la altega muro inter la nacioj. Nun, plejparto de la ŝoforoj, teknikaj laboristoj por flegado kaj riparado, teknikistoj de ŝosea konstruado kaj gvidantoj de la trafikaj entreprenoj en tiu ĉi regiono estas huj-nacianoj.

Ankaŭ aertrafiko estas en disvolviĝo.



Transporta Stacio de la Hingiang-Tibeta Ŝoseo



La grupo de ŝarĝaŭtoj venas en la Aŭtonoman Sub-regionon de Tibetanoj de Ganzi, Siĉuan-provinco.




En Konstruado

ŜIPO DE OCEANOLOGIA ESPLORADO —

La unua ŝipo 2500-tuna por sinteza oceanologia esplorado "Dong Fang Hong", projektita de Ĉinio mem, jam sukcese konstruiĝis en la Hudong-a Ŝipkonstruejo de Ŝanhajo.

Ĉi tiu ŝipo estas disponebla por la koncernej organizoj kiuj ĝin uzas por fari sintezan esploron kaj sciancan studon de la oceanaj hidrologio, meteorologio, fiziko, kemio, biologio, geologio, geomorfologio, riĉfonto de mar-produktoj ktp.



ABUNDA RIKOLTO EN BESTOBREDADO —

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kiu ricevis abundan rikolton en bestobredado dum 7 sinsekvaj jaroj, ricevis tiukampe alian abundan rikolton en 1965. La nombro de bovoj kaj ĉevaloj por plugado, kiujn ĝiaj paŝtistaj popolkomunumoj vendis al la ŝtato inter januaro kaj novembro, pliiĝis unuoble ol tiu en la sama periodo de la jaro antaŭ la lasta, kaj la nombro de venditaj bovoj kaj ŝafoj por viando pliiĝis trione. Ankaŭ la produktaj kvantoj de feloj, lano, glaciigita viando, porkaj intestoj, ĉevalaj vostharoj, laktaĵoj k. a. bestaj produktoj ĉiuj superis tiujn de 1964, la jaro plej riĉprodukta en la pasinteco.

RICEVI ORON EL "FORĴETAĴOJ" —

Multe da fabrikoj kaj entreprenoj en Ŝanhajo nun atentigas elpreni utilaĵojn el la uzitaj akvo, gaso kaj skorio de industrio.

Laŭ statistiko, de la jaro 1960 ĝis 1964 Ŝanhajo ricevis de tio 110 kg. da oro, 33,000 kg. da arĝento, 40,000 tunojn da neferaj metaloj kaj 2,800,000 tunojn da diversaj materialoj, ili valoras sume 210,000,000 juanojn.

LHASA JAM HAVAS KRANAKVON —

En la urbo Lhasa estas instalita akvokonduka tubaro kun longeco de 10 kilometroj. Iuj loĝkvartaloj, registaraj organizoj kaj hospitaloj jam komencis uzi kranakvon. Ĝi estas la unua urbo en la Tibeta Aŭtonoma Regiono kiu tion uzas.

Ĉiuj maŝinoj de la Lhasa-a Kranakva Administrado estas liveritaj de diversaj internaj provincoj. La laboristoj manipulantaj tiujn maŝinojn ĉiuj estas tibetanoj.



La laboristo mezuras la dikecon de la ŝipkorpa ŝtalplato per la aparato.

Naskiĝo de Dikec-mezurilo

GIN BAŬŜAN

EN la Ŝanhaja Scienca Esploro de Ŝipo-transportado naskiĝis transistora impulsa ultrasona dikec-mezurilo. Ĝi estas malgranda kaj malpeza kaj similas transistoran radioricevileton. Ĝi povas esti uzata por mezuri precize la dikecon de koroditaj ŝtalplatoj de ŝipoj.

La kreinto de tiu ĉi mezurilo, Jang Gjungin kaj liaj helpantoj diris: "La dikec-mezurilo estas kolektiva kreaĵo."

DEZIRO DE LABORISTOJ

En 1958, kiam Jang Gjungin, la ĉefa kreinto de la mezurilo, laboris en la Ŝanhaja Ŝipo-konstruejo, li ofte vidis la laboristojn grimpati kun peza ilaro jen supren jen malsupren sur la korpo de riparenda ŝipo ĝin frapante por decidi laŭ la sono, kie oni devas bori truojn por mezuri la dikecon de ŝtalplatoj koroditaj kaj decidi kiujn platojn oni devos ŝanĝi. Kvincent ĝis mil truoj devis esti boritaj sur marŝipo de kvinmil tunoj. Kia difekto! Kaj la boritaj truoj en la ŝtalplatoj, kiuj ne bezonis ŝanĝon, devis esti ŝtopitaj denove per veldo. Tiel farante oni devis labori pene kaj la difekto mallongigis la vivon de la ŝipkorpo, kaj tre multe da mono oni devis pagi por tio. Ĉu ne estas eble mezuri la dikecon de ŝtalplato de ŝipkorpo per instrumento? Tio estis longa kaj forta aspirado de la laboristoj en la ŝipkonstruejo.

La deziro de la laboristaj fratoj vekis grandan simpatian de Jang. Li faris decidon havigi al ili ilon por mezuri precize, rapide kaj oportune la dikecon de ŝtalaj platoj.

MEZURILO MEMFARITA

Jang trovis literaturon pri farado de resonanca ultrasona dikec-mezurilo kaj faris laŭ ĝi dikec-mezurilon

Teknika kontrolado antaŭ elfabrikigo de la dikecmezuriloj



en laboratorio. Li donis ĝin al laboristoj por provuzo. Post nelonge, ili diris al li: "Ĝi estas tre bona, sed ĉ. dek kilogramojn peza, kaj lacigas nin la kunportado! Inĝeniero Jang, ni esperas, ke vi faros por ni dikec-mezurilon malpezan."

Post kelkaj tagoj, Jang Gjungin transposteniĝis al la Ŝanhaja Scienca Esploro de Ŝipo-transportado kaj daŭrigis tie sian studon kaj provfaron de la dezirata dikec-mezurilo subtenate de la Partio.

En 1961, Jang Gjungin komencis provfari elektronvalvan impulsan dikec-mezurilon. Kiam li studis por perfektigi la energio-transigilon, la ĉefan parton de la mezurilo, li renkontis malfacilon. Ju pli bona estas la distinga kapablo de la energio-transigilo, des pli maldikan ŝtalplaton la mezurilo kapablas mezuri. Por perfektigi tiun ĉi energio-transigilon, li devis scii la fundamentan teorion de akustiko, kio estis ekster lia kono, ĉar tio kion Jang studis estas la fako de ŝipomekaniko. Li eklernis dekomence akustikon dum la provfaro. Post senĉesa peniga laborado, li akumulis grandan kvanton de materialoj rekte el pli ol centfoja eksperimentado kaj fine sukcesis perfektigi la energio-transigilon.

En 1962, produktiĝis la unua elektronvalva impulsa dikec-mezurilo farita de Jang Gjungin. Tiam Jang kaj aliaj de la Esploro kunportante la mezurilon iris al ŝipokonstruejo por kune labori kun aliaj laboristoj. Li grimpis sur la ŝiporandojn kaj glitis en la ŝipofundon por fari mezuran provadon, kaj registris ĉiun detalon. Fine li invitis gvidantajn kadrojn, teknikistojn kaj laboristojn al ĉeloka kunveneto por aŭskulti iliajn opiniojn pri ĝi. Kaj poste li faris multe da plibonigoj laŭ la opinioj en pli ol unu monato.

Li donis la perfektigitan dikec-mezurilon al la ŝipokonstruejo por prova uzado. Laboristoj kaj teknikistoj tre ŝatas kaj uzas ĝin atenteme; ili ĉiuj sentas fieron pro la mezurilo farita de Ĉinio mem.

FOJ-REFOJA ESPLORADO KAJ PLIBONIGADO

Sukcesinte provfari la unuan elektronvalvan impulsan dikec-mezurilon, Jang Gjungin tamen ne kontentiĝis. En 1962, li estis informita pri apero de transistora dikec-mezurilo en fremda lando. Ĝi estas pli malpeza kaj facile uzebla. Jang pensis: "Se eksterlandano povis fari tian mezurilon, do ankaŭ ni tion povos." Sekve Jang kaj liaj kolegoj decidis klopodi por atingi la pli altan nivelon.

Dum la prova farado de transistora dikec-mezurilo, Jang Gjungin kaj liaj helpantoj pene laboris kaj trovis el provado kelke da funkciaj liniaroj anstataŭigante la elektronajn valvojn per la transistoroj. Tamen unu speciala elektrona valvo el ili ne povis esti anstataŭigita per transistoro. Poste ili informiĝis pri iu profesoro en la Ŝanhaja Fudan-Universitato kiu diris ke troviĝas speco de ordinara transistoro kiu povas substitui la specialan elektronan valvon. Jang vizitis tiun profesoron por peti lian konsilon kaj kuraĝe projektis novan liniaron laŭ la literaturo liverita de la profesoro, kaj fine konkeris la lastan malfacilon kaj elfaris por Ĉinio la unuan transistoran impulsan ultrasonan dikec-mezurilon.



En Konstruado

SCHMIDT-A (KATADIOPTRIKA) ASTRONOMIA TELESKOPO — La unua kompare granda Schmidt-a teleskopo farita en Ĉinio, pruviĝis bona en funkciado dum steloserĉado, stelogvidado, fotografa observado k. a. laboroj post pli ol duonjara provuzado en la Ziginŝan-Observatorio en Nankino.

Ĝi estas forta en konverĝado, klara en figurado kaj tamen malpeza. Ĝi estas funkciiĝata per elektro, simple kaj facile.

INSTRUMENTO POR RAPIDE MEZURI KOTONFIBRAN LONGECON — La Ŝanhaja Kotonŝpinteksa Scienca Esploro sukcese faris novan instrumenton por mezuri la longecon de kotonfibroj per aer-fluo.


Laŭ la ciferoj elmezuritaj de tia instrumento, oni povas tre facile trovi la kvin indikojn rilate al longeco.

CIFERA VOLTMETRO — La unua ĉina 5-cifera voltmetro estas sukcese farita en 1965, en Ŝanhajo. Ĝin projektis kaj produktis ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj en nur dek monatoj. Kaj ĉiuj ĝiaj transistoroj estas ĉinaj produktoj.

Tiu ĉi voltmetro kapablas montri rekte per ciferoj la mezuran rezulton en industria produktado kaj scienca esplorado, ĝi estas relative altpreciza kaj sensiva, kaj rapida en mezurado kun miso de malpli ol 3/10,000.

CIKLA HORLOĜO — Cikla horloĝo, speciala aparato uzata en la elektrenergia industrio, sukcese produktiĝis en la Ŝanhaja Malpezindustria Esploro.

Relative alta estas ĝia precizeco, kaj ĝia funkciado dum 24 horoj ne misas je pli ol unu sekundo.



10,000-TUNA MALVARMA TENEJO — Laŭ la bezono de ĉiam pli granda stoko de viando, ovoj, birdaĵoj, fruktoj kaj aliaj freŝaj nutraĵoj en la vendejoj, oni konstruis lastatempe dekmil-tunan malvarman tenejon en Pekino. Ĝia plankareo atingis pli ol 18,000 kvadratajn metrojn.

“Dorskorba Butiko”

ĜANG BIAN

NE temas pri butiko, kiu disvendas dorskorbojn, sed butiko kiu negocas helpe de tiaj iloj. Ĝi estas la kromnomo de la Vend-aĉeta Butiko de Huangŝandian, Fangŝan-gubernio, apud Pekino, kaj la plej konata el la butikonomoj tra la tuta Ĉinio.

Huangŝandian-komunumo sin trovas en montregiono, kie la kamparanoj dise loĝas kaj la malebenaj vojoj estas netrapaseblaj por veturiloj. Tio ege malfaciligas al la kamparanoj viziton al la vend-aĉeta butiko. Sub ĉi tiaj cirkonstancoj, kiel helpi al agrikultura produktado kaj provizi al la komunumanoj per ĉiutagaj necesajoj per sia servo estis grava problemo solvenda por la Vend-aĉeta Butiko de Huangŝandian.

TRANSPORTI VAROJN SUR LA MONTJOJN

En 1958, arde bolis nova fluso de produktado en Huangŝandian-komunumo kaj la produkta laboro de la komunumanoj iris eksterordinare streĉe. Sed kontraŭe, vegetis la vendaĉeta butiko. Kion fari? La respondeculo de la butiko Vang Janhiang sola portis varojn per dorskorbo sur la montojn. Tuj kiam li alvenis al Ĉangliuŝuj-brigado, la komunumanoj dissciigis la novaĵon kaj en malpli ol du horoj elĉerpiĝis preskaŭ ĉiuj varoj, kiujn li kunportis kun si. La komunumanoj diris: “La korbo da varoj, kiun vi surdorse alportis egalas al donaco de multaj labortagoj al ni!” Kiam Vang estis forironta, multaj ripetfoje diris: “Ni esperas ke vi ofte venos!”

La ekzemplon starigitan de Vang Janhiang poste sekvis ĉiuj laborantoj de la vendejo. Kun dorskorbo kolportadi sur la montoj fariĝis la ĉefa entreprena maniero de ĉi tiu butiko. Kiun ajn vilaĝon la vendistoj atingis, la komunumanoj tuj venas ilin komplimenti aŭ alporti akvon por kvietigi ilian soifon. Multaj eĉ konkure portas por ili korbojn sur la montojn, dirante: “Ĉar vi alportas al ni oportunecon malgraŭ penoj, ni nepre bone kulturos la agroj por respondi la prizorgon pri ni fare de la Partio kaj Prezidanto Maŭ.”

SERVI AL LA PRODUKTADO


La dorskorba vend-aĉeta butiko ne nur klopodas faciligi la aĉetadon de la popolamasoj, sed ankaŭ faris aktivan kontribuon por disvolvi la produktadon en la montregiono kaj pliigi la enspezojn de la kolektivo kaj la komunumanoj. En Huangŝandian kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj abunde produktiĝas fruktoj kiaj persimonoj, juglandoj kaj piroj, la enspezoj el kiuj okupas

trionon de la totala enspezo de la komunumo. Tial la laborantoj de la butiko rigardas sia grava tasko la subtenadon al la disvolvado de forsta produktado. Dum la lastaj jaroj, ili ĉiam ĝustatempe provizis ĉiujn produktajn brigadojn per produktaj rimedoj kiaj segiletoj, branĉtondiloj, partoj de ŝprucigiloj kaj insektomortigiloj, kiujn la flegado de frukt-arboj bezonas.

Ĉiu el la vendistoj estas zorgema pri la disvolviĝo de produktado. Iufoje, kelkaj vendistoj iris sendi varojn al Hulupeng. Preterpasante Hiasi-brigadon ili ripozis sub juglandarbo kaj rimarkis flavajn makulojn sur velkintaj folioj sur la tero. Ili rigardis pli atente kaj trovis sur la folioj multe da malgrandaj insektoj. La sekvintan tagon post sia reveno al la vendejo, ili meminciate sendis al tiu brigado pulvoron 666, per kiu la brigado tre rapide ekstermis la malutilajn insektojn.

En 1964, estis ĉi tie riĉa rikolto de persimonoj. Pro manko de sufiĉa laborforto, la produkta brigado intencis elsendi ilin amase kaj sekve ne plektis korbojn por ilin paki. Kiam la laborantoj de la butiko eksciis tion, ili helpis la respondeculojn de la brigado fari detalan kalkulon kaj konvinkis ilin, ke tiamaniere la difektiĝo dum la transportado estos granda, la urbanoj ne povos havi bonkvalitajn fruktojn kaj krome malpliigos la enspezo de la produkta brigado. Tial la brigado rearanĝis la laborforton kaj plektis korbojn por ekspedi la fruktojn. Rezulte de tio la enspezo de la brigado pliigis je pli ol 3,400 juanoj.

Portempa vendstando en montvilaĝo



FERVORO EN MALGRANDAJ NEGOCOJ

Socialisma komerco estas kanalo por la interfluo de komercaĵoj inter la urboj kaj la kamparo. Kun tiu ĉi vidpunkto de entreprenado en koro, la laborantoj de ĉi tiu butikoj ŝatas havi negocojn kaj grandajn kaj malgrandajn. Ili ne sentas ĝenon eĉ en negoco de unu groŝo, se nur tio estas utila al produktado kaj konstruado aŭ al la vivo de la popolo.

Iun posttagmezon, juna vendistino Li Ĵ Ginzang ricevis tri skorpiojn, kiujn iu kamparano volis vendi kiel drogon. Ŝi demandis Vang Janhiang: "Kiom kostas tiuj ĉi tri skorpioj?"

Atente rigardante la skorpiojn, Vang respondis: "Laŭ la reguloj, ni nur aĉetas skorpiojn sekigitajn, sed ne ĉi tiajn. Sed se ni ne aĉetus ilin, tio influus la aktivecon de la kamparanoj kolekti drogojn poiomete. Prefere ni aĉetu ilin." Sekve ili aĉetis la tri skorpiojn per kvin cendoj, kaj poste ili mem sekigis ilin. Tiaj okazaĵoj estas tre oftaj en tiu ĉi vend-aĉeta butikoj.

PLENA SINCERECO AL LA KLIENTOJ

En la pasinteco iris tradicie tra Ĉinio la jena onidiro: "La komercistoj neniam diras honestan vorton." Sed nun, en la nova Ĉinio socialisma, la komercaj laborantoj neniam mensogas.

Foje, iu mezaĝa virino elektis paron da tetasoj kun ruĝa desegno sur blanka fono. Vere belaj ili aspektis. Sed kiam Vang Janhiang kontrolis ilin, li trovis sur unu el ili tre subtilan fendon. Li tuj rimarkigis ŝin pri tio kaj petis ŝin elekti alian. Sed post longtempa serĉado la klientino povis trovi neniun pli kontentigan paron kaj decidis aĉeti la elektitan, opiniante ke la fendo estas nenio grava. Por ke la aĉetantino ne malprofitu, Vang malaltigis la prezon je kelkaj cendoj. La virino estis multe emociita de tio.

Kiam vendisto Baj Ginhaj enaĉetis porkon de iu kamparano en Ĉangliuŝuj-brigado, estis interkonsentite, ke provizore la vendinto estu pagita laŭ triaklasa porko kaj ke la klaso kaj prezo de la porko estos fiksita laŭ la viandakirebleco post la buĉado. Kiam la porko estis buĉita, ĝia efektiva viandakirebleco atingis tiun de unuaklasa porko. Kvankam la vendinto sciis nenion pri tio, la vendejo tamen pagis al li la diferencon de la prezoj.

ILIA "NEGOCA TAKTIKO"

Estas dirite, ke unu el la taktikoj de la komercistoj en la malnova socio estis "konjekti pri la psiko de la klientoj" kaj flati ilian inklinton, por ke la negoco sukcesu. Sed la "dorskorba butikoj" havas socialisman "negocan taktikon".

Ankaŭ ili konjektas la psikon de la klientoj, tamen la celo estas, ke la klientoj havigu al si kontentigajn objektojn laŭ siaj efektivaj bezonoj. Iufoje, en la butikon envenis kune kvin klientoj. Unu el ili diris, ke ili venas por aĉeti objektojn por geedziĝonta paro. Laŭ la aĝoj, fizionomioj kaj parolesprimoj de ili la vendisto konjektis, ke verŝajne ili estas la fianĉino, ŝiaj patrino kaj du parencoj kaj parenco de la fianĉo. Iliaj sintenadoj en la elektado de objektoj estis malsamaj: Pro honto la knabino parolis malmulte. Ŝia patrino estis virino nedecidema. En la elektado ili lasis sin gvidi



Vang Janhiang (la viro) kun sia dorskorbo de vendadoj sur montvojo

ĉefe per la opinioj de la du parencoj. La parenco de la edziĝonto nur atendis por pagi monon.

Post nelonge, ĉio estis finelektita. La vendisto ĵetis rigardon al la parenco de la edziĝonto kaj rimarkis, ke sur lia vizaĝo aperas mieno de embarasiteco. Evidente li pensis, ke la aĝoj kostas tro multe. Sekve la vendisto diris al ili: "Ni estas terkulturistoj kaj devas labori sur la kampoj. Prefere aĉetu malkaran sed fortikan ŝtofon." Ili ĉiuj pensis la parolon de la vendisto prava. Fine, laŭ la spirito de ŝparemo, ili elektis kaj aĉetis malkarajn sed fortikajn ŝtofon kaj aliajn varojn.

De ok jaroj la "dorskorba butikoj" persistas en tiu ĉi entreprena stilo surdorse porti varojn al la montoj por bone servi la popolamasojn, ĉar ili scias, ke tio estas konforma al la bezonoj de la produktado, de la popolo kaj de la revolucio.



GAJNO DE ORA MEDALO

Printempe de 1965, en la Internacia Foiro okazinta en Lejpcigo de la Germana Demokratia Respubliko, tapiŝoj produktitaj en Tiangin de Ĉinio gajnis oran medalon.

Antaŭ longe, en la Sankt-Luiza Internacia Ekspozicio de 1893, kaj poste en pluraj Panamaj Foiroj, ĉinaj tapiŝoj gajnis, per siaj delikata arto, brilaj koloroj kaj belaj desegnoj, orajn medalojn kaj fariĝis produktaĵo ĝuanta relative altan prestiĝon en la mondo.

Tiangin estas unu el la famaj produktaĵoj de tapiŝo en Ĉinio. Nun tie sume troviĝas kvin grandaj tapiŝ-fabrikejoj. Por pli bone koni la disvolviĝon kaj progreson de la tapiŝ-produktado post la Liberiĝo mi vizitis la Duan Kooperan Tapiŝ-fabrikon de tiu urbo.

DE KVAR PERSONOJ ĜIS DU MIL

Antaŭ la Liberiĝo la tapiŝ-produktado de Tiangin estis monopoligita de eksterlandaj kapitalistoj kaj burokrat-kapitalistoj. Antaŭvespere de la liberiĝo de Tiangin tiuj en- kaj ekster-landaj ekspluatantoj unuj post aliaj forprenis sian kapitalon kaj fermis la fabrikejojn, tiel ke la tiama tapiŝ-produkto en Tiangin tute paralizigis. Granda nombro da laboristoj perdis sian okupon.

Post la liberiĝo de Tiangin, en 1949, la produktado de tapiŝoj ricevis novan vivon. Subtenate de la Partio kaj Popola Registaro senlabora tapiŝteksisto Ma Gincay kaj liaj tri kunuloj organizis la unuan kooperan tapiŝ-produktan grupon. Por solvi la malfacilon de manko de kapitalo, la Registaro pruntedonis al ili monon kaj respondecis pri la aĉetado kaj disvendado de ĉiuj iliaj produktaĵoj. Krome, por pligrandigi la produktadon la Registaro per ĉiuj rimedoj revenigis al la vicoj ta-

piŝteksistojn, kiuj ŝanĝis sian okupon antaŭ la Liberiĝo, varbis kaj kulturis novajn laboristinojn. Nun la grupo jam disvolviĝis en la Duan Kooperan Tapiŝfabrikon de Tiangin kun pli ol du mil laboristoj. Ĝiaj produktaĵoj estas bonvenigataj en la merkatoj en- kaj ekster-landa.

REVENIGO DE LA TRADICIA METIARTO

La tradicia metiarto de tapiŝ-teksado en Ĉinio jam havas historion de pli ol mil kaj tricent jaroj. Ĝi naskiĝis en Hetian de Hingiang, en Ĝjelci de Tibeto k. a. Ĉe la fino de la 18-a jarcento ĝi enkondukiĝis unue en Pekinon, poste en Tiangin. Konservante la originalan stilon de la tapiŝo de Hingiang kaj aliaj lokoj, adoptante laŭ la gusto de la internalandanoj la bonajn ecojn de la ĉinaj tradiciaj artoj, kiaj pentrado, brodado, brodteksado kaj skulptado, la metiartistoj de Pekino kaj Tiangin teksis sur tapiŝoj elegantajn desegnojn riĉajn je naciaj karakterizoj de Ĉinio, prezentantaj natur-similajn birdojn, bestojn kaj florojn.

La eminenta arto de la tapiŝmetiistoj ricevis plua-paŝan disvolvion post la Liberiĝo. Nemalmultaj el la novaj produktaĵoj, kreive faritaj de la laboristoj de la Dua Koopera Tapiŝ-fabrikejo de Tiangin, prezentas la fizionomion de konstruado en la nova Ĉinio per tradiciaj artaj formoj. Inter ili, tre plaĉas al la uzantoj la tapiŝoj kaj tapetoj kun desegnoj pri "La Pontego super Jangzrivero", "La Nova Fizionomio de Pekino", "Ŝtalo, Fero, Greno kaj Koton" k. t. p. Samtempe, al merkatoj estas senĉese liverataj ankaŭ tapiŝoj kun desegnoj pri belegaj ĉinaj pejzaĝoj kaj popolaj rakontoj, ekzemple, "La Ĉiela Altaro", "Feino Ĉang'e Flugas al la Luno" k. t. p.

La tapeto kun bildo de "Elitaj Ĉevaloj" produktita en 1963 per la kreemaj manoj de la veteranaj metiartistoj Gin Gieju kaj Li Futong de tiu fabrikejo ja impresas per sia novo. Utiligante desegnaĵojn de la popola paper-tranĉaĵo de Ĉinio, ili teksis sur la tapeto senliman kamparon, trafluantajn riverojn kaj kanalojn, 16 elitajn ĉevalojn en diversaj pozoj viglantajn inter verdaj arboj, kaj fostojn de alttensiaj elektrofadenoj starantaj sur la vastejo. La bildo estas impona kaj freŝa, kaj spegulas la prosperan aspekton de la nova kamparo.

En la grandioza kaj pompa Popola Halo de la ĉefurbo Pekino de Ĉinio estas tapiŝo larĝa je 15.8 metroj kaj longa je 22 metroj. Ĝi estas zorgeme kaj tutkore teksita de 66 geniaj majstroj de la Dua Koopera Tapiŝ-fabrikejo de Tiangin.

TUTKORE INSTRUAS VETERANAJ METIISTOJ

En la Dua Koopera Tapiŝ-fabrikejo de Tiangin troviĝas multaj veteranaj laboristoj kun eminenta arto. Tiuj laboristoj ĝenerale havas laborsperton de 20-30 jaroj. Ĉiu el ili havas siajn originalajn majstrajn teknikojn. Ekzemple, la kvindekkvarjara Ĝaŭ Genĉoŭ, supereminenta labormodelo de la urbo Tiangin lertas en teksado de homa figuro, natur-simila kvazaŭ vivanta. Ekde la aĝo de 13 jaroj Ĝaŭ Genĉoŭ jam servis kiel metilernanto en iu privata tapiŝ-fabrikejo. Dum la lernoservado li suferadis baton, insulton kaj diversajn turmentojn kaj finfine ellernis eminentan arton. Li povas subtile kaj

vive reprodukti en tapiŝo la bildon de arĝenta monero pendigita sur la teksilo. En 1937, post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, ne volonte servi al la malamiko per sia arto, li decideme forlasis Tiangin kaj aliĝis al la kontraŭjapana vicaro de sia naskiĝloko. Nur post la liberiĝo de Tiangin li denove revenis al sia kara teksilo.

Por ke la metiarto de Ĝaŭ Genĉoŭ ne perdiĝu, ekde 1954, la gvidantoj de la fabriko asignis al li la taskon speciale eduki metilernantojn. Ĝis nun li jam elkulturis proksimume ducent lernantojn, inter kiuj multaj fariĝis elstaraj tapiŝ-laboristoj.

En la Dua Koopera Tapiŝ-fabriko de Tiangin, kulturate de veteranaj metiistoj kia Ĝaŭ Genĉoŭ, la vicaro de junaj eminentaj laboristoj rapide grandiĝas. Al la disvolvo de la tapiŝ-metiarto de la nova Ĉinio ili faros ankoraŭ pli grandan kontribuon ol iliaj antaŭuloj.

Verkis ĈONG HI

Tapiŝistoj en laboro



NOVAJ BRAJLAJ LIBROJ — La Ŝanhaja Brajl-Eldonejo eldonis nombron da novaj libroj. Inter ili troviĝas *Elektitaj Versaĵoj de Maŭ Zedong kun Muziknotoj*, *Ruĝa Roko* romano priskribanta revolucionan batalon kaj *Tiel Li Vivis* rakonto pri Ngujen Van Troi la nacia heroo de Vjetnamio en la batalo kontraŭ Usono kaj por savo de la patrio kaj la *Taglibro de Lej Feng* kiu prezentas la fizionomion de nova homo komunisma k. a. Ĉiuj ĉi legaĵoj ĝuas varman akcepton ĉe la blindula legantaro en diversaj lokoj.

FONDIĜIS LA HUBEJ-A BELARTA AKADEMIO — Jam fondiĝis en Vuhan la Hubej-a Belarta Akademio kiu celas ĉefe kreadon de belartaj verkoj amataj de la kamparanoj. La akademion partoprenas pli ol 70 pentristoj kaj belartaj laborantoj. Ĝia tasko konsistas el belarta kreado, projektado de belartaj produktoj, studo de belarta teorio kaj kulturado de kamparaj belartaj laborantoj. En la kreado oni prenas pentradon de lumbildoj, novjaraj bildoj, bildrakontoj kaj propagandaj afiŝoj kiel sian ĉefan taskon.

8800 KULTURDOMOJ — En la vastaj kamparo kaj distriktoj de bestbrede de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono jam fondiĝis pli ol 8800 kulturdomoj. En la komunumoj kaj brigadoj kie troviĝas kulturdomoj, iliaj membroj amase venas tien post penegaj laboroj dum la tago por legi verkojn de Prezidanto Maŭ, provludi kulturajn kaj distrajn programerojn, aŭ aŭskulti kantrakontojn de popolaj rakontistoj. Tie troviĝas ankaŭ junuloj kiuj laboras absorbite super scienca esplorado.

FAMA PORCELANO DE ANTIKVECO — Jam pli ol 700 jarojn oni ne sciis kiel baki la bluporcelanon el la oficiala bakejo de la Suda Song-dinastio (1127-1279 p.K.), sed lastatempe la instruistoj kaj studentoj de la ceramika fakultato en la Ĝegiang-a Belarta Instituto sukcesis trovi la perditan metodon per provbakado.

La unuaj produktoj de bluporcelano fariĝis de tiu instituto estas altkvalitaj. Ili ne nur konservas en plastiko la stilon de fortikeco, antikva simpleco ktp., sed oni ankaŭ ĝin dotis per la nova spirito ĉe la epoko.

Novaj Verkajoj de la Maljuna Papertondisto

EBLE niaj malnovaj legantoj ankoraŭ memoras mian artikolon pri la geniulo de papertonda arto Ĝang Jongŝou kaj kelkaj el liaj verkoj en EPC N-ro 5 de 1962. Dum la lastaj jaroj lia papertonda arto multe progresis. Kaj kun ĝojo nun mi skribas ĉi tiun artikolon por prezenti liajn novajn kreaĵojn al niaj legantoj.

Ĝang Jongŝou estas 61-jaraĝa kaj jam praktikinta la arton de papertondado kvindek tri jarojn, sed li ekprovis eltondi hom-figurojn nur en 1965 jaro.

Por Ĝang Jongŝou eltranĉi hom-figurojn estas afero vere malfacila. Ĉar de kvin generacioj, la papertondistoj en lia familio tradicie okupiĝis nur pri eltranĉado de floroj, birdoj, insektoj, fiŝoj k. s., sed neniam eltondis paperajn hom-figurojn. Li ofte diris: "Estas neeble prezenti samtempe la figuron, sintenon, mienon, temperamenton kaj sentojn de homo per peco da papero kaj tondilo, ĉar inter papertondaĵo kaj ĉinstila pentraĵo estas granda diferenco. En la ĉinstila pentraĵo oni povas prezenti la subjekton per diversaj rimedoj, kiaj koloroj kaj nuancoj. Sed la papertranĉaĵoj havas nur strekojn kiel esprimilon. Se oni nepre deziras prezenti per ĝi hom-figuron, kompreneble la klopodoj ne atingos bonan sukceson."

En la lastaj jaroj, lerninte artikolojn de Prezidanto Maŭ li ekvidis la gravan signifon de tio ke literaturo

kaj arto priservu la socialisman konstruadon, laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn. Precipe la energia disvolvigo de la kultura revolucio komenciĝinta per la Pekina Opero kun nuntempaj temoj donis al li inspiron kaj instigon. Li pensis en si: "Oni ĉiam opiniis ke la Pekina Opero ne taŭgas por prezenti modernajn temojn, sed nun ĝi reformiĝis kun granda sukceso kaj akiris bonan rezulton. Ĉu vere mi ne povas prezenti modernajn hom-figurojn per papertondo?"

Kun kuraĝo li komencis eltondi artverkojn kun hom-figuroj. Kompreneble malfacilojn li renkontis, sed li ne perdis la kuraĝon. Li havigis al si koncernajn fotojn kaj materialojn, kaj post detala pristudo, li eltondis la unuan provaĵon. Kun tiu kreaĵo, li vizitis multajn por peti konsilojn, kaj ripete ĝin perfektigis. Finfine li sukcesis eltondi unuajn seriojn da papertondaĵoj de hom-figuroj, inkluzive de "La Juna Kamparano Dong Giageng", "Lernu de la Liberiga Armeo", "Ruĝa Virina Taĉmento" kaj heroajn figurojn, kiuj spegulas la batalon de la popolo en suda Vjetnamio kontraŭ la agreso de la usona imperiismo.

Kiam oni gratulis lin pro lia sukceso, li diris kun ekscitiĝo: "Nur nun mi klare vidas la ĝustan direkton kaj taskon de mia kreado. La papertonda arto povas pli bone ludi sian rolon kaj ricevi varman akcepton de la popolamaso nur tiam, kiam ĝi sin okupas pri modernaj temoj."

Novjaraj Bildoj

La novjara bildo estas tradicia popola artaĵo tre vaste konata en Ĉinio. Jen estas kelkaj pentraĵoj elektitaj el la Ekspozicio de Novjarbildo kaj Gravuraĵoj de Norda Ĉinio kiu okazis en Pekino en la kuranta jaro. En la ekspozicio montriĝis pli ol 210 bonegaj freŝaj novjaraj bildoj. Ili prezentas al ni novajn homojn, novajn aferojn, novajn pensojn kaj mo-rojn de la socialisma epoko, spegulas la grandajn ŝanĝiĝojn kaj novajn atingojn sur la frontoj de industrio, agrokulturo kaj kulturo. La verkoj montras rimarkindan progreson de la arto de novjaraj bildoj en disvolvado de ĝia bona tradicio, spegulado de la reala vivo, kaj kreado de nova artformo. Inter la ekspozitaj bildoj troviĝis ankaŭ verkoj de amatoraj artistoj el la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tio montras ke nombro da novuloj kapablaj por fizika laboro kaj pentrado jam elbakiĝis per la disvolvo de la arto de novjaraj bildoj, kio estas afero kun granda signifo.





Prezidanto Maŭ kun Junaj Kamparanoj

Pentris Ĝang Fulong (laboristo)



Konduki Akvon sur la Monton

Pentris Vang Baŭŝen k. a.



Eduki la Novan Ge-
neracion
Pentris Ŝen Tongging

NOVJARAJ BILDOJ

Frua Printempo sur la Stepo

Pentris Baŭ Sihjue (mongolo)





Ĝojiga Informo pri Produkto

Pentris Deng Kajji (laboristo)



Kuracistino Ŝi Lanfeng

ŜI Lanfeng, ginekologia kaj obstetrika kuracistino en la Popola Hospitalo de Huohian-gubernio, Ŝanhi-provinco, estas persono bone konata al ĉiuj familioj en la tuta gubernio. Oni honoras ŝin per diversaj titoloj kaj ameme nomas ŝin per Franjo Lanfeng.

Dum la pasintaj 16 jaroj depost la Liberiĝo, dank' al ŝia akuŝigo pli ol 2000 infanetoj sekure naskiĝis, kaj dank' al ŝia kuraco pli ol 100 akuŝintinoj kaj pacientoj resaniĝis. Sub la gvidado de la Partio, ŝi elkulturis pli ol 200 akuŝistinojn por la popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj de la tuta gubernio, tiel ke la sanprotekta laboro al la patrinoj kaj infanoj bonefike disvolviĝas tra la tuta gubernio.

Egale ĉu en brula varmego de la suno aŭ en ĝisoste frosta vento, ĉu en pluva tago aŭ malluma nokto, ŝi ĉiam senprokraste ekiras por doni kuracon, senkonsidere pri la longeco de la vojo, se nur oni vokas ŝin al malsanulo. Dum la pasintaj 16 jaroj ŝi laboris sinforgese; por fari kuracojn ŝi grimpis montojn kaj vadis riverojn kaj postlasis piedsignojn en preskaŭ ĉiuj pli ol 300 grandaj kaj malgrandaj vilaĝoj de la tuta gubernio.

Kvankam Ŝi Lanfeng estas ginekologia kaj obstetrika kuracistino, tamen fakte ŝi kuracas ĉiajn malsanulojn: sin turnas al ŝi kaj kapdolorantoj kaj dentdolorantoj, kaj viroj kaj virinoj. Ĉiuj konas D-rinon Ŝi Lanfeng de la Popola Hospitalo kaj volontas esti kuracata de ŝi.

Kial do oni tiel senlime fidis al Ŝi Lanfeng? La kaŭzo kuŝas en tio, ke ŝi tutkore sin dediĉas al la pacientoj kaj la revolucio.

Kuracistino de la Laboranta Popolo

FU SAN

URĜA HELPO AL URĜA PACIENTO


Vintre de 1953, en Tiankiaŭ-vilaĝo ĉe la montpiedo de Huoŝan-monto estis akuŝantino nomata Ĝang Lanfang. Pro antaŭendevio de la placento, la feto ne povis eliĝi kaj la akuŝantino jam svenis kaj estis en mortodanĝero. Tiam ĉiuj ŝiaj familianoj povis fari nenion alian ol meti sian esperon sur Ŝi Lanfeng, kiu estis ĉ. 25 kilometrojn for de ili.

Jam vesperiĝis, kiam la sendito venis en la urbon. Apenaŭ Ŝi Lanfeng aŭdis, ke la akuŝantino jam estas en danĝero de morto, ŝi tuj ekiris kune kun akuŝistino Ŝen Kiuĥjue, surdorsiginte la porakuŝan keston.

Baldaŭ post ilia ekiro grandaj neĝflokoj jam komencis fali. Pli kaj pli mallumiĝis, neĝis ĉiam pli intense kaj la vojo fariĝis pli kaj pli glitiga. Ŝen Kiuĥjue proponis, ke ili iom ripozu. Kvazaŭ aŭdante dolorajn, korŝirantajn helpkriojn de la akuŝantino, Ŝi Lanfeng laŭte diris: "Kiuĥjue, ripozi ni ne povas. Urĝas la tempo."

Kulturado de vilaĝaj akuŝistinoj





Ŝi Lanfeng (la 2-a maldekstre) operacias.

Jam estis noktomezo kiam ili atingis Tiankiaŭ-vilaĝon. Enirinte la domon de la akuŝantino, Ŝi Lanfeng tuj komencis urĝan savadon.

Post du horoj, finfine la infano sekure eliĝis el la patrino. Sed la akuŝantino estis ekstreme malforta kaj la infano estis grave asfiksiita: ĝiaj membroj ne moviĝis kaj la korsono estis malforta.

“D-rino, jam ne zorgu pri la infano. Pli gravas la patrino.”

“Ne”, diris decideme Ŝi Lanfeng, “la patrino kaj la infano ambaŭ devas esti sekurigataj.”

Ĉe la mateniĝo la ĉielo sereniĝis kaj la vento ĉesis blovi. Tiam kaj la patrino kaj la infano estis savitaj, kaj tiu ĉi ĝojiga novaĵo tuj disvastiĝis tra la vilaĝo.

Parento de la akuŝantino subite kaptis la manon de Ŝi Lanfeng kaj estis tiel emociita, ke longe li ne povis eldiri eĉ unu vorton. Liaj larmoj torentis: “D-rino Ŝi, estas vi, kuracisto en nia nova socio, kiu savis la patrino kaj la infancon.” “Avo, kiel kuracisto, mi devas helpi la akuŝantinojn. Ja estas la Partio, kiu donis al mi la scion kaj teknikon de akuŝigo. Vi do danku la Partion kaj Prezidanton Maŭ!”

SINDONEMO

Malsanoj estas diversspecaj kaj malsanuloj eniras hospitalon pro diversaj kazoj. Kuraĝe prenante sur sin ĉian ajn respondecon kaj tute ne konsiderante sian personan intereson, Ŝi Lanfeng prizorgas pacientojn kun senlima revolucia entuziasmo.

Iun nokton de marto de 1963, la operaciejo estis brile prilumata. Por urĝe savi la vivon de iu paciento Ŝi Lanfeng maldormis la tutan nokton; kiam ŝi finis la operacion, jam estis batinta la kvara horo de la mateno. Apenaŭ ŝi elpaŝis el la hospitalo por iri hejmen, ŝi ekvidis brankardon alproksimiĝantan al ŝi. La instinkto de popola kuracisto igis ŝin halti, sin turni kaj, sekvante la brankardon reiri en la akceptejon por urĝaj malsanoj.

“Tre evidenta estas la simptomo de nerveca doloro en la abdomeno. Salpingo krevis kaj sangas pro ekster-utera gravedo. Ŝi devas enhospitaliĝi kaj tuj ricevi operacion.” Farinte diagnozon, Ŝi Lanfeng decidis antaŭ ĉio akcepti la malsanulinon en la hospitalon por operaciigi.

Tempo estis vivo kaj prokrasto povus kaŭzi morton. Tamen tiam la sangpremo de la malsanulino estis tre malalta, kaj laŭ la rutina regulo oni ne povas operacii pacientojn, kies sistola sangpremo ne atingas la hidrargo-kolonan altecon de 90 mm. Sed estus pli danĝere, se la malsanulino ne estus operaciita. En tia malfacila situacio D-rino Ŝi Lanfeng ne forlasis la lastan espereton kaj, kuraĝe preninte sur sin la respondecon pri ĉiaj eventualaj malbonaj sekvoj, faris operacion al la malsanulino. Trapasinte streĉan bataladon, en kiu solviĝis multaj komplikaj problemoj de la operacio, Ŝi Lanfeng finfine savis la malsanulinon el la danĝero. Ŝi ekrigardis la brakhorloĝon: jam estis kvarono post la 19-a. Denove jam falis la nokto.

STUDI MEDICINON POR LA POPOLO

Antaŭ la Liberiĝo, la familio de Ŝi Lanfeng estis tre malriĉa. Ŝia patro mortis pro la subpremo de bienulo, pro manko de vivrimedo, ŝia patrino povis fari nenion alian ol edziniĝi ŝin en ŝia frua juneco. Baldaŭ post ŝia edziniĝo mortis ŝia edzo. Labori ŝi kapablis kaj estis lerta en ŝtofoteksado, sed ŝi ne povis plenigi sian stomakon, kvankam ŝiaj manoj frotvundiĝis de peza laboro. En 1947 ŝia hejmvilaĝo estis liberigita. Tiam ŝi, estante jam 27-jara, komencis viziti klerigan kurson por alfabetoj, kun libroteko sub la brako. En oktobro de la sekva jaro, la Partio kaj la loka registaro sendis ŝin al higiena lernejo por studado. Kiam ŝi kaj ŝiaj kunlernantoj finis sian studadon, la lernejestro admone diris al ili: “Vi venis el la popolamasoj kaj sekve devas reiri al ili. Nun miloj kaj dekmiloj da liberigitaj virinoj atendas, ke vi iru al ili por ilin liberigi je doloro de malsano kaj akuŝo.” Ĉi tiujn vortojn ŝi ja bone memoras en sia koro. Poste la Partio denove sendis ŝin al la gubernia hospitalo kaj al la subprovinca hospitalo sinsekve por perfektigi ŝin en medicino. Je la unua de septembro 1954, ŝi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Ŝi foje pensis: “Ja mia ĉio, krom la korpo naskita de miaj gepatroj, estis donita al mi de la Partio! Sen la Partio ja ne povus esti la hodiaŭa Ŝi Lanfeng!”

La postuloj de la popolamasoj al kuracisto ja estas multflankaj, jen nova tasko elmetiĝis al Ŝi Lanfeng. Iufoje, kiam ŝi, estante ankoraŭ nova kuracisto, estis farinta akuŝigon en iu vilaĝo, ŝi renkontis iun pli ol sesdekjara maljunulon, kiu suferis la malsanon vezikito kaj havis akran doloron. Li petis insiste, ke Ŝi Lanfeng faru al li kuracon. Ŝi Lanfeng konfesis, ke ŝi ne kapablas kuraci tian malsanon. Sed la avo neniel kredis tion, dirante: “Ĉu povus esti tia kuracisto, kiu kapablas kuraci ekskluzive virinojn?”

“Avo, mi tute ne mensogas. En la lernejo mi lernis nur tiun ĉi fakon. Mi lernis iom ankaŭ akupunkturon, tamen mi ankoraŭ ne praktikis ĝin eĉ unu fojon.”

“Do ĝin praktiku je mia korpo. Se nur vi povos el-lerni akupunkturon kaj kapablos resanigi aliajn homojn

el tiu ĉi malsano, estus tute ne grave, eĉ se vi fuŝkuracus min.”

La vortoj de la avo eksentigis ŝin, kiel granda estas la espero de la popolamasoj al kuracisto. Kial do ni kuracistoj tamen ne kapablas kuraci iajn malsanojn kaj devigas malsanulojn vane elspezi monon kaj perdi tempon pro vojirado? Kial do oni kapablas kuraci nur la okulojn sed ne la nazon, kvankam inter ili estas nur malgranda interspaco? Ĉu socialista kuracisto rajtus diri al malsanulo “Vin mi ne kapablas kuraci”, kaj rifuzi al li kuracon? Ne, tion li ne rajtas! Por esti kapabla kuraci pli multajn malsanulojn kaj pli multajn malsanojn, Ŝi Lanfeng lernis tre diligente. Reveninte en la urbon ŝi tuj aktive studis akupunkturon, kaj, kunlaborante kun ĉinmedicinaj kaj okcidentmedicinaj kuracistoj, resanigis la avon. Nun ŝi jam kapablas kuraci preskaŭ ĉiajn ordinarajn malsanojn. Kaj por sin adapti al la karakterizaĵoj de la kamparo kaj al la postuloj de la vastaj popolamasoj, ŝi senĉese lernis modeste, plivas-tigis sian medicinan scion kaj mastras jam pli multajn kuracajn teknikojn kaj fariĝis faka kuracisto kun “Pluraj kapabloj”.

KUN VERA KARAKTERO DE LA LABORANTA POPOLO

Inter la popolanoj vaste cirkulas anekdotoj pri la malavareco de Ŝi Lanfeng al gemalsanuloj kaj ŝia rigoreco al si mem. De kiam ŝi fariĝis kuracisto, ŝi ĉiam konservas en si la karakteron de la laboranta popolo. Ŝi neniam konsideras sin supera ol aliaj, nek malestimas la laborantan popolon, kvankam ŝi estas intelektulino kaj multekapabla kuracisto. Preskaŭ ĉiuj ŝiaj vestoj kaj ŝuoj estas faritaj de ŝi mem en la hejmo. Tamen al gemalsanuloj ŝi estas tiel malavara kaj oferema: se paciento tute nekonata al ŝi estas en mona embaraso kaj sin turnas al ŝi kun peto por helpo, ŝi ĉiam helpas malavare. Se malsanulino veninta de malproksime devas ofte ricevi injekton aŭ unĝvent-refreŝigon kaj tamen ne bezonas loĝi en la hospitalo, Ŝi Lanfeng do varme loĝigas ŝin en sia hejmo kaj petas sian patrinon prizorgi ŝin ĝis resaniĝo.

Kaj kiel Ŝi Lanfeng traktas la ŝtatajn proprajojn? En la resumo pri “La Mastrumado de la Hospitalo en Laborema kaj Ŝparema Maniero kaj en la Spirito de Sinapogo sur la Propraj Fortoj” sin trovas jenaj vortoj:

“Kamaradino Ŝi Lanfeng, ginekologia kaj obstetrika kuracisto konstante atentigas ŝparadon: ŝi neniam forĵetas laŭvole eĉ unu kotonbulon, unu kompreson, unu kaŭĉukan ganton... En la daŭro de pli ol dek jaroj la ginekologia kaj obstetrika sekcio, prenis por si nur malmulte da novaj gantoj, kolektis el la operaciejo pli ol 100 parojn da difektitaj gantoj kaj riparis ilin por plua uzado; kaj nur per tio ĉi pli ol 200 juanoj estas ŝparitaj.”

Ŝi Lanfeng estas tiel kuracistino kiel ordinara laborulino, kaj havas sinceran senton kaj modestan laborstilon de ordinaraj laborantaj popolanoj. Farante kuracojn en la kamparo, ŝi ĉiam manĝas kaj loĝas ĉe malriĉ-kamparanoj aŭ malsuperaj mezkamparanoj, kaj iafaje eĉ persone preparas manĝaĵojn por la familio de malsanulo, kvazaŭ ŝi estus ties membro. Ĝuste pro tio la popolamasoj rigardas ŝin kiel sian intimumon.



Kultura Vivo

ĈIUJ KVAR VOLUMOJ DE LA ELEKTITAJ VERKOJ DE MAŬ ZEDONG JAM APERIS EN ANGLALINGVA TRADUKO — La anglalingva tradukaĵo de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, Vol. I, III, kaj IV estis antaŭe farita kaj eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Nun ankaŭ la II-a vol. estas jam eldonita de la sama eldonejo kaj disvendata en kaj ekster la lando ekde la 1-a de jan., 1966. Same kiel la ĉina originalo, la angla eldono de la II-a vol., enhavas 40 artikolojn, kiujn kamarado Maŭ Zedong verkis inter julio de 1937, kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito, kaj majo de 1941, kiam repuŝiĝis la duafoja kontraŭkomunista tajdo levita de Ĉiang Kajŝek.



AGROKULTURA KORESPONDA UNIVERSITATO — La Pekina Agrokultura Koresponda Universitato malfermiĝis por la multnombraj intelektaj gejunuloj en vilaĝoj ĉirkaŭ la ĉefurbo. Kaj en la ĉirkaŭurbo stariĝis ĝiaj 4 filioj. La universitato havas tri fakultatojn de agronomio, fruktarba kulturo kaj bestbredado kaj bestkuracado. Nun pli ol 2000 studentoj studas en tiu ĉi universitato kaj la plejparto de ili estas vilaĝaj intelektaj gejunuloj kun klereco de supermezlernejaj diplomitoj. Ili ĉefe memstudas koresponde, kaj dum libertempo en kultivado, la universitataj filioj kunvokas ilin por kolektiva studo kaj praktiko por mallonga tempo. En lernado de fakaj scioj ili prenas kiel fundamentan terenon la lokajn eksperimentajn kampojn por bone kombini la lernadon kaj sciencan eksperimentadon kun la produktaj laboroj.



TELEVIDA MEZLERNEJO — La Televida Duonlabor-duonlernejo Mezlernejo en Tajjuan disvolviĝas kun la tagoj post la fondiĝo antaŭ pli ol unu jaro. La lernejo sin karakterizas per tio, ke la gelernantoj lernas ĉe stacioj starigitaj dise laŭ la situo de iliaj loĝejoj, kaj partoprenas produktan laboron ĉe sia loĝloko, kaj tiel parte laboras kaj parte lernas. La nombro de la klasoj de tiu ĉi lernejo pliiĝis de 20 en la pasinteco ĝis 69 en nuntempo, kaj la gelernantoj pliiĝis de pli ol 700 ĝis 2000 personoj.

NEKTAROJ EL LA ABRIKOTFLORA VILAĜO

ĜANG JIVEN

*En Abrikotflora Vilaĝo trovas sin drinkejo,
Kaj antaŭ ĝi tre ĉarme floras abrikotfloraro.
La abrikotflorar' la vastan teron aromigas
Kaj ŝvebas tra la mond' la bonodor' de Fen-nektaro.*

Ĉi tiu popolkanto cirkulas en la Abrikotflora Vilaĝo, la produkto de la famaj malnovaj alkoholaĵoj de Ĉinio — la Fen-brando kaj la brando Bambufolie Verda.

La Fen-brando kaj la brando Bambufolie Verda ja meritas esti laŭdataj kiel nektaroj superaj en koloro, aromo kaj bongusto! La Fen-brando karakteriziĝas per kristala klareco, agrabla bonodoro, granda alkoholforto kaj plaĉa gusto. Ĝin trinkinte oni havas senton de ekstazo. Ankaŭ la brando Bambufolie Verda, vario de Fen-brando spicita per drogo, estas tre altvalora trinkaĵo kun bonodoro kaj subtila dolĉeco.

LONGA HISTORIO

La Abrikotflora Vilaĝo estas pitoreska montvilaĝo en Fenjang-gubernio, Ŝanhi-provinco. Oni diras, ke Zihia, disĉiplo de Konfucio iam starigis vintrinkejon tie, kaj ke la ŝtona ŝaktabulo en la vilaĝo estis siatempe uzata de Zihia. Ĉi tiu onidiro iagrade spegulas la longan historion de la Abrikotflora Vilaĝo kaj la Fen-brando. Fakte, frue en la epoko de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj antaŭ 1,400 jaroj oni jam skribis la jenan frazon: “Mi trinkis tri pokalojn da Fen-brando.” En unu el la poemoj de Du Mu, poeto de la 9-a jarcento, oni povas legi la jenajn famajn versojn:

*“Kie sin trovas vintrinkej?” demandis mi ĝentile,
Kaj l' knabpaŝtisto montris Abrikotfloran Vilaĝon.*

Ankaŭ la tiamaj famaj poetoj Du Fu kaj Li Baj iam venis al tiu vilaĝo kaj trinkis brandon tie. Oni asertas ankaŭ, ke kiam Li Ziĉeng, gvidanto de la kampana ribela armeo en la 17-a jarcento, gvidis sian armeon al Pekino, li trapasis la vilaĝon kaj trinkis tie bongustan brandon kun granda plezuro. En 1916 la Fen-brando gajnis la unuarangan oran medalon en la Internacia Foiro de Panamo kaj alitempe gajnis 5 orajn kaj arĝentajn medalojn en kelkaj ekspozicioj de nia lando. El tio oni povas vidi, ke la Fen-brando jam delonge ĝuas bonan famon en- kaj ekster-lande.

GUSTO NEORDINARA

La kaŭzo, kial la Fen-brando el la Abrikotflora Vilaĝo estas fama, kuŝas en tio, ke ĝi diferencas de la aliaj brandoj per siaj neordinara prepara tekniko kaj kompare bonaj krudmaterialoj. Ĝi estas distilita el fermentaĵo de sorĝo, hordeo kaj pizo, kiuj abunde produktiĝas en la ĉirkaŭa kamparo. La tiea akvo, kun eksterordinaraj ecoj, tre konvenas por fari alkoholaĵon. Tio donas al la brando unikan guston. En la Abrikotflora Vilaĝo sin trovas malnova ŝtontabulo, en kies surskribo oni povas legi frazojn laŭdantajn la agrablan aromon, bonguston kaj klarecon de la Fen-brando.


Sed en la malnova socio, la produkto de la Fen-brando disvolviĝis ne rapide. En 1925 ĝi atingis sian plej altan nivelon antaŭ la Liberiĝo. Tiam kelkaj kapitalistoj kune starigis la Ginju-an Fen-brandan Kompanion, sed tiujare la plej alta produktokvanto ĉiutaga estis nur 400 kg. Post la Liberiĝo, subtenate de la Partio kaj la registaro, la produkto de la Fen-brando rapide disvolviĝis. En la periodo de 1952 ĝis 1957 la ŝtato trifoje faris investojn, kaj dank' al tio la antaŭa metilaboro ŝanĝiĝis en kompare modernan grandan vinfarejon. La jara produktokvanto pliiĝis je 40 obloj ol la plej alta en la historio.

PLI BONA KVALITO


En la disvolvado de la produkto, la laboristoj kaj oficistoj de la brandfarejo tre zorgas pri la altigo de la kvalito de sia produktaĵo. Ili faris multan laboron por heredi kaj disvolvi la tradician preparan arton de la Fen-brando. Veteranaj laboristoj alprenis ĉiajn rimedojn por inici la junajn laboristojn pri la tradicia prepara arto de la Fen-brando. Ili ankaŭ faris tri sinsekvajn grandskalajn eksperimentojn por pluapase mastri la leĝojn de la farado de la Fen-brando kaj por stabiligi kaj plialtigi la kvaliton.

Sekve de la plialtiĝo de sia kvalito, la Fen-brando honore akiris la titolon de "Fama Brando de la Lando" en la Unua Tutlanda Vinapreza Kunveno okazigita en 1952. En la Dua Tutlanda Vinapreza Kunveno en 1963 ne nur la Fen-brando daŭre konservis la titolon de honoro, sed ankaŭ la brando Bambufolie Verda impete enviciĝis al la famaj brandoj de la lando: ili gajnis po unu oran medalon. La Fen-brando kaj la brando Bambufolie Verda havas grandan debiton ne nur en ĉiuj lokoj de nia lando, sed ankaŭ en pli ol 30 fremdaj landoj. Ĉijare ilia eksporta kvanto multe pliiĝas ol tiu en la lasta jaro.

Sekve de la famiĝo de la brandoj, la Abrikotflora Vilaĝo fariĝis vizitinda loko por turistoj. Dum la lastaj jaroj multaj alilandaj amikoj ĝin vizitis. Iu specialistino el Francio S-rino Denise skribis jenan memornoton: "Antaŭ 15 jaroj, en Francio mi foje trinkis la faman brandon de Ĉinio Bambufolie Verda, kiun mia amiko portis al mi. Hodiaŭ mi tre ĝojas, ke mi venis al la Abrikotflora Vilaĝo, loko multe prikantita de la poetoj de Tang-dinastio. La bongustaj brandoj el ĉi tiu vilaĝo ja ĉiu havas sian apartan ĉarmon. Mi deziras ke ĉi tiuj bongustaj brandoj havu pli da amantoj kaj en Ĉinio kaj en la aliaj landoj, precipe en mia patrio."



Kemia analizado de la Fen-nektaro




Enboteligado de brando en la Vindistilejo de Abrikotflora Vilaĝo



Preparado de la brando Bambufolie Verda



Freŝaj fruktoj por la pasaĝeroj



Ĉinaj Priservantinoj en Civilaj Aviadiloj


GEJŜOŬ

LA pasaĝeroj, kiuj veturis per ĉinaj civilaj aviadiloj, ĉiuj sentas, ke la aviadiloj ne nur flugas glate kaj disponigas komfortajn apogseĝojn, sed ankaŭ havas simpatiajn priservantinojn kiuj ĉiam donas bonan zorgadon al la pasaĝeroj dum la flugado, por ke ili ne tediĝu kaj facile atingu sian malproksiman celokon. Menciante pri tio, oni multe laŭdas la pilotojn kaj priservantinojn en la civilaj aviadiloj de Ĉinio.

Ankaŭ la membroj de la priservanta grupo de la Pekina Administrejo de la Ĉina Civilaviada Kompanio estas same ofte laŭdataj de la pasaĝeroj. Ili ĉiuj estas diplomitoj el mezlernejoj. Ili forte amas sian laboron en la popola civila aviado, kvankam ordinaran tamen gravan por servi al la popolo. Ili estas modestaj, fervoraj kaj sinceraj al la pasaĝeroj, inter kiuj ofte cirkulas ilia bonfamo.

Foje, iu amikeca delegacio el afrika lando haltis en Hi-an survoje al Pekino. Estis aprilo. Ankoraŭ malvarmete. Tion rimarkinte, priservantino Vang Fuping rapide alportis la surtutojn de si kaj la pilotoj por la tropikaj gastoj. Samtempe ŝi pensis, ke en Pekino estas pli malvarme ol en Hi-an, tial ŝi tuj konsiliĝis kun la aviadilestro por kontaktiĝi kun la surtera komandejo. Kiam la aviadilo atingis Pekinon, la bonvenigantoj alportis al la gastoj ne nur amikecon, sed ankaŭ varmon havigante al ili po surtuton. La gastoj diris kun dankemo: "Bonegaj estas la ĉinoj, vere bonegaj!"

Disdoni bildgazetojn al la pasaĝeroj



Estas tre ĝene al longvojaĝaj pasaĝeroj, se hazarde iu el iliaj butonoj defalas aŭ kunkudro de la vesto disŝiriĝas. Sed en la ĉinaj civilaj aviadiloj oni ne bezonas zorgi pri tio, ĉar ĉiu priservantino havas kudrilujon kaj estas preta servi al la pasaĝeroj. Foje, kiam priservantino Ŝi Hiujing akompanis al Koreio eksterlandan amikon, batalantan por sendependiĝo, libereco kaj emancipo de sia patrujo, ŝi trovis, ke kunkudro de lia vesto pendanta sur la kajutmuro disfadeniĝis. Ŝi tuj prenis sian kudrilon kaj komencis labori, tiel absorbite kaj zorgeme. Ĉiu el la kudreroj montras plenan zorgon pri alilandaj fratoj. Tiu amiko diris kun admiro: "Kiel subtilaj kaj prizorgemaj estas la ĉinaj kamaradoj!"

En la aviadiloj ofte troviĝas infan-pasaĝeroj sen akompano de plenaĝuloj. Ili ofte veturas gaje en la sino de priservantinoj dum la tuta vojo. Iufoje, sub la zorgado de priservantino Maŭ Gujzi, iu apenaŭ unujara infano Lin Ĝi flugis pli ol 1000 kilometrojn, de Hi-an al Kunming. Survoje ŝi jen ĝin amuzis, jen manĝigis al ĝi kunkon trempitan en sukerakvo. Kiam la aviadilo transflugis altajn montojn, la priservantino klopodis kuŝigi la vikleman etulon kvieta en sia sino. La malgranda Lin Ĝi pasigis la vojaĝan vivon kvazaŭ ĉe sia proksimumo. En la sekvinta tago Maŭ Gujzi helpis 78-jaran maljunulinon enaviadiliĝi subtenante ŝin je la brako. Kiam la flugmaŝino forlasis Kunming kaj traflugis nubmaron super altaj montoj, ĝi iom balanciĝis pro kapricaj movoj

de la aerfluo. Ŝi atente observis la mienon de la maljunulino kaj trovinte malagrablan trajton sur la vizaĝo, ŝi tuj portis al ŝi la vomajsaketon, surmetis malsekan tukon al ŝia frunto kaj ŝmiris al ŝi per freŝiga oleo. Pro kadukeco, la maljunulino fine vomis buŝon da acidaĵo. Ŝi tuj ricevis de la knabino gargaran akvon, kaj poste faman perlo-piron de Junnan-provinco, kiun la knabino, senŝeligis kaj manĝigis al ŝi pecon post peco. Nokte la priservantino horizontaligis la dorsapogilon kaj kovris ŝin per lankovrilo por ke ŝi ripozu komforte. La maljunulino danke ŝin laŭdis ripetfoje: "Bonega knabino vi ja estas!..."

Iutage, kvar tibetanoj veturis per aviadilo de Ĉengdu al Pekino. Ili ĉiuj estis liberigitaj servutuloj. Ĉar unuafoje vojaĝis per aviadilo, ili sentis iom nervostreĉon kaj sinĝenon. Tiam la juna priservantino Ĝoŭ Venŝa alproksimiĝis al ili kaj fervore konigis komunajn sciojn pri aeroveturado. Dank' al ŝia varma servado per fruktoj kaj trinkakvo, ili rapide fariĝis viglaj kaj gajaj. En la varmo kaj ĝojo de la granda familio de la patrujo, ili komforte alflugis Pekinon.

Ĉu vi vidis la du junulinojn sur la fronta kovrilo de ĉi tiu numero? Ili estas deĵorantaj priservantinoj de la Pekina Administrejo de la Ĉina Civilaviada Kompanio. Ili prenas la servon al sia popolo kaj internaciaj amikoj kiel gloron, kaj ĝuas laŭdon kaj estimon de la pasaĝeroj kaj la popolo.



Popola Metiarto

VITRAJ ARTAĴOJ DE PEKINO

En la magazenoj de metiartaĵoj en Pekino, oni ofte vidas ke en vitrino estas elmontrataj diversaj vitraj bestetoj kun grandeco de arakidgrajno. Ili sin pozas diversmaniere: eta koko streĉe etendas sian kolon kvazaŭ prikritanta la mateniĝon, anaseto kaŭras aŭ paŝetas, cerveto, hundeto kaj kuniketo estas kurantaj... ĉiuj estas faritaj en brilaj kaj ĉarmaj koloroj, tre amindaj pro sia delikateco. Tiuj estas vitraj artaĵoj de Pekino.

La vitraj artaĵoj estas faritaj, laŭ ĉina antikva metodo el netravigebla vitro pli peza kaj malpli rompebla ol la ordinara, pli mola kaj tenema, kaj pli facile fandebla kaj knedebla post varmigo.

La metiarto de vitraĵoj en Ĉinio jam aperis en la 7-a aŭ 8-a jarcento laŭdire. La pekina vitraĵa metiarto estis alkondukita el Boŝan, Ŝandong-provinco en la 17-a jarcento. En la pasinteco, oni faris nur tiajn ornama-

jojn, kiaj kapvestaj bidoj, falsaj juveloj por imperiestraj kaj aristokrataj familioj. La tiamaj produktaĵoj kondiĉoj estis malbonaj, kaj la metiartistoj devis blovinciti olelampan flamon per sia buŝo por fandi vitron. Nun por tio oni jam uzas anstataŭe kunpremitan aeron, kaj pliigis la specojn de produktaĵoj de pli ol 50 ĝis pli ol mil. Kaj krome, oni ankaŭ ŝanĝis la recepton de la uzata materialo kaj la procedojn, tiel ke la produktaĵoj havas brilon, koloron kaj travideblecon simile al jado, smeraldo, agato kaj neniam krevas.

Krom la etaj bestoj kiel ludaĵoj por la infanoj, produktiĝadas ankaŭ vitraj floroj, fruktoj, pend-ekranoj, miniaturaj vidaĵoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj.

Rakonto pri Kutimdiro

ĈU-AJ KANTOJ SONAS ĈIRKAŬE

"Ĉu-aj kantoj sonas ĉirkaŭe" estas ĉina popoldiro prenita el la artikolo "Vivo de Hiang Ju (regnestro de Ĉu)", en la libro *Ŝiĝi (Historiaj No-*

toj), kiun verkis Sima Kian en la dua jarcento a. K.

La biografia verko rakontas ke post ruiniĝo de Kin-dinastio (221-206 a. K.), restis ĉefe du potencoj, nome la Han-armeo sub komando de Liu Bang kaj la Ĉu-armeo de Hiang Ju, kiuj batalis inter si por hegemonio. La Ĉu-armeo plurfoje malvenkis, kaj estis fine sieĝata de la Han-armeo ĉe Kajhia.

Hiang Ju kaj liaj subuloj ĉiuj venis en ribela militiro el Ĉu-lando. Tion sciante la Han-armeo faris artifikon per imita kantado de Ĉu-regnaj polkantoj en iu nokto. Aŭdinte ke ĉirkaŭe sonas Ĉu-aj kantoj la Ĉu-armeo pensis, ke ĉiuj lokoj de ilia regno estas okupitaj kaj Ĉu-popolanoj jam aliĝis al la Han-armeo, tial la armeanoj senmoraligis, ne plu volis batali, kaj donis eblon al la Han-armeo gajni la venkon.

Deposte, oni prenas tiun ĉiiron por figure esprimi la izolecon kaj senhelpecon de iu sieĝata de malamikoj. Nun ĝi estas uzata por priskribi la senhelpecon de imperiistoj kaj aliaj reakciuloj, kies amikoj turnas al ili sian dorson aŭ simple ilin forlasas.

La Monto Luŝan


LA monto Luŝan estas unu el la famaj pitoreskaj kaj belklimataj somerrestadejoj en Ĉinio. Ĝi situas ĉe la bordoj de Jangzi-rivero kaj Pojang-lago en la norda parto de Gianghi-provinco, kaj ĝia ĉirkaŭlino longas ĉ. 250 kilometrojn. La monto havas multajn krutajn rokegojn, abruptajn ŝtonmurojn, kristale klarajn fontojn kaj akvofalojn, kiuj prezentas tre belan pejzaĝon, kaj lokojn de historia intereso. Pro la ekzisto de tiuj pli ol ducent vidindaĵoj ĝi estas tiel fama, ke oni ĝin priskribas de antikveco kiel la plej belan pitoreskejon en la mondo. Nun ĝi fariĝis frekventejo de ĉinaj laboruloj por ripozo kaj plezurvojaĝo.

La plej alta montpinto de Luŝan estas Dahanjang-

Ŝimenggian-akvofalo



La Rokego de Drakokapo



feng kiu estas 1543 metrojn alta super la marnivelo. Surgrimpinte ĝin en bela tago, oni povas havi birdvidadon de la pentrinda pejzaĝo en la malproksimo: Jangzi-rivero kuŝas kiel rubando, Pojang-lago etendiĝas tiel vaste en nebula vualo, ke la akvoj intermiksiĝas kun la ĉielo. Nordoriente de Dahanjangfeng estas kvin montpintoj kiuj ricevas la formon de maljunuloj sidantaj ŝultro-ĉe-ŝultre en diversaj pozoj, kiujn oni nomis "La Kvin Maljunuloj". Kvankam ili estas iom malpli altaj ol Dahanjangfeng, tamen pro sia impona grandiozeco ili estas multe admirataj de la vizitantoj.

Ĉar Luŝan situas apud la rivero kaj lago, ĉiam ŝvebas ĉe ĝi nuboj kaj nebulo, kaj ankaŭ tio formas unikan belon de Luŝan. En la valoj jen ŝvebas nebulaj gazoj kaj vualas la vizaĝon de Luŝan, jen ili malaperas subite kaj montriĝas denove pejzaĝo ĉarma. Su Dongpo (1037-1101 p. K.), nia granda poeto de Song-dinastio priskribis jene la pejzaĝon de Luŝan en sia versaĵo:

*La veran vizaĝon de Luŝan ekvidi ja oni ne povas
Nur tial, ke l' montrigardanto dumtempe surmonte
sin trovas.*

Sur la monto fluas multaj torentoj kiuj formas multajn belajn akvofalojn kaj aldonas al la pejzaĝo de Luŝan apartan ĉarmon. Ekzemple, Jujan-akvofalo falegas tra la aero kun tondra bruoj; la Ĉevalvosta Akvofalo abrupte ĵetiĝas de sur la montsupro de Hanjangfeng,

Funebra Rememoro pri An Bo

REVOLUCIA muzikisto kaj esperantisto An Bo jam forlasis nin unu jaron. Sed mi sentas ke li kvazaŭ vivas ankoraŭ inter ni. Lia simpata figuro ofte aperas antaŭ miaj okuloj, kaj lia kortuŝa kanto ĉiam resonas en miaj oreloj. Mi kvazaŭ vidas en mia imago ke li ankoraŭ sindone kreas en profunda nokto kaj kolektas kaj redaktas popolajn muzikaĵojn inter laboruloj.

Mi konatiĝis kun An Bo en la jaro 1945, sed pli frue mi jam kantis liajn kantojn kaj prezentis operojn de li verkitajn. Mi estis profunde emociita de liaj verkoj. Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, ni preskaŭ ĉiam laboris kune. Mi ricevis de li multajn bonajn influojn kaj edukon kaj sentas ke mi havas devon prezenti al diverslandaj esperantistaj amikoj lian vivadon okaze de la unua datreveno de lia morto.

Kamarado An Bo naskiĝis en 1915, en kamparana familio en Mouping-gubernio, Ŝandong-provinco. Kiel mezlernejo li jam partoprenis revoluciajn agadojn kaj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1935. Multon li faris sub la gvido de la Partio.

Lia muzikista vivo, kiun li komencis, kiam li studis en la Lusina Literatura kaj Arta Instituto, estis unu flanko de liaj revoluciaj laboroj. Dum tiu periodo li registris multajn ariojn de popolaj kantoj kaj adaptis al ili novajn tekstojn, por kontentigi la propagandajn bezonojn de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Kaj poste li ankaŭ mem kreis multajn kantojn. Li estis unu el la ĉefaj kreintoj de la *jango-a*** opero "Gefratoj Plugas", kies Esperan-



An Bo (maldekstre) studas popolan muzikon kun la maljunaj artistoj.

ta traduko jam aperis kaj ĝi estis la plej populara el liaj fruaj verkoj. Ĝi spegulis unu aspekton de la granda produkta movado tiam disvolvata en la Limregiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia. En ĝi An Bo kreive uzis la

disŝprucigante centojn da miloj da akvofadenoj kiuj donas la formon de ĉevalvosto. Li Baj (701-762 p. K.), la granda poeto de Tang-dinastio ĝin kantis jene:

*De l' trimil-futa alto ĝi flugan salton faras —
Jen kvazaŭ de l' ĉielo la Laktovojo falas.*

Estas videblaj ĉie sur la monto temploj diversstilaj, rokegoj groteskaj, kavernofontoj fabelecaj kaj ĝardenoj riĉaj je belaj floroj kaj arboj.

Sed, dum la regado de Kuomintango antaŭ 1949, la ĉina laboranta popolo ne havis la eblon admiri la belan pejzaĝon de Luŝan. Tiutempe, la ĉefaj pitoreskejoj de la monto estis okupataj per tiaj konstruaĵoj kiaj la "loĝejo de prezidanto Ĉiang Kajŝek", "vilao de Marshall" kaj aliaj privataj domoj kaj ĝardenoj de multaj imperiistoj kiuj sin tenis fieraĉe, kvazaŭ ili estus la mastroj de

Ĉinio. Por garantii ilian sekurecon, konstruiĝis sur la monto aro da redutoj, kaj dense instaliĝis elektraj dratbariloj. La nuraj laborantaj popolanoj, kiuj povis suriri la monton, estis ŝtonistoj kaj palankenistoj, kaj ili devis montri sian "Eniran Karton", pagi impostojn pro la palankeno kaj vojiro.

La fondiĝo de la nova Ĉinio forbalais en ĉi tiu pejzaĝa regiono ĉiujn ekspluatantajn kaj imperiismajn elementojn. Ekde la jaro 1953, oni komencis jam la konstruadon de la natura sanigejo ĉe la monto Luŝan. Nun ĉi tie troviĝas 11 sanatorioj kaj ripozhejmoj ĉiuj bone ekipitaj, kiuj ĉiujare akceptas labormodelojn kaj avangardulojn el diversaj frontoj de la socialisma konstruado en la patrolando. Estas ankaŭ fremdaj amikoj vizitantaj Ĉinion kiuj ŝatas fari ekskurson al Luŝan aŭ havi mallongan restadon tie por ripozo.

lingvon kaj popolan operformon familiarajn por la polamasoj. Oni rigardas ĝin kiel bonan komenciĝon de la ĉina nova opero kun revolucia, nacia kaj amasa karaktero, post la Literatura kaj Arta Kunsido en Janan. Liaj aliaj kantoj, kia "Faligu Ĉiang Kajŝek kaj Liberigu la Tutan Ĉinion", ĉiuj estis tre ŝatataj de la batalantoj kaj amasoj kaj instigis ilin al batalo.

Post la Liberigo, kvankam li estis ŝarĝita per pezaj gvidaj laboroj kiel prezidanto de la Liaŭning-a Filio de la Unuiĝo de Ĉinaj Muzikistoj, estro de la Konservatorio de Ĉina Muziko, membro de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj k. a., li tamen kreis multajn verkojn profunde amatajn de la amasoj. Inter ili estas la kanto "Ho, Fuhin, Vi Urbo sen Nokto", kiu spegulas la socialisman konstruadon de Ĉinio, la kanto "Ho, Pasejo de Amikeco, Ho, Ruĝa Rivero", kiu spegulas la internacisman spiriton de la ĉina popolo, la operoj "Monumento" kaj "Signalfajro sur Stepo", kiuj malkaŝas la terurajn krimagojn de la japanaj imperiistoj kaj pri-kantas la popolajn revoluciajn luktojn, la teatraĵo "Printempa Vento Blovas al Nuomin-rivero", kiu (poste filmigita) priskribas la socialisman transformon, la longa poemo pri-kantanta la komunisman batalanton Lej Feng "Himno al Lej Feng" kaj pluraj muzikaj disertaĵoj kaj kritikaj verkoj pri literaturo kaj arto. En la kreado de la eposo de muziko kaj danco "Ruĝas la Oriento", li partoprenis en ĝia muzika kreado kaj en organizaj laboroj.

En kolektado, redaktado kaj studado de naciaj kaj popolaj muzikaĵoj kamarado An Bo faris elstaran kontribuon. En la komenca periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam li estis en la Lusina Literatura kaj Arta Instituto, li jam komencis kolektadon de popolaj kantoj de norda Ŝenhi kaj de aliaj lokoj, tiel ke li ricevis la alnomon "Magnato de Popolaj Arioj". Poste li kolektis kaj redaktis la muzikaĵojn de *ĉinĉiang*[†], mongolajn popolkantojn kaj popolajn muzikaĵojn de aliaj lokoj. Ĉirkaŭ 1956, kiam li laboris en la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kiel specialisto, li kolektis kaj redaktis volumon da "Vjetnamaj Popolkantoj" kun vjetnamaj kamaradoj.

Kiel revolucia muzikisto, kamarado An Bo ĉiam sekvis en siaj kreaĵoj kaj esploraj laboroj la direkton de prezidanto Maŭ Zedong — literaturo kaj arto en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Multaj gravaj revoluciaj eventoj trovas sian speguliĝon en lia arta kreado. Li neniam kreis verkojn, kiuj taŭgas nur por amuzi nenifarulojn sed havas nenion komunan kun revoluciaj luktoj. Li speciale oponis kontraŭ ĝemado sen vera malsano en literatura kaj arta kreado. Liaj kreaĵoj klare manifestas la spiriton de la epoko kaj havas fortan nacian stilon. Li tre atentis pri lernado kaj uzado de la lingvo (inkluzive la muzikan) de la amaso kaj ĉiam klopodis por ke liaj verkoj estu bonvenaj al kaj ŝatataj de la amaso.

La laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estis lia objekto de priservado, kaj ilia vivo estis la fonto de lia kreado. De tre multaj jaroj li ĉiam persistis pri enprofundiĝo en ilian vivon. Li trovis multajn korajn amikojn en la amaso kaj ricevis profundan edukon de maljunaj laboristoj kaj malnovaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Dum la Liberiga Milito, kun ensem-



Esperanta traduko el liaj verkoj

blo sub sia gvido li iris de Ĉengde al la montregiono de Hinglong kaj travivis la malfacilajn jarojn, plenajn de luktoj, kune kun tiea popolo. Post la venko de la milito tra la tuta lando, li ankoraŭ ofte iris vivi tie. En 1962 li speciale iris al Fuhin en la Nordoriento por pasigi la jarfinon kun la laboristoj kaj oficistoj de la tiea karbominejo kaj verkis prozaĵojn kaj kantojn plenajn de entuziasmo por laŭdi la grandan lukton por akiro de karbo. Trovi kaj eduki amatorajn literaturistojn kaj artistojn en la amaso estis lia alia okupo, al kiu li donis grandan atenton.

Kamarado An Bo tre diligente lernis marksism-leninisman kaj la penson de Maŭ Zedong kaj precipe zorgis por persone praktiki ilin en transformado de sia ideologio kaj plibonigado de siaj laboroj. Jam en 1960 li verkis traktaton "Lernado de la Penso de Maŭ Zedong Estas Ŝlosilo por Bone Fari Laborojn". Li posedis kelkajn fremdajn lingvojn, kiujn li ellernis ĉirkaŭ la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Esperanton li lernis antaŭ la Milito kaj restis fervora esperantisto dum preskaŭ 30 jaroj. En la Tutlanda Esperantista Kunsido okazinta en Pekino, 1963, li kontribuis per prezento de pozitivaj kaj gravaj proponoj por antaŭenpuŝi la Esperanto-laborojn. Li verkis artikolon por *El Popola Ĉinio* en 1964 kaj zorgis pri la ĉinaj Esperanto-laboroj eĉ kuŝante en hospitalo antaŭ sia morto.

Ĉiuj kiuj kontaktiĝis kun kamarado An Bo, trovis ke li estas homo simpla, modesta, simpatia kaj emas vivi kaj labori en kondiĉoj malfacilaj. Kiuj laboris longe kun li, povis plie senti lian grandan fervoron unuiĝi kun kunlaborantoj, rilati intime kun la amaso, prizorgi la ideologian progresadon de kamaradoj kaj solvi malfacilaĵojn en ilia vivado. Mi havis oftan kontakton kun li en laboroj kaj ricevis de li profundajn utilajn influojn en ideologio kaj arto. En lia morto mi perdis unu bonan instruiston kaj amikon en la revoluciaj vicoj. En la muzika laboro, li jam starigis por mi modelon, kaj mi lernos de li firme sekvi la direkton de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto por pli bone servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialismo.

* La aŭtoro estas nuntempa revolucia komponisto kaj direktoro de la Ŝenjanga Konservatorio. Pri li ni raportis en nia revuo, n-ro 5, 1965.

** jango — formo de ĉina popola danco.

† ĉinĉiang — loka opero de Ŝenhi-provinco.

Transformiĝo de la Ĉina Skribolingvo

(Daŭrigo)

STADIO DE VARIAJ STREKOJ

4. *Liŝu*: Kvankam *ŝiaŭĝuan* konservis ankoraŭ iom da bildeco, tamen jam montriĝis ĉe ĝi la ĉefa tendenco anstataŭigi bildojn per signoj. Sed tute nepraktikaj estis la signoj tiel malfacile desegneblaj. Tial ĝi fariĝis *Guanŝu* (skribo dokumenta), uzata nur en tre seriozaj okazoj. Ĉar la registaraj suboficistoj, limdefendaj oficiroj kaj gravuristoj de vazoj kaj komercistoj estis ĝenerale senpaciencaj pri tiaj serpertumaj strekoj, ili kreis alian skriboformon pli facilan por pintaj penikoj, kaj ĝin oni nomis *Liŝu*:

MONTO						
AKVO						
BIRDO						
FIŜO						
ĈEVALO						
CERVO						
HOMO						

Tia skribo ne plu zorgis pri figura simileco kaj beleco de linioj, la skribantoj ŝajne konsideris nur pri la facile-skribebleco por peniko. Tiu skribo ne estis tiam aprezata de la grandaj sinjoroj, kaj ili nomis ĝin *Liŝu*, t. e. "skribo de pedeloj". Sed tiu skribo kreita de la popolamaso de la malsupera socitavolo metis finon al la stadio de la malnova bildeca skribo, kaj kondukis la ĉinan skribolingvon en tute novan stadion de variaj strekoj.

Kin-dinastio estis senprecedence mallonga (ruiniĝis en la jaro 206 a. K.), kaj baldaŭ komenciĝis Han-dinastio (206 a. K. - 220 p. K.). *Liŝu* fariĝis

tiam pli vaste uzata, eĉ en la superaj socitavoloj. Kaj iom post iom ĝi normiĝis kaj fariĝis la unua matura kaj bela formo en la stadio de variaj strekoj de la ĉina skribolingvo. Por distingi ĝin disde la primitiva *Liŝu*, oni nomas la lastan *Gu-Li* (antikva *Li*) aŭ *Kin-Li* (Kin-a *Li*) kaj la maturan *Gin-Li* (Nuna *Li*) aŭ *Han-Li* (Han-a *Li*). Jene estas specimenoj de la matura *Liŝu*:

MONTO				
AKVO				
BIRDO				
FIŜO				
ĈEVALO				
CERVO				
HOMO				

5. *Kajŝu*: *Liŝu* estas skribo kiu, oni povas diri, utiligis laŭeble la molecon de peniko, kaj ĝia aspekto tre similas al la delikataj kaj senfortaj belulinoj en antikvaj pentraĵoj de Ĉinio. Sed skribolingvo estas instrumento, kies plej grava kvalito devas esti oportuneco en praktika uzado. Sed al tia skribo kun malfacilaj strekoj evidente mankis praktikeco, tial en Han-dinastio aperis alia ĉinlingva skriboformo, nomata *Kajŝu*, aŭ *Ĝenŝu*, kun kompare regula kaj strikta konstruo. Tio estas la plej ortodoksa formo de la ĉina skribolingvo uzata

山	水	鳥	魚
MONTO	AKVO	BIRDO	FIŜO
馬	鹿	人	
ĈEVALO	CERVO	HOMO	

ankoraŭ nuntempe, en regula manskribado kaj presado:

6. Hingŝu (populara skribo): Sed la supre menciita skribo plue simpliĝis dum longa historia periodo. En la iom postaj jaroj de ĝia ekzisto, estiĝis alia pli libera skribo nomata *Hingŝu*:

山	水	鳥	魚
MONTO	AKVO	BIRDO	FIŜO
馬	鹿	人	
ĈEVALO	CERVO	HOMO	

En la sama tempo, dum sia uzado de *Kajŝu*, ankaŭ la popolamaso seninterrompe malpliigis kaj kunligis ĝiajn strekojn, ellasis ĝiajn partojn, por tiel ĝin simpligi. Granda nombro da tiaj simpligitaj vortoj sin trovas en antikvaj mankopiitaj libroj kaj ksilografiaj libroj eldonitaj de la popolo, ekzemple:

FIŜO	魚 魚 魚
BIRDO	鳥 鳥 鳥 鳥
ĈEVALO	馬
CERVO	鹿

Pro tio ke la popolamaso postulas tradicie de la antikveco simpligon de la skriboformo, kaj tia simpligita skribo faciligas la lernadon por laboristoj, kamparanoj kaj infanoj, tial post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, oni kolektis kaj elektis multe da simpligitaj vortoj, proklamis ilin kiel normajn formojn kaj arkaikigis la malnovajn formojn kun pli multaj strekoj. Nun en *Kajŝu* la vorto por birdo estas skribita kiel 鸟 (la malnova estas 鳥), tiu por fiŝo 鱼 (魚) tiu por ĉevalo 马 (馬).

7. *Caŭŝu* (rapida skribo): Antaŭ la periodo de *Kajŝu* aperis ankaŭ pli libera kaj rapida formo de *Liŝu*, nomata *Caŭŝu*. En la komenco *Caŭŝu* estis praktike uzata, sed poste kiam ĝenerale uziĝis *Kajŝu*, *Hingŝu* kaj la simpligitaj formoj de *Kajŝu*, ĝi disvolviĝis ekskluzive en la direkto de artismo, kaj fariĝis tre elstara arto de belskribado. Tiu arto trovas ankoraŭ siajn heredantojn eĉ hodiaŭ. La manskribaĵoj de Prezidanto Maŭ Zedong estas vario de *Caŭŝu*. *Caŭŝu* estas ritmo de forto, ĝi ne nur multe diferencas de la antikva hieroglifa skribo, sed ankaŭ tute liberiĝis de la formo de strekaj komponaĵoj de la regula ĉina skribolingvo. Por fini mian artikolon mi donu ĉisube specimenojn de *Caŭŝu* — antikve priskribitaj kiel “flugantaj drakoj kaj dancantaj feniksoj”:

HOMO	人 人 人 人 人 人
AKVO	水 水 水 水 水 水
MONTO	山 山 山 山 山 山
ĈEVALO	馬 馬 馬 馬 馬 馬
CERVO	鹿 鹿 鹿 鹿 鹿 鹿
FIŜO	魚 魚 魚 魚 魚 魚
BIRDO	鳥 鳥 鳥 鳥 鳥 鳥



Kulturon al Montvilaĝanoj

JAM dek jarojn, Hoŭ Sulin, funkciulo de la Kultura Domo de Lin-gubernio de Ŝanhi-provinco rondvizitadis montvilaĝojn vektportante "kulturaĵ-kestojn".

Hoŭ Sulin nun aĝas je pli ol 40 jaroj. Li lertas en verkado, pentrado, kantado kaj ludado de muzikilo. Li iam laboris kiel instruisto de elementa lernejo kaj estro de lernejo por klerigi analfabetojn. En 1955, li estis transpostenigita al la gubernia Kultura Domo. Post ne longe la estro de la Domo donis al li taskon, ke li vektportu librojn, periodaĵojn kaj bildgazetojn al la vilaĝo Jugian, dirante: "Jen paro da kulturaĵ-kestoj, nia malnova tradicia heredaĵo, kiun ni neniam devas forĵeti." Ĉe la komenco, Hoŭ Sulin konsideris la vektportadon de la kestoj en vilaĝoj kiel ion humiligan por ekslernejestro kaj sentis honton. Pripensante la taskon, li maldormis tutnokte. En la sekvinta tago, antaŭ la tagiĝo li jam ekvojis vektportante la kestojn por ne renkonti konatojn sur stratoj. Sed estis malfeliĉe, ke tuj ekpaŝante sur la straton li renkontis sian lernanton venantan de kontraŭa direkto.

"Kien vi iras, sinjoro instruisto?" mire demandis la lernanto.

La demando ĵetis lin en grandan embarason. Ruĝiĝis lia tuta vizaĝo, kaj li ne kuraĝis levi la kapon. Li nur ion balbutis anstataŭ malkaŝe respondi kaj forrapidis por sin savi el la embaraso.

Kiam li venis al la vilaĝo Jugian, la komunumanoj ĉiuj ridante lin bonvenigis kaj traktis kiel malnovan amikon longe neviditan, kvankam li neniam tien iris antaŭe. Oni diris: "Hodiaŭ efektiviĝis nia delonga sopiro." Baldaŭ lin ĉirkaŭis homoj ringon post ringo, ke eĉ aero ne povis traflui. Al li oni elmetis multajn demandojn. Iuj demandis pri novaĵoj en la mondo, aliaj pri novaj libroj kaj bildoj. Estis neeble por kamaraĉo Hoŭ respondi ĉiujn iliajn demandojn, kaj li sin riproĉis, ke li scias malmulte da novaĵoj kaj kunportis tro malmulte da libroj kaj bildoj. Poste unuj proponis al li teon kaj aliaj manĝaĵojn. Tia varma regalo okazis tute ekster lia atendo. Tio forgesigis al li la tuttagan lacon, kaj li fervore laboradis ĝis profunda nokto.

K-do Hoŭ estis forte kortuŝita de la varma akcepto. Nun li bone komprenis, ke la komunumanoj ŝatas kaj bonvenigas la paron da kulturaĵ-kestoj nur pro tio, ke ili urĝe bezonas kulturen nutraĵon. Kaj ju pli la amasoj lin bonvenigis, des pli li sentis maltrankvilon: "Hontinda ne estas la portado de kestoj, sed mia malnobla supereca sintenaĉo de intelektulo." Tiu instruplena leciono estos neniam forgesibla por li.

Ekde tiam li komencis vizitadi la vilaĝojn meminitate por porti al ili kulturon. Ĉiufoje li portis kiel eble plej multe da novaj libroj, gazetoj kaj bildlibroj, kaj poste al siaj kestoj li aldonis radioricevilon, lumbildojn,

stereoskopojn ktp. Nun la portŝarĝo pliiĝis de 15-20 ĝis 25-30 kilogramoj. Estis tre malfacile vektporti tiom pezan ŝarĝon sur monta vojo. Sed, k-do Hoŭ Sulin bone scias: per pli multe da ŝvito, liveriĝos pli multe da kultura nutraĵo al la komunumanoj. Kontribuante sian parton al ili, li sentis koran ĝojon, kvankam li iom laciĝis.

Iufoje, li iris al la popolkomunumo Caŭjuping. Survoje li devis trapasi kelkajn vilaĝojn, kaj ĉe ĉiu vilaĝo, komunumanoj lin svarme ĉirkaŭis por foliumi librojn kaj albumojn, aŭ petis lin kantrakonti. Ĉiujn iliajn postulojn li volonte plenumis. La haltadoj lin malfruigis je duontago. Vespere, kiam li atingis valon fore de vilaĝoj, lin trafis subita pluvego. Spite sian stomakan malsanon li demetis la jakon kaj kovris per ĝi la aparatojn kaj librojn, ke la pluvo ne difektu ilin. Kiam li ekdaŭrigis la iradon poste, akvego jam baris al li la vojon; tiam li devis ĉirkaŭiri tra montaro. Li faletadis iradante en glitiga kotajo, liaj korpo kaj manoj estis pikvunditaj de dornoj. Kiam li atingis la vilaĝon Caŭjuping, li jam fariĝis kotplena.

Serena estis la sekvinta tago. K-do Hoŭ vizitis laŭplane la produktajn brigadojn Gaŭgiaŝan, Liugiaŝan k.a. vektportante la kestojn. Kiam li revenis al la oficejo de la komunumo post plenumo de la tasko, Ĝang Venĝi, la sekretario de la komunuma kompartia komitato diris al li: "Vi devus reveni al la urbo jam nun, sed la produktaj brigadoj Duanhian, Ĝanggiaŝan, Ŝibaj- (daŭrigo sur p. 172)

La komunumaninoj rigardas bildojn.



Rondirantaj Lernantoj

IUN vesperon, kiam la geinstruistoj de la lernejo de la Ŝanhaja Silk-ŝpinteksejo streĉatente diskutis en kunveno, subite eniris tri knabinoj en kamparana kostumo. Kiun ili volas vidi?

VENI POR LERNADO

Poste la geinstruistoj eksciis, ke la tri knabinoj estas filinoj de ŝiploĝantoj, alvenintaj al Ŝanhajo de Jihing-gubernio. Kiam la ŝipo eniris Suĝoŭ-riveron, ili ekpensis pri sia lernado. Kaj tiun nokton, ili surbordigis kun siaj librosakoj, por serĉi lernejojn. Ili komencis sian serĉadon ekde la ponto de Vuning-strato. Vidinte lernejojn, ili tuj eniris por peti instruadon, sed ili malsukcesis en tri tuttagaj lernejoj, ĉar la instruistoj post la lecionhoroj reiris hejmen. Ili ne estis deprimitaj kaj daŭre serĉis. Fine ili vidis geinstruistojn de la lernejo de la Ŝanhaja Silk-ŝpinteksejo.

RONDIRA LERNADO

La knabinoj montris al la geinstruistoj la "Atestilon por Rondira Lernado" en kiu estas komuna letero de la Kultureduka Buroo de Jihing-gubernio, Fiŝkapta Kooperativo, Federacio de Transportaj Kooperativoj al lernejoj diverslokaj. La letero diris: "Por disvastigi elementan edukadon, ni aplikas laŭ la karakterizaĵoj de la produktado kaj vivo de la fiŝistoj kaj ŝiploĝantoj, por iliaj gefiloj, la klerigan sistemon 'surŝipe partopreni produktadon kaj surborde lerni'. Ni esperas, ke la lernejoj kaj geinstruistoj diverslokaj nin helpu kun revolucia spirito."

Ĉar la fiŝistoj kaj ŝiploĝantoj tutjare vivas sur akvo, ili devas ĉiam moviĝi de loko al loko, multaj lernaĝaj geknaboj kiuj devas fari helpajn laborojn, ne povas ricevi edukon en difinitaj lernejoj. Sed nokte ili povas resti en fiksaj lokoj. Konsiderante tion, la Kultureduka Buroo de Jihing-gubernio kaj aliaj unuoj enkondukis tiun sistemon. Post la lecionoj la instruistoj devas skribi sur la atestilo la enhavon de la lecionoj, daton, nomon de la instruisto, por ke la lernanto povu daŭrigi la lernadon en alia lernejo.

La tri knabinoj estas ŝipistaj filinoj de la Transporta Kooperativo de Jihing-gubernio, el kiuj du estas fratinoj, unu kun 17-jara aĝo nomiĝas Taj Hongmej, la dua kun 14-jara aĝo nomiĝas Taj Lanjing. Ili komencis lerni en la unua duono de la jaro en kurso por rondirantaj lernantoj de Jihing-gubernio. Dum la sep pasintaj monatoj, ili lernis diligente kaj jam vizitis 50 lernejojn en urboj kaj vilaĝoj.

GLORA TASKO


Informiĝinte pri tio, Vang Mengfan, instruistino de la lernejo de la Ŝanhaja Silk-ŝpinteksejo, forte kortuŝiĝis. Post la aprobo de la lerneja gvidantaro, ŝi tuj komencis doni lecionon al la tri knabinoj en unu el la klasĉambroj. Kiam la kunsido finiĝis, ankaŭ la aliaj geinstruistoj konkure donis helpon al la tri knabinoj: unu regalis ilin per teo, alia donis lecionon. Kvankam k-dinoj Vang Mengfan, Sun Gianjoŭ, Vang Juĝen jam prenis sur sin la taskon de instruado al la knabinoj, tamen ankaŭ aliaj sidis ĉe iliaj pupitroj por doni helpon al ili, farante klarigojn en dialekto ke la knabinoj komprenu facile. Ĉiuj volis doni tian gloran lecionon.



VENU DENOVE

La tri knabinoj lernis energie. Sub la serioza helpo de la instruistoj ili laŭtleĝis fojon post fojo, kaj kiam ili trovis ion nekomprenebla, ili tuj petis klarigon. Baldaŭ ĉiu el ili jam povis legi la novan tekston kaj klarigi la enhavon. Kiam la knabinoj glate laŭtleĝis, aperis rido sur la lipoj de la instruistoj; ili ĝojis pro tio, ke ili povis fari ion por la Partio en disvastigo de la elementlerneja edukado.

Post la oka, kiam la knabinoj adiaŭis la instruistojn, ĉi tiuj diris foj-refoje: "Kiam vi venos Ŝanhajon refoje, venu al nia lernejo. Ni promesas doni lecionon tuj post via alveno." Kun danko kaj ĝojo la tri knabinoj foriris el la lernejo.



GIANG ĜENGMIN:

“Farmpaga Kolektejo”

LA “Farmpaga Kolektejo” estas parto de la “Bienuldoma Ekspozicio” en Daji-gubernio, Siĉuan-provinco. La ekspoziciejo, antaŭ la Liberiĝo, estis la biendomo de Liu Vencaj, tirana bienulo, kiun kamparanoj nomis “Demon-reĝo”. Li estis ankaŭ militaristo, burokrato kaj ĉefo de reaciaj superstiĉaj grupoj. Lia familio okupis 15,000 hektarojn da tero, el kiuj ĉ. 800 hektaroj da bonaj kampoj estis sub lia posedo.

Tiutempe, Liu Vencaj kruele ekspluatis la kamparanojn, uzante ĉiajn punojn, ekzemple, ilin fermi en akva karceroj, enterigi vivajn homojn, kaŭrigi en ferkaĝo k. a. por laŭplaĉe turmenti kaj mortigi la farmistojn kaj mizerajn kamparanojn. Por nur la du biendomoj en Daji-gubernio li jam okupis perforte teron kaj la loĝejon de pli ol 100 familioj kun areo de pli ol 6 hektaroj.


Post la Liberiĝo, la popola registaro gvidis la mizerajn kamparanojn batali por agrara reformo, kaj konfiskis la biendomojn kaj teron de Liu Vencaj. Unu el liaj domoj estas aranĝita kiel ekspoziciejo, por ke la vasta popolamaso sciu kaj neniam forgesu la krimojn de la bienula klaso.

“Farmpaga Kolektejo” estas aro da argilaj figuroj kreitaj de ĉinaj skulptistoj en la farmpaga kolektejo de tiu biendomo.

Ĉi tiu skulptarta verkaro konsistas el 114 homfiguroj kun grandeco de homo. Ĝi estas dividita, laŭ la tiama farmpaga proceso, en 6 scenojn, t. e. Alveno de la Farmpagantoj, Grenekzameno, Grenmezuro, Kontreguligo, Farmpagigo kaj Kontraŭstaro, kiuj prezentas po unu apartan aspekton de la farmpaga kolektado. La verko profunde kortuŝas la rigardantojn kaj okulfrape malkaŝas la kruelan ekspluatadon fare de la bienula klaso, kaj cetere ĝi prezentas ankaŭ la doloron kaj malamon de la kamparanoj kaj ilian neflekseblecon.

Tiuj artaĵoj estas sukcese kreitaj de dekelkaj junaj skulptistoj kaj popolaj artistoj en argila skulptado, sub la gvido de la lokaj koncernaj organizoj kaj rekta helpo de la vasta kamparana amaso. Dum la kreado, la skulptistoj penetris en la kamparon, kie ili faris enketojn kaj studojn, petis konsilojn de kamparanoj, kaj precipe ilia intervjuo al la kamparanoj, kiuj suferegis de la bienulaj kruelaĵoj, vekis en ili fortan deziron krei pro la suferintoj. Pli ol mil kamparanoj apude loĝantaj donis al la skulptistoj valorajn opiniojn, kaj dank’ al tio ili kreis la artaĵojn kortuŝajn kaj ideologie altnivelajn. Multe da laboruloj diris, ke la vizito al la Ekspozicio rememorigis al ili la mizeran pasintecan, kaj ili amas ankoraŭ pli forte la novan socion. Rigardinte la skulptitan figuron de la bienulo Liu Vencaj, iu maljunulino pli ol 60-jara eĉ tiel indignis ke ŝi volis ĝin bati per bastono. Tiu granda kreaĵo de argilskulpta arto estas rigardata de personoj en la artista rondo kiel “revolucio de la plastika arto kaj plastika arto de la revolucio”.


La ĉi tie donitaj bildoj montras nur kelkajn ĉefajn scenojn kaj detalajn partojn de iuj homfiguroj.







Devigate la maljuna kamparano portas al la bienulo sian grenon produktitan per sango kaj ŝvito.

Post ventumado per grenventumilo speciale farita por ekspluatado, el la 100 litroj da bona greno, kiun la maljuna kamparano pagas, restas nur 70 aŭ 80 litroj. Apenaŭ la maljunulo levis falintajn grajnojn por protesti, la bienula lakeo jam eksvingas sian skurĝon por lin vipi.






La patrino estas enkarcerigita pro nesufiĉa farmpago, kaj ŝiaj infanoj ploras ekstere, tamen la karcero ne povas enfermi ŝian malamon kaj subpremi ŝian indignon kontraŭ la bienulo!



La blinda maljunulo kiu suferadis de la bienula ekspluatado dum sia vivo, ne havas grenon por la lupago, nun povas trovi neniun alian eliron ol forvendi sian nepinon kiu estas lia sola parenco.

Atendante ekzamenon de sia farpago la knabino meditas: Kial la kamparanoj tiom suferas? Kial la bienulo estas tiom kruela? Kaj kial la mondo estas tiom maljusta?



Kie estas subpremo, tie estas kontraŭstaro. La kamparano ne volas toleri la suferojn kaj prenas batalilon por lukti kontraŭ la bienulo.



“Miloj da venkaj informoj brodiĝis sur la koltuko.”

Ngujen Van Troi

sur

la Pekinaj Scenejoj

ĜANG ĜONGBI

LA libro *Tiel Li Vivis* estas varme akceptata de la ĉinaj legantoj. La bravaj agoj de Ngujen Van Troi, la heroo de la verko, vekas en ili senliman estimon kaj profunde ilin kortuŝas.

Ngujen Van Troi — heroo filo de la vjetnama popolo — vivas ne nur en la koro de la ĉinaj popolanoj, sed ankaŭ sur la ĉinaj scenejoj.

Laŭ la libro *Tiel Li Vivis*, la artaj organizoj la Ĉina Pinggju-opera Trupo kaj la Pekina Popola Arta Teatro sinsekve verkis kaj ludis pinggju-operon “Ngujen Van Troi” kaj parolan teatraĵon “Tiel Li Vivis” respektive. De oktobro 1965 ĝis la fino de februaro 1966 ili ludis sume 231 fojojn kaj la rigardantoj atingis 328,790 personfojojn. Antaŭ tio, ankaŭ “La Nesubigebla Batalanto”, unu sceno en la grandioza dancopero “Indignaj Flamoj en Kokosarbaro” prezentita en aprilo 1965, montras lian heroecon. La dancopero estas jam filmita kaj prezentata ĉie tra la lando.

Kiam la longa pinggju-opero “Ngujen Van Troi” estis prezentata, la teatro estis homplena je ĉiu ludo. La rigardantoj ĝin diskonigis per ĉiaj laŭdoj. Ĝin rigardis ne nur pekinanoj, sed ankaŭ honoraj gastoj el la naskiĝlando de la heroo — vjetnamaj kamaradoj, kaj krome, kamaradoj kaj amikoj el aliaj pli ol 20 landoj kiaj Koreio, Rumanio, Birmo, Japanio, k. a.

“LA NESUBIGEBLA BATALANTO”

En la dua sceno de la dancopero “Indignaj Flamoj en Kokosarbaro”, la ĉina scenejo provis figuri la

heroon Ngujen Van Troi unuafoje. Tuj kiam leviĝis la kurteno, li majeste alpaŝas al la ekzekutejo, indigne rigardante al la dekoj da tremantaj bajonetoj kaj paftruoj de fusiloj, kio igas la kruelajn sed timemajn ekzekutistojn aspekti kvazaŭ fantomoj sub sunlumo. Li firme deklaras al la usonaj agresantoj: “Viaj kugloj povas nur havigi al mi gloron de batalanto, sed mia rideto destinas vian morton”...

Ekkrakas salvo kaj falas la juna heroo.

Sed en solena, indigna melodio vidiĝas denove inter la krioj de vjetnamaj popolanoj “Rezistu kontraŭ Usono kaj savu la nacion!” figuro de la heroo staranta kun ruĝa standardo alte tenata en la mano. Unu heroo falis, miloj kaj dekmiloj da batalantoj leviĝas! La vjetnama popolo estas neniam subigebla.

“NGUJEN VAN TROI”

La longa pinggju-opero “Ngujen Van Troi” elstarigas la grandiozan heroecon de la martiro kaj lian revolucionan optimismon.

En la opero, la kantoj de Ngujen Van Troi estas aŭ indignoplenaj kaj ĉionspitante bravaj aŭ pasiaj kaj kortuŝaj, precipe la kanto antaŭ la momento de lia martiriĝo:

*Ŝanĝiĝos la ĉielo kaj la tero.
En ĉiuj mondopartoj tondras bataltamburoj.*

.....
*Naskiĝis mi por la revolucio
Kaj mian vivon mi oferos al ĝi.*



Heroa malcedo antaŭ la malamiko

*Nedisigebla estas mi de l' revolucio;
Mortinte mi restados viva kiel abi'.*

La kanto brave elkantas la heroan spiriton de Ngujen Van Troi, kiu sentime kaj aplombe martiriĝis, kaj lian plenan kredon pri la nepra venko en la estonteco.

Tran Van Thanh, la estro de la Konstanta Delegacio de la Sudvjetnama Nacilibera Fronto en Ĉinio skribis post la rigardo al la opero:

“La ardega sento, kiun montras la dram-verkistoj, geaktorj kaj rigardantoj en la verkado, prezentado kaj rigardado de la pinggju-opero ‘Ngujen Van Troi’, jam bone pruvas, ke la revolucia popolo tra la tuta mondo

unuanime subtenas la aferon de Ngujen Van Troi, t. e. la kontraŭusonon kaj nacisavan aferon de la vjetnama popolo.

“La prezentado de la pinggju-opero ‘Ngujen Van troi’ en Pekino estas kontribuo por plifirmigi nian volon rezisti kontraŭ Usono, plikuraĝigas la vjetnaman polon en antaŭenmarŝado por akiri pli decidigan venkon, kaj estas forta subteno al ni por la sukcesigo de nia brila afero.”

“TIEL LI VIVIS”

Ĝi estas parola teatraĵo en tri aktoj kun dek du scenoj.

La unua akto el tri mallongaj scenoj, pri la periodo de la geedziĝo de Ngujen Van Troi kun Fan Thi Kujen ĝis lia arestiĝo, unuapaŝe bildigas la bataleman karakteron de Ngujen Van Troi, kiu naskiĝis kaj kreskis en cirkonstancoj de malamo. La kvar scenoj de la dua akto koncentre vidigas lian pint-kontraŭ-pintan luktadon kontraŭ la malamikoj kaj la proceson de la iom-post-ioma maturiĝo de Fan Thi Kujen dank’ al la helpo de ŝia edzo kaj la kuraĝigo de aliaj kamaradoj. La tria akto enhavas kvin scenojn, kiuj kun plej arda pasio prikantas la ekstreman lojalecon de Ngujen Van Troi al la kontraŭusona nacisava afero.

En tiu ĉi dramo la juna, fervora kaj kuraĝa figuro de Ngujen Van Troi profunde montras al la rigardantoj lian senkomparan malamon kontraŭ la usona imperiismo kaj lian senliman amon al siaj patrio kaj popolo.

Severa riproĉo al la perfidulo



INSPEKTISTO DE ELEKTROLINIO

(daŭrigo)

Verkis LIU ANKI

Ilustris ĜOŬ GIANFU

III

La sezonoj alternis kaj en palpebruma daŭro forpasis pli ol du jaroj. Majstro Gu jam estis kvindekokjara. Kun la faltoj sur sia vizaĝo multiĝintaj kaj la maldensaj haroj griziĝintaj, li aspektis multe pli maljuna. Ekde la lasta vintro, la artrito kaj stomaka malsano, kiujn kaŭzis al li lia longdaŭra vivo eksterdoma, fariĝis pli kaj pli seriozaj kaj iam li sentis tian doloron ke li ne povis engluti eĉ grajnon da rizo nek iom dormi tra tuta nokto. La sindikato plurfoje konsilis al li, ke li emeritiĝu, sed li ĉiam respondis per la samaj vortoj: "Neniu povos min disigi de la linio, escepte se mi ĉesos spiri!" La supera instanco povis fari nenion alian ol ordoni al mi, ke mi prizorgu pli multe lian sanon kaj lasu lin deĵori kiel eble plej malofte. Sed kiel mi povus venki lian denaskan obstinecon! Ne konsiderante ĉu ventis aŭ pluvis, ĉu estis lia deĵoro aŭ ne, li ĉiam iris patroli laŭlonge de la linio. Kelkajn fojojn mi mal-

konsilis lin, sed li severe demandis al mi: "Pro kio vi ne lasas min labori?"

"Vi estas maljuna, kaj krome malsana, tial vi bezonas prizorgon," mi diris.

"Prizorgon mi ne volas!" li ĉiam respondis kolere.

Ha, kontraŭ li mi estis efektive senkonsila.

En majo ĉijara, mi iris partopreni kunvenon kun la majstro al la Stacio de Lini-protektado trans la monto. Staciestro Vang ekscitite informis al ni, ke la Oficejo tre baldaŭ faros eksperimenton pri esplorado kaj riparado alte en la aero kun kurento neinterrompita. Tio estis ja kuraĝiga novaĵo. Kaj mi kaj mia majstro eksaltis pro ĝojo. Kial ni estis tiel ĝojaj? Ĉiuj kiuj iam laboris en elektra entrepreno scias, ke por garantii la sekurecon de la ekipaĵoj por elektra transsendo, la Oficejo de Elektra Povo devas fari periodan esploradon kaj riparadon kun kurento interrompita. Por ke la normala produktado ne estu influita, ni devis fari en la pasinteco tian esploradon kaj riparadon utiligante

Kulturon al Montvilaĝanoj (daŭrigo de p. 163)

toŭ k. a. telefone petis vian viziton. Via veno ja estas ne facile akirebla ŝanco. Hoŭĉjo, kion fari?" Hoŭ Sulin senhezite respondis: "Ja peto facile plenumbla! Mi tuj tien iros nur post telefona kontaktiĝo kun la Kultura Domo." Sed post la telefonado, kiam li volis ekiri, li trovis, ke malaperis la paro da kulturaĵ-kestoj. Jen kio okazis sen lia scio: Ĝang Mingvuan, la sekretario de la kompartia filio de la Ŝibajtoŭ-a Produktobrigado, kiu venis al la komunumo por interkonsiliĝi pri laboro, aŭdis en la korto, ke k-do Hoŭ iros al lia produkta brigado, kaj ŝtele forportis la kestojn anstataŭ li, dum ilia interparolado. Informiĝinte pri tio, k-do Hoŭ tuj ekpostkuris rapide kaj atingis lin nur post pli ol kvin-kilometra kurado.

En la kamparo, li klopodas servi la komunumanojn per multaj manieroj plej oportunaj por ili. Iutage en la pasinta jaro, li vizitis la Fangdi-an Produktobrigadon de Kidaŭ-komunumo vektportante la kestojn,

kaj trovis, ke komunumanoj sarkis milikampon. Li senhezite eklaboris kune kun anoj de la tria produkto-grupo. Dum la interpaŭzo li amuzis ilin per stereoskopoj, faris Vers-rakontadon kaj instruis novajn kantojn al ili, tiel ke forpeliĝis ilia laco. Post la tagmanĝo, profitante la ripozhoron, li vizitis domon post domo por vidigi al maljunuloj kaj malsanuloj stereoskopajn bildojn kaj aŭdigi radioprogramerojn. Vespere, al komunumanoj li prezentis la improvize memfaritajn lumbildojn pri Kin Gjunhian, kiu sarkis plej rapide kaj pri modela agado de la elstara komunumano Caŭ Ginĉang. La enhavon li kolektis dum la laboro. La komunumanoj diris, ke la paro da kestoj servas ne malpli bone ol teatro.

En dek jaroj, k-do Hoŭ rondvizitadis senĉese montvilaĝojn kaj foirojn tra la tuta gubernio, vektportante la kestojn de riĉa kultura nutraĵo, kaj la komunumanoj nomas lin "amiko nemalhavebla."

la ŝancojn de la Printempa Festo aŭ aliaj ferioj kiam libertempis la laboristoj en fabrikoj kaj minejoj. Sekve ni ĉiam pasigis la Printempajn Festojn aŭ aliajn feriojn sub la libera ĉielo. Kiel bone estos, se la eksperimento sukcesos!

“Kiam oni eksperimentos, Vanĉjo?” la majstro multe interesiĝis.

“Oni diris, ke taŭga homo por surgrimpi la turon estas ankoraŭ ne trovita,” respondis staciestro Vang kapskuante.

“Kial do?” demandis la Majstro malfermegante la okulojn.

“Neniu faris tion iam antaŭe. Oni havas zorgojn, ne sciante precize kio okazos.”



Aŭdinte tion, Majstro Gu subite stariĝis ekfrapante al si la bruston kaj diris: “La Partio neniam riskigos la vivon de ni laboristoj. La Oficejo studis la problemon jam ĉirkaŭ du aŭ tri jarojn. Nun oni devas esti certa pri tio. Estro, diru al la Oficejo, ke mi volantas!”

“Sed... sed...” Staciestro Vang estis iom surprizita.

“Vi estas tiel altaĝa, kaj krome via sano...”

“Ej! Zingibro estas des pli pika, ju pli maljuna ĝi estas. Mi taŭgas por la laboro!”

Fine la staciestro povis nur balanci la kapon, cedante al la persistemo de la majstro. Post ĉirkaŭ duonmonato venis la avizo de la Oficejo por transoficigi la majstron al la Centra Eksperimentejo. Tiuvespere mi havis ekstreme kontraŭdirajn sentojn. Mi estis kaj streĉita kaj ekscitita. Miaj okuloj ne fermiĝis la tutan nokton. Ankaŭ la majstro ne povis endormiĝi, turniĝante en la lito de tempo al tempo. Por prizorgi la majstron, mi ripetfoje petis, ke mi iru al la Oficejo kune kun li, kion li fine konsentis.

En la oficĉambro de la oficejestro, la gvidantaj kamaradoj varme akceptis nin. Oficejestro Ĝaŭ ridante demandis al la majstro: “Guĉjo, diru al mi la veron. Ĉu vi havas ian zorgon?”

“Se mi havus zorgon, mi ne estus veninta,” respondis Majstro Gu en plej firma tono.

Oficejestro Ĝaŭ plenigis tason per bonkvalita teo por la majstro.

Trinkinte la teon kaj interbabilinte iom da tempo la majstro ne povis sin deteni plu. Li urĝis la ĉefinĝenieron asigni al li la taskon. Vidinte ke la majstro estas tiel urĝema, la ĉefinĝeniero akompanis nin al la eksperiment-ĉambro de elektrotekniko. Montrante al diagramoj kaj bildoj sur la muroj kaj modeloj sur la tero, li detale klarigis al ni la sciencajn principojn de la riparado kun kurento neinterrompita, la procedon de manipulado kaj koncernajn atentendaĵojn. Mi enskribis ĉion en mian notlibron. Tiam mi estis ne tiel streĉita kiel antaŭe, ĉar de la klarigado de la ĉefinĝeniero mi sciis, ke tio estas apliko de la scienca principo de “egala potencialo” kaj nenio danĝera. Sed kiam la majstro demetis siajn vestojn, mi rimarkis kun surprizo, ke sur lia korpo troviĝas multaj glataj cikatroj, kvazaŭ li estas senigita je la haŭto.

“Pro kio estas... ĉi tio?” mi demandis surprizite kun buŝo larĝe malfermita. Post longa silento la majstro dolorplene diris: “En 1943, kiam mi laboris en la Nordorienta Elektra Kompanio fondita de japanoj kaj marionetoj, la japanaj invadantoj por gajni pli multe da mono perforte devigis nin fari eksperimenton de esplorado kaj riparado kun kurento neinterrompita. Iufoje la izolilo estis trarompita. De mia tuta korpo diseljetiĝis sparkoj. Mi falis de fera turo tridek metrojn alta. Unu el miaj kruroj kripliĝis kaj postlasiĝis plenkorporo da cikatroj...”

“Damnindaj diabloj! Ili traktis la laboristojn simple ne kiel homojn!” Mi ektemis de indigno kaj grincigis la dentojn.


“Malgranda Li, rememorante la suferplenan pasintcon kaj pensante la nunan feliĉon, mi vere deziregas, ke mi havu dek brakojn por multe labori por la Partio...”

La sekvinta frumateno estis serena kun malmulte da nuboj sur la ĉielo. Kun ekscitita kaj streĉita sento mi akompanis la majstron al la eksperimentejo. Ĉirkaŭ la placo staris densa vico de ruĝaj flagoj. Sur la direkta altano estis pendigita granda portreto de Prezidanto Maŭ. En la mezo de la placo estis starigitaj ĉielskrapanta fera turo, transformatoro kaj giganta argano. Seninterrompe alvenis vizitantoj por observi la eksperimenton. La sekretario de la Partio, la oficejestro, la prezidanto de la sindikato, ĉiuj gvidantaj kamaradoj estis delonge alvenintaj. Ili firme manpremis kun la majstro, intime interparolis kun li kaj donis konsilojn...

Mi helpis la majstron sin vesti per speciale farita metala vesto, alligi bobenojn, kaj foje kaj refoje kontrolis la ekipaĵon sur lia korpo, por ke nenia akcidento okazu. Post kiam ĉio estis preta, la ĉefinĝeniero suriris la direktan altanon, svingis la ruĝan flagon en la mano, signalis per la fajfilo kaj solene proklamis la ordonon: “Ĉiuj sin retiru kvin metrojn for de la linio!” Kun la fortiĝo de la homamaso mia koro dolore bategis kvazaŭ elsaltante el mia brusto kaj pro timo mi ŝvitis ambaŭmane.

Mi estis la lasta homo kiu retiriĝis el la rondo. Mi vidis, ke la majstro vestita en ore brila kiraso kuraĝe

eniris en la kaĝon, kiun la argano malrapide levis poste per sia giganta brako en la aeron pli kaj pli alten ĝis la kaĝo estis najbara al la brako de la fera turo. Tiam ankaŭ mia koro ŝajnis forkaptita de aglo en la aeron kaj ŝvebanta. Post kiam ĉiu posteno donis la signalon "Jam prete", la ĉefinĝeniero krucigis la blublanĝajn flagojn en siaj manoj kaj donis la ordonon "Fermu la cirkvitojn!" Subite eklumis la ruĝa lampo montranta la fluon de la kurento. Ĉiuj retenis sian spiradon en streĉo. Inĝeniero Liu, kiu direktis la altiĝon de tensio, rigardante al sia brakhorloĝo kriis: "dek mil, dudek mil, kvardek mil, okdek mil..." Nur kiam la tensio leviĝis ĝis cent mil voltoj, mi malfermis la okulojn kaj levis la kapon. Trovinte ke la majstro sekure staras en la kaĝo, mi sentis ke mia



furioze batanta koro iom trankviliĝas. Mi pensis, ke estas jam nenio maltrankviliga.

Post kiam la tensio leviĝis ĝis ducent dudek mil voltoj, mi vidis, ke la majstro firmpaŝe eliris el la kaĝo, vikle forprenis la gantojn, kaj rajdante sur metalfadeno elprenis tenajlon kaj komencis lerte labori. Kvazaŭ akrobata prezentado en cirko, kun ĉiuj rimarkindaj akrobataĵoj, la sceno estis efektive miriga. Absorbite de la sperta kaj lerta enaera laborado de la majstro, la tuta rigardantaro tondre ekaplaŭdis kvazaŭ en interkonsento. Tiam mi tute forgesis mian zorgon kaj kvazaŭ enirinte en fabelan mondon nur stulte fikserigardis la majstron, kun larmoj nereteneble fluantaj sur la vangoj. . . .

Vespere, kiam mi ekpensis pri la mirinda sceno en la tago, mi flustre demandis al la majstro: "Ĉu vi timis tiam?" Ridante li respondis: "En la komenco mi ja sentis min iom streĉita, precipe kiam la kurento estis min trafluonta. Sed vidinte la ruĝajn flagojn, la portreton de Prezidanto Maŭ kaj tiom da paroj da okuloj prizorgemaj, mi trankviliĝis. Mi pensis, kion mi devas timi kiam mi havas la prizorgon de la Partio kaj la popolo."

IV

Post la sukcesa eksperimento de laborado kun kurento neinterrompita, la supera instanco de la Oficejo de Elektra Povo devigis Majstron Gu iri al la Varmbana Sanatorio de Al-monto por sanigado. Mi revenis sola al la lini-inspekta stacio. Lastan monaton mi ricevis de li leteron, en kiu li diris interalie ke la tieaj kondiĉoj de sanigado estas tre bonaj kaj ke la artrito estas tute kuracita dum la stomaka malsano eliminata. Ĉe la leterfino li skribis:

La kuracisto diris, ke mi devas trapasi ankoraŭ tri kurac-periodojn. Laŭ mia supozo, mi povos elhospitaliĝi post maksimume duonmonato. Malgranda Li, por diri la veron, kvankam la pejzaĝo ĉitiea estas pitoreska, kun belaj montoj kaj akvoj, kie kantas birdoj kaj pompas floroj, eĉ pli bela ol la paradizo en la sonĝo, tamen mi ne povas ĝui tian trankvilan feliĉon, ĉar mi ĉiam pripensas mian malgrandan montvalon. Kiam mi trinkas lakton, manĝas pomojn, baniĝas en la varma fonto... , mi pensas, ke se mi estus tiel maljuna kaj malsana en la malnova socio, mi estus delonge forĵetita de la kapitalistoj kaj kredeble malsatmortinta ĉe stratangulo... Pripensante ĉi tion, mi sentas mian tutan korpon arda kaj forte deziras tuj eliri el la sanatorio. Malgranda Li, en via responda letero nepre skribu al mi la staton de la stacio. Kiom mi sopiras al miaj feraj turoj, lignaj stangoj, metal-fadenoj transsendantaj alttensian kurenton, kaj ĉiuj miaj frataj kunuloj...

Ŝajnis al mi, ke la letero kiun mi tenis en la mano estis maso da flamanta fajro kaj en miajn arteriojn injektiĝis arda sango. Subite ekbolis entuziasmo en mia koro.


Trad. Pandiŝo



ZIŜI:

ZUNJI

Revolucia Urbo



La domo en kiu okazis la Zunji-kunveno

ZUNJI estas la dua urbo de Gujgou-provinco, en la sudokcidenta parto de Ĉinio. Kun natura ŝirmo de la danĝera Vugian-rivero en la sudo kaj la impona pasejo de Louŝangan en la nordo, ĝi delonge rolas kiel la politika, ekonomia kaj kultura centro en la nordo de tiu provinco.

En januaro, 1935, la Ĉina Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo venis en la urbon dum sia Longa Marŝo, kaj la Komunista Partio de Ĉinio okazigis ĉi tie la gravan Zunji-Kunvenon, kiu metis finon al la gvida linio de la "maldekstra" oportunismo, kaj starigis la gvidon de kamarado Maŭ Zedong en la Centra Komitato kaj la tuta Partio. Ekde tiu tempo la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina revolucio iris de venko al venko, sub la gvido de marksism-leninisma linio de la granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong.

Post la Liberiĝo, la fizionomio de Zunji tute aliĝis. Antaŭe la urbo plejparte konsistis el malaltaj pajlaj kabanaj kaj kadukaj domoj kun tegolaj tegmentoj, ĝiaj stratoj estis mallarĝaj kaj malebenaj, en la tuta urbo instaligis nur malmulte da malhelaj elektraj lampoj, kaj ne estis akvokondukca sistemo. Ĝia industrio konsistis nur el kelkaj simplaj laborejoj de faruno, alkoholo, alumeto k. a. malbone ekipitaj kaj neregule funkciantaj. Post la Liberiĝo, la popolo de Zunji forte strebas al prosperiĝo kaj luktadas kontraŭ malfaciloj en konstruado. Ĝi establis ne nur multe da fabrikoj, sed ankaŭ konstruis grandan nombron da lernejoj, hospitaloj, magazenoj kaj loĝdomoj. La ĉefaj stratoj en la urbo estas riparitaj aŭ rekonstruitaj, kaj iliaj deklivoj iom niveligitaj. La loĝantoj ĉiuj povas ĝui la servon de la akvokondukca sistemo kaj lumigi siajn ĉambroj per elektraj lampoj. Nun, la duhora produktkvanto de elektro de la urbo jam egalas al la tutjara antaŭ la Liberiĝo.

Por la revolucio la popolo de Zunji havas profundan amon. Post la Liberiĝo, la domo en kiu iam okazis la Zunji-Kunveno, estas aranĝita kiel muzeo laŭ la tiama stato. Pli ol mil valoraj dokumentoj kaj objektoj, el kiuj multaj estis konservataj de popolanoj dumlonge je



Nova fizionomio de Zunji

risko de la vivo, estas ekspozitaj en ĝi. Depost la malfermiĝo de la muzeo, ĝin vizitis multe da laboristoj, kamparanoj, batalantoj, lernantoj kaj fremdaj amikoj.

La Ruĝflora Monteto norde de la urbo, kie la Ruĝa Armeo tiam venkis 4 malamikajn diviziojn en ilia atako, nun estas jam kovrita de la verdverdaj arboj de la "Memoriga Arbaro".

La popolo de Zunji tenas la revolucionan tradicion kiel sian trezoron konservendan de generacio al generacio, kaj aldonis la vorton "memoriga" al ĉiuj lokoj ĉe kiuj la Ruĝa Armeo staris, batalis kaj aktivis, por ke oni neniam forgesu la pasintecon kaj daŭrigu la revolucion de generacio al generacio. La loko, kie la Ruĝa Armeo organizis mitingon tiutempe, nun portas la nomon "Memoriga Placo". Ĉiuj tiuj lokoj fariĝis "klasĉambroj" por eduki la popolanojn pri la revolucia tradicio.

POST LA CORSO

Vortoj kun "*" estas klarig-itaj en "Nia Vortareto"

Batalrakonto de Vjetnamio

ANTAŬ LA SOLTRUNKA PONTO

Estis speciala taĉmento* de la uson-pupa armeo, kiu iris de la urbo Ho Thao al Cong Che por agresa "for-balao". Survoje ĝi venis al soltrunka ponto el 72 arbo-trunkoj interligitaj en unu linio. Ĝi haltis kaj senfare tempomuelis de la 8-a horo matene ĝis la tagmezo, kaj neniu el la trupanoj kuraĝis surpaŝi la ponton, ĉar ili timis embuskon* de gerilanoj* sur la kontraŭa bordo. Timante riproĉon de la usona konsilisto, la taĉmentestro ordonis al ĉiuj maŝinapistoj ekpafon kontraŭ la alia bordo, kaj iris la unua sur la ponton sinriske, nur kiam li vidis ke nenio okazas responde.

La taĉmentestro timeme suriris unu trunkon post alia, kaj kiam li

venis al la kvina, subite "paf!" — kuglo de la kontraŭa bordo trafis lian ŝultron. "Gerilanoj! geril. . ." la ulo falis kapo-malsupren en la ŝlim-ejon* sub la ponto antaŭ ol fini sian krion.

La malamikoj denove freneze* pafis kontraŭ la alia bordo, kun intenco ŝirmi* siajn soldatojn antaŭeniri de sur la ponto. Tamen tiuj uloj nur sin retiris kun timo, kvankam ili kri-aĉ-is "Antaŭen!"

Kiam iu ĉef-serĝento* kolere minacis ilin per pistolo, la ses soldatoj kiuj ĵus sin retiris de la ponto, diris al li: "Ni ne kuraĝas! Via moŝto iru antaŭ ni se vi kuraĝas, kaj ni vin sekvos!"

La ĉef-serĝento ree ordonis starigi la maŝinapistojn kaj pafi senĉese kvin seriojn da kugloj kontraŭ la arbaro sur la alia bordo, kaj poste bombardi per la bombĵetilo por malfermi al li la vojon. Liaj kruroj tuj ekstremis kiam li suriris la ponton. Atinte la lokon kie la taĉmentestro estis trafita de kuglo, li jam ne plu povis sin treni antaŭen, kaj liaj kruroj nun tremis kiel vibranta* kordo, kaj la soldatoj malantaŭ li kriis: "Kion plu? Retiriĝu!"

Por ne perdi sian honoron, li povis nur sinriske moviĝi antaŭen malrapide. Trairinte kelke da trunkoj kaj vidinte nenion malbonan, li laŭte kriis al la soldatoj: "Nur kelke da etaj gerilanoj faris kelke da pafoj, kaj jam forkuris. Kial timi! Kial ti. . . ." Apenaŭ elbuŝiĝis la silabo "ti" kiam subite aŭdiĝis "Paf! paf! paf!" — tri pafoj el la arbaro. Dek kvin pupaj soldatoj, aŭ kuglo-trafitaj aŭ pro timo ŝanceliĝintaj, ĉiuj falis sub la ponton.

Ĉu vi scias, kiom da homoj akceptis tiom prete la taĉmenton profite de la arbaro kaj la favora pozicio sur la kontraŭa bordo? Nur unu gerila grupeto, el du virinoj kaj unu viro.

Ĉina Fablo

MALĜUSTA DIREKTO

Iam antaŭe estis vojaĝanto en la Centra Ebenaĵo, kiu volis iri al Ĉu-lando, kiu troviĝis en la sudo de lia hejmlando. Sed la vojaĝanto direktis sin norden.

Sur la vojo iu admonis lin: "Hej, samlokano, vi eraras. Por atingi Ĉu-landon vi devas iri suden!"

"Ne grave. Mi havas bonegan ĉevalon, kiu estas treege rapida!"

SUR NIA LIBROBRETŬ

Anna Louise Strong: **LETEROJ EL ĈINIO** — Eldonita de la Novmonda Eldonejo, Pekino. Formato: 13×18.5 cm., 118 p. Prezo: Rb. 0.41, £ 0-3-3, C\$ 0.45, Gld. 1.65. Havebla ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino.

La titolo de tiu ĉi libro jam montras, ke ĝi estas kolekto de leteroj de la aŭtorino senditaj el Ĉinio. A. L. Strong estas famekonata usona ĵurnalistino kaj verkistino, kiu sesfoje vizitis Ĉinion kaj sufiĉe longe restadis ĉi-tie. Tial ŝi bone konas Ĉinion. En 1946, ŝi intervjuis Prezidanton Maŭ Zedong en Jan-an, kaj poste publikigis lian faman tezon ke ĉiuj reakciularoj estas paperaj tigroj. En 1958, je la aĝo de 72 jaroj, ŝi ree venis al Ĉinio kaj faris multflankan kaj longtempan observadon pri la

liberigita lando. Dum tiu periodo, krom verki librojn pri Ĉinio, ŝi ankaŭ skribis multajn leterojn al siaj geamikoj en diversaj landoj por konigi la nuntempan Ĉinion. Tiu ĉi libro estas kolekto de leteroj skribitaj dum la periodo de septembro de 1962 ĝis julio de 1963. Ĝi enhavas leterojn kun 28 diversaj temoj, inkluzive 8 leterojn skribitajn de 6 el siaj diverslandaj geamikoj loĝantaj en Ĉinio.

En tiuj leteroj ŝi, kiel atestanto pri la realo en Ĉinio, skribis pri aferoj, kiujn ŝi persone sciis kaj proprakule vidis en Ĉinio, inkluzive de la stato de ekonomio kaj konstruado en Ĉinio, la landlima konflikto inter Ĉinio kaj Hindio, la granda debato pri la internacia komunisma movado. Kaj la lasta letero speciale temas pri tio "Kial Mi Venis al Ĉinio je la Aĝo de 72".

Per akra observo de ĵurnalistino, profunda kompreno pri la revolucio de Ĉinio kaj maniero de familiara rakontado al geamikoj, en la mallon-

gaj leteroj ŝi ne nur diras al la legantoj la ĉefajn eventojn kaj progresojn okazintajn en Ĉinio tiutempe, sed ankaŭ faris konkretan analizon pri tiuj problemoj. Tio multe helpas la legantojn kompreni la veran celon de la kontraŭĉinaj kriaĉoj de diverslandaj reakciuloj, kaj la disvolviĝon de Ĉinio en la estonteco.

Estas ĝojinde por ĉiuj esperantistoj kiuj volas scii la situacion en Ĉinio, ke la pekina Novmonda Eldonejo aperigis E-tradukon de tiu leteraro.

La lingvo estas flua, sed en kelkaj lokoj montriĝis rigidaj esprimoj pro influo de la angla originalo. En ĝi troviĝas ankaŭ kelkaj preseraroj, sed tio neniom malhelpas la legantojn koni ĝian enhavon, ĉar "korekto" pri la pli gravaj aldoniĝis.

Veren

Andrzej Pettyn: **NOVAJ TENDENCOJ EN LA INSTRUADO DE ESPERANTO** — Broŝuro multobligita de la Pola Esperanto Aso-

"Tio ne helpas. En la direkto al la nordo vi ne atingos vian cellokon!"

"Estas nenio. Mi posedas grandan sumon por la vojaĝo!"

"Via mono ne povas ŝanĝi la rezulton ke vi ne trovos Ĉu-landon en la nordo."

"Sed mia ĉevalisto scias plej bone konduki la ĉevalon."

Tiel la vojaĝanto daŭrigis sian vojaĝon laŭ la erara direkto. Oni estas certa ke ju pli bona estis lia ĉevalo, ju pli multa estis lia mono, kaj ju pli kapabla estis lia ĉevalisto, des pli fore li estis troviĝonta de Ĉu-lando.

Nia Vortareto

embusk-o — sin-kaŝo por surpriza atako.

frenez-i — agi sen sin-rego.

geril-o — milito farata de armitaj nemilitistoj por ĝeni la malamikojn per embuskoj kaj surprizatakoj.

serĝent-o — malsupera estro en armeo.

ŝirm-i — defendi.

ŝlim-o — tero kun akvo.

taĉment-o — iom granda grupo de soldatoj.

vibr-i — tremeti.

cio, Filio en Varsovio, 1965. Formato: 14×19.5 cm., 28 p.

Kiel la titolo montras, la broŝuro traktas temon tre interesan por la esperantistoj. Laŭ konstato de la aŭtoro, la "pasiva" ekregado de Esperanto, t. e. nur kompreno de gramatiko kaj teksto, per si mem ne kondukas al ĝia "aktiva" kono, t. e. paroli libere kaj korekte en la lingvo Esperanto.

La aŭtoro kritikis la instru-metodojn t. n. "eksplikado" kaj gramatikado kaj rekomendas novan metodon de "perinstruado", kiu donas rapide al la lernanto aktivan konon de la lingvo per "parol-aŭskultado".

La metodo laŭdire devenis de la studo de angl-lingva instruado kaj en diverslandaj E-kursoj estas jam aplikata kaj rikoltis kontentigan sukceson.

La broŝuro rakontas koncize la tutan metodon kaj donas sufiĉe riĉajn ekzemplojn, do ĝi estas rekomendinda por ĉiuj kurso-gvidantoj. Ĉ.E.



PLI VASTIĜIS LA ESPERANTA ELDONADO DE LA PEKINA FREMDLINGVA ELDONEJO

Por kontentigi la postulojn de la legantoj, la pekina Fremdlingva Eldonejo plimultigis la specojn de siaj esperantaj libroj. Ĝiaj eldonaĵoj inkluzivas verkojn de Maŭ Zedong, politik-teoriajn librojn, dokumentojn pri la internacia komunisma movado, broŝurojn de fundamentaj scioj pri Ĉinio, literaturajn verkojn, legaĵojn por infanoj, fotajn kaj belartajn albumojn.

SINJORO SUN GUOĜANG FORPISIS

Sinjoro Sun Guoĝang, kiu sin okupis pri Esperanto en la unua periodo de la E-movado en Ĉinio, mortis en Vuhan en sia 81-a jaro, la 14-an de decembro, pasintjare.

Antaŭ 50 jaroj, Sinjoro Sun kaj aliaj ĉinaj esperantistoj kune fondis la Ĥinan Esperantistan Asocion (ĤEA) kaj malfermis esperantan vesperan lernejon. En 1917, kiam la Pekina Universitato la unuan fojon establis esperantan kurson, li ĝin gvidis.


ĈEĤIAJ LABORISTOJ SUBTENAS VJETNAMION

La 25-an de novembro 1965 okazis en Dĉĉin laŭ instigo de la Regiona Sindikata Komitato kunveno de 250 delegitoj de ĉiuj uzinoj kaj entreprenoj de la tuta regiono pri la situacio nuntempa en la Demokratia Respubliko de Vjetnamio. La ĉefa parolanto de la kunveno estis k-do Paŝka, kiu vizitis en 1964 Vjetnamion kiel gvidanto de la delegacio al Vjetnamio.

K-do Paŝka desegnis al la ĉeestantoj siajn travivaĵojn kaj spertojn en Vjetnamio ke ili ricevis preskaŭ imagan bildon pri la heroa popolo.

La paroladon akompanis speciale aranĝita ekspozicieto konsistanta el materialoj pri Vjetnamio alsenditaj

de la Redakcio de *El Popola Ĉinio*. La ĉeestantoj atente rigardis la ekspoziciaĵojn. La bildoj pri kruelaĵoj fariĝantaj de la usona imperiismo en Vjetnamio kontraŭ la senkulpa loĝantaro, montris al la publiko la malhomecon de la agresantoj kaj elvokis diskutadon ĉe la ĉeestantoj.



La ĉeestantoj ankaŭ volonte donis siajn subskribojn sur la listoj por pruvi iliajn varmajn simpatiojn por la vjetnama popolo kaj ties heroa defendbatalo.

..... R. Václav-dĉĉin.

LA 14-A JARA KONGRESO DE NORDAMERIKAJ ESPERANTISTOJ

De la 21-a ĝis la 24-a de julio ĉijare la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko okazigos sian 14-an jaran kongreson ĉe la Centro de Plenaĝula Eduko de la Universitato de Maryland, Usono.

Humuraĵoj

DISPUTO PRI SOVAĜANSERO

Du fratoj vidis sovaĝanseron en la aero. La pliaĝa, kiu jam pretis arkpafi, diris: "Bongustaĵo post stufo!"

"Ne!" malkonsentis la juna frato. "Prefere ĝin frikasu, se vi volas, ke ĝi bongustu!"

Ili komencis disputi kaj neniu volis cedi al la alia. Ili petis juĝon de maljunulo, kaj tiu ĉi diris, ke ili distranĉu la birdon en du partojn, stufu unu parton kaj frikasu la alian.

Nun la fratoj paciĝis kaj ekserĉis la birdon, sed ĝi jam forflugis antaŭ longe!



Modernaj Lignogravuraĵoj de Ĉinio

Post la apero de la albumoj *Pejzaĝoj de Ĉinio*, *Moderna Pekino*, *El Ĉina Fotografia Arto*, jen eldoniĝas pli altvalora arta albumo, kiu ĝisdate spegulas la atingojn de la lignogravura arto de Ĉinio en la lastaj jaroj. La 81 diversskolaj lignogravuraĵoj en tiu ĉi kolekto temas pri la diversaj flankoj de la vivo de la laboranta popolo. 56 el ili estas presitaj en koloroj.

Formato: 23×25.7 cm. 92 p.

Eldonis: Ĉina Esperanto-Ligo

Prezo: Rb. 1.14, £ 0-9-0, C\$ 1.25, Gld. 4.55

Mendu ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo
(P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio) aŭ
ĝiaj perantoj en diversaj landoj

Korespondi Deziras

Tiu ĉi rubriko senpage servas unue al niaj abonantoj. Vole citu la matrikulon de via abonilo de EPC, kiam vi sendas anonctekston.

La anoncintoj respondu almenaŭ unufoje al ĉiu ricevita korespondaĵo. Pri la anoncetoj nia redakcio ne respondecas.

La Red.

*Kontraŭ 100-200 uzitaj sendifektaj pm. el Ĉinio k. a. aziaj landoj kaj aliaj eventuale, sendos saman nombron el Francio, Eŭropo kaj aliaj landoj. Sendu al: R. Melo, 6pl. J. Ferry St. Etienne 42, Francio.

*Permanne Ernesto, 9 Rue st. Etienne Fecamp (Seine Maritime), Francio. Dez. kor. kun ĉl. celante interŝ. de naciaj vestitaj pupoj kaj ilustritaj pk. pri kostumoj. Nepre respondos al ĉiu korespondonto.

*Angelo Porta-Puglia, Via Laboriola 1, Torino, Italio. 23-jaraĝa studento. Dez. kor.

kun gejunuloj el Azio, Afriko, Suda Ameriko kaj ceteraj pri ĉ. t.

*Mi serĉas korespondantojn, kiuj interesiĝas pri politikaj kaj sociaj demandoj kaj korespondantaron por 60-jaraĝa virino (komencantino), kiu apartenas al la societo Svedio-Ĉinio kaj havas ĉiuspecajn kulturajn interesojn. Adreso: Jim Horno, Saggatan 32, Goterborg-V, Svedio.

* Julio Csapo, str. Sĉintei (Kinizsi) 66 SATU-MARE, Reg. Maramureŝ, Rumanio, dez. ŝanĝi Esp-pm. per rumanaj pm.

* Nemeth Tibor, Budapest, XII Bazin u. 14. Hungario, dez. kor. kun geesp-istoj el la aziaj k. afrikaj landoj.

* Seuleanu Ion kaj Robu Cornel dez. kor. kun filologoj el ĉiuj landoj. Adreso: CLUJ, str. Horia 31, Facultatea de Filologie, Rumanio. Bv. skribu respektive al ĉiu.

* K-do Allan E. Fineberg, 76 Seventeenth Ave., Paterson 3, New Jersey, Usono, dez. kor., prefere per magnet-sonbendoj, kun ĉl. pri diversaj temoj.

* Jiri Jiroušek, kursgvidanto tr, 5. kvĉt-na 799, Ĉeska Lipa, Ĉeĥoslovakio dez. kor. kun ĉta mondo.

* Werni Magdela dez. kor. kun gejunuloj el tuta mondo kaj interŝ. bk. adr: Buda-pesto XIX, Hungario, Arpad u 137.

EL *Popola*
ĈINIO

人民中國報道

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (98) 1966

Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Priservantinoj de la pekina civila flugkampoj pretas al sia posteno.

Foto de Ĉen Hivej

Nova Vivo de Malnova Arto
La Nova Ĉinio, Lando Tute Kvita de Eksterlandaj Ŝuldoj

La Fera Homo de Daking
Venko Apartenos al la Vjetnama Popolo

— Al Kamaradoj de VPEA

Subteno al la Batalo de la Usona Popolo kontraŭ la Agresa Milito de Usona Imperiismo en Vjetnamio

Kial Mi Ŝatas Loĝi en Pekino je la Aĝo de 80?

Dek Jaroj de Fiŝista Vilaĝo

Trafiko en la Regionoj de Nacimallimultoj

Naskiĝo de Dikec-mezurilo
“Dorskorba Butiko”

Tapiŝo de Tiangin, Majstra Belartaĵo

Novaj Verkadoj de la Maljuna Partondisto

Novjaraj Bildoj (*bildpaĝoj*)

Kuracistino de la Laboranta Popolo
Nektaroj el la Abrikotflora Vilaĝo
Ĉinaj Priservantinoj en Civilaj Aviadiloj

La Monto Luŝan

Funebra Rememoro pri An Bo
Transformiĝo de la Ĉina Skribolingvo
Kulturon al Montvilaĝanoj

Rondirantaj Lernantoj


“Farmpaga Kolektejo” (*kun bildpaĝoj*)

Ngujen Van Troi sur la Pekinaj Scenejoj

Inspektisto de Elektrolinio (*novelo*)
ZUNJI — Revolucia Urbo

Sur la dorskovrilo — Vidu kiom da orfiŝoj.

Foto de Aŭ Enhong



LOKAJ VIDAĴOJ

Supre:

Ŝuĝuang-Ĝardeno en Hiamen, Fugian-provinco

Foto de He Ŝijaŭ

Malsupre:

La rokego "Sunbrilo" ĉe Gulangju, Hiamen. De tie la fama generalo Ĝeng Ĉengong (1624 — 1662 p. K.) de Ming-dinastio transpasis la mar-kolon kaj reprenis Tajvan-on okupitan de nederlandaj invadantoj.

Foto de He Ŝijaŭ





21.954

